

IL POPOLA CINIO

中國報道

6 1988




VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ

Nova vivo venis en la mondon

Fotoj de ĈEN ŜJAŬĈUN

Nova vivo ĝojigas ne nur la familion, sed ankaŭ ties parencojn kaj amikojn. En multaj lokoj de Ĉinio la naskiĝo de bebo estas festata en diversaj manieroj. La naskolimigo nun praktikata de Ĉinio permesas al ĉiu paro da geedzoj havi nur unu infanon, tial la infano estas pli dorlotata de la gepatroj. Kiam la infano ankoraŭ dormas en la utero de la patrino, ĝi jam estas multe prizorgata. Ankaŭ la socio alprenis multajn rimedojn por garantii la sekurecon de la infanoj kaj akuŝintinoj.


Nova vivo venis en la mondon.




Novnaskitoj



Jus en la hejmon



En ĉambro de nov-
naskitoj en obstetrika
hospitalo





Juna patrino en feliĉo

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Imperiestra edzino Jang Juhŭan en la
danco "Ora Danco, Arĝenta
Ornamo"

Foto de **Ŝen Ĉen**

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Nova vivo venis en la mondon

Fotoj de **Ĉen Ŝjaŭĉun**

La riĉa Sangĝjang-ebenaĵo

Fotoj de **Gaŭ Mingji**

kaj **Jang Ŝiŭjun**

SUR LA DORSKOVRILO:

(ĈINAJ POŝTMARKOJ)

Famaj antikvaj turoj de Ĉinio

- 2 Kampara reformado kaj greno problemo por miliardo da loĝantoj
- 7 Maltrankvilo pri la loĝantaro
- 54 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (18): Ĝingĝoŭ, regiono de antikva kulturo kaj novaj industrioj
- 15 Zensto — entuziasma semanto de Esperanto
- 17 La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
- 18 ESP-NOVAĴOJ
- 21 POR KOMENCANTOJ: Araba anekdoto
- 22 Kiel ili fariĝis mastroj de kulturo?
- 24 Jang Ĝijing sin dediĉanta al kuracado de kancero per ĉina medicino
- 37 POR VIA SANO: Korpo-sanigaj metodoj
- 26 NOVELO: Maljunaj geedzoj
- 39 ĈINA LITERATURO:
La kampanjo de klasika prozo en Tang-dinastio
Du prozaĵoj de Tang-dinastio
- 68 Evoluo de la belo en la lando de vestoj
- 30 ĈINAJ ARTOJ: Ĉina ĝardenistiko
- 44 Agrabla gastado ĉe vilaĝanoj
- 48 Vizito al la Ŝtona Montvilaĝo
- 50 En hejmloko de dinosaŭroj
- 12 Raraj historiaj objektoj de Ĝjangŝji
- 61 Ĝemelaj urboj — pontoj de amikeco
- 52 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Manĝbastonetoj — mirinda manĝilo
- 66 ĈINAJ MOROJ: Konkurso de tamburaj ĉaroj
- 63 KURANTAJ AFEROJ
- 6,29,53 KORESPONDI DEZIRAS
- 38 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

JARABONTARIFO			Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00
Aŭstralio	\$A	15.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	1500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	14.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalia	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

Kampara reformado kaj grena problemo por miliardo da loĝantoj

Dum la pasinta longa periodo, komuniginte la agrojn, brutojn kaj aliajn produktajn rimedojn kaj organizinte sin en produktajn grupojn, produktajn brigadojn kaj popolajn komunumojn, la ĉinaj kamparanoj laboris sur kampoj de kolektivo kaj prenis jarfine grenon kaj monon laŭ siaj respektivaj laborpoentoj.

La troa centralizismo en la produktado kaj egalismo en distribuado de laborfruktoj serioze vundis la aktivecon de la kamparanoj. Malgraŭ penado dum multaj jaroj, la meznombra jarproduktokvanto de greno kreskis nur je 3.5%, kaj en 1978 la pokapa kvanto de greno estis nur 318.5 kg., sekve plejparto de la kamparanoj ne povis atingi la minimuman vivnivelon. Tia stato ŝanĝiĝis en la lastaj jaroj. La ŝlosilo de la ŝanĝiĝo estis la

kampara reformado.

La unua paŝo de la reformado estis ĝenerala praktiko de familia laŭkontrakta responsa laborsistemo komencita en 1979, nome disdoni la agrojn al ĉiu familio laŭ kontrakto kaj ŝanĝi kolektivan kultivadon de produkta grupo en familian mastrumadon.

La agroj apartenas ankoraŭ al la kolektivo, sed la kontraktintaj kultivantoj estas memstaraj en la uzo de la agroj. Dekalkulinte la malgrandan agrikulturan imposton, kontingentan grenon kaj kotizon al la necesa komuna akumulo por publika utilo, la kontraktintoj ĝuas la ceterajn rikoltojn, tial la kamparanoj havas grandan entuziasmon en la produktado.

Agronomoj en konsultiĝo





Agronomoj observas bonrasan rizon en eksperimenta kampo.

En la “Ĉiela Regno” Siĉŭan-provinco estas grena gubernio Gŭanghan. Dum la jaroj 1957-1976 la pokapa enspezo de kamparano kreskis ĉiujare je 1.2 jŭanoj, egalaj al la kosto de dek kokovoj. Iom kreskis la produktokvanto de greno, sed pro la tro rapida kresko de la loĝantaro, parto de la kamparanoj de la loko vivis ankoraŭ sub la minimuma nivelo.

En 1977, iu gvidanto de la gubernio iris inspekti kaj rimarkis, ke en iu produkta grupo la agroj estis ŝtele dividitaj al la kamparanoj por kultivado, kaj la produktokvanto de greno kreskis jaron post jaro. Li opiniis tion bona kaj intencis disvastigi la metodon en la tuta gubernio, sed li timis fari eraron. La nuna ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Ĉinio Ĝaŭ Zijang tiam laboris en Siĉŭan kiel la unua sekretario de la provinca partikomitato. Informiĝinte pri la disdono de agroj, li montris grandan intereson. Li diris: “Por kio ni klopodas? Sendube por disvolvi la produktadon kaj altigi la enspezon de la kamparanoj. Vi povas fari provon en unu komunumo kaj poste disvastigi en la tuta gubernio, se ĝi sukcesos. Mi responsos pro via mispaŝo eventuala.” Kaj oni prove praktikis en la komunumo Ĝinju (la nuna Ĝinju-distrikto) la laŭkontraktan responsan laborsistemon. Dank’ al

tio, en la sama jaro la grena produktokvanto de la komunumo kreskis je 2.5 milionoj da kg. En la sekvanta jaro oni disvastigis la sistemon en la tuta gubernio, kaj rapide solviĝis por la kamparanoj la problemo de minimuma vivnivelo.

La sukcesa sperto de Gŭanghan-gubernio estis alte taksata de la Centra Komitato de la partio kaj baldaŭ disvastigita tra la tuta lando. Dank’ al la bazo de la kampa fundamenta konstruado metita en la pasintaj jaroj kaj la subteno de la kamparanoj al la novaj politikoj de la reformado, en la unua jarkvino de la okdekaj jaroj la totala produktokvanto de greno de la tuta lando ĉiujare kreskis je 2.3 milionoj da tunoj, trioble de la meznombra jara pliprodukto en la antaŭaj 30 jaroj.

Dank’ al la unuapaŝa reformado rapide progresis la kamparo, tamen malakordo ekzistis en la agrikultura produktado kaj merkata provizo. Tio rezultigis la duapaŝan kamparan reformadon komencitan en 1985.

La konkretaj metodoj de la dua paŝo estas: La ŝtato ŝanĝis la antaŭajn unuecajn aĉeton kaj vendon de greno kaj aliajn ĉefajn agrikulturajn produktaĵojn en laŭkontraktan aĉeton, nome la greno produktita de kamparano, post dekalkulo de porcio por lia propra bezono, ne estas monopole

aĉetata kaj vendata de la ŝtato kiel antaŭe, sed laŭkontrakte parte aĉetata de la ŝtato, kaj la cetera kvanto de la greno estas libere vendata de li. Samtempe kun tio, la ŝtato reguligis la strukturon de la agrikulturo, disvolvis sub la premiso de stabila kresko de grena produktado diversajn entreprenojn inkluzive de forstumado, bredado de brutoj, kortobirdoj, akvaj vivaĵoj k.a.

La distrikto Fuĉeng de Enping-gubernio de Gŭangdong-provinco havas 2 000 hektarojn da agroj, el kiuj 4/5 estis disponataj por rizo kaj la cetera por manioko. En 1978 la pokapa enspezo de la distrikto estis nur 76 jŭanoj. En 1979 la agroj estis disdonitaj al la kamparanoj, kaj la produktokvanto de greno multiĝis. Oni disponis 1 100 hektarojn da agroj por kultivado de sukerkano, banano, oranĝo, papajo kaj aliaj ekonomiaj plantoj kaj entreprenis fiŝbredadon en nesala akvo. Dum disvolvado de diversaj entreprenoj la agrikulturaj fakoj de la gubernio kaj distrikto helpis la kamparanojn ellabori planon de produktado, liveris al ili semojn, plantidojn kaj necesajn kapitalon kaj teknikon. 9 teknikistoj de la distrikto regule helpis kamparanojn en iliaj lernado de agnomiaj teknikoj, enkonduko kaj asimilo de alilokaj spertoj. En 1985, la unua jaro de la duapaŝa reformado, la meznombra jara enspezo de ĉiu loĝanto en agrikulturo kaj aliaj entreprenoj atingis 1 000 jŭanojn.

Unu el la gravaj celoj por la reguligo de la strukturo de la ĉina agrikulturo estas krei multajn

ŝancojn de labordonado por kamparanoj. 800 milionoj da ĉinoj loĝas en la kamparo kaj tie 370 milionoj da ĉinoj estas laborkapablaj, tamen triono el ili estas superflua. La ĉina registaro instigas la kamparanojn funkciigi industriajn entreprenojn en urbetoj aŭ tiujn de terciara industrio en grandaj urboj. La suda parto de Ĝjangsu-provinco estas relative evoluinta kaj riĉa loko en la delto de Jangzi-rivero. Tie la produktovaloro de urbetoj kaj kamparaj entreprenoj konsistigas 70-80% de la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo de la kamparo en la provinco, kaj 60% de la laboruloj okupas sin per la sekundara kaj terciara industrioj. En 1987 la totala produktovaloro de la kamparo de Ĉinio estis 895 miliardoj da jŭanoj, kies 450 miliardoj estis kreitaj de la urbetoj kaj kamparaj entreprenoj.

La prospero de urbetoj kaj kamparaj entreprenoj ne nur donis laboron al multnombraj superflujaj laboruloj en la kamparo, sed ankaŭ pretigis kondiĉojn por la paŝo-post-paŝa efektivigo de raciaskala administrado de la agrikulturo, por akumuli pli da kapitalo por disvolvo de grena produktado, kaj por senĉese levi agrikulturan produktivecon. Kamparanoj en Ŝunji-gubernio de Pekino memvole fondis 400 familiajn farmejojn, 15% de la kamparanoj de la tuta gubernio kultivis sur 93% de ĝia tuta agraro, kaj evidente altiĝis la nivelo de agrikultura mekanizado. Antaŭe oni bezonis pli ol unu monaton por semado, sed en 1987 oni plenumis tion en nur 10 tagoj. Tiujare la totala produktokvanto de greno de la gubernio kreskis de

Por konservo de greno



300 en 1980 ĝis 435 milionoj da kg.

Dank' al la naŭjara reformado, la totala produktokvanto de greno de Ĉinio en 1987 atingis 400 miliardojn da kg. kaj ĉiu ĉino meznombro posedas ĉirkaŭ 400 kg. Fundamente solvigis la grenan problemo, kiu embarasis Ĉinion dum multaj jaroj. En komparo kun evoluintaj landoj, 400 kg. da greno por ĉiu loĝanto ne estas paradinda cifero, tamen 7% de la agroj de la tuta mondo vivtenas kvinonon de la monda loĝantaro, kio ne povas ne vekti atenton de la mondo.

Dank' al la naŭjara reformado, la kamparanoj suriris la vojon de disvolvo de var-ekonomio. Sed en la progreso aperis ankaŭ problemoj malutilaj al la produktado de greno. Gvidantoj en multaj lokoj koncentris siajn fortojn sur la disvolvon de diversaj entreprenoj kaj kamparaj fabrikoj, neglektante la grenan produktadon. Iuj kamparanoj ne volis resti plu en grenproduktado, trovinte, ke la kamparanoj, okupigantaj pri industrio, neagrikulturaj laboroj kaj kultivado de ekonomiaj plantoj, enspezas pli multe ol tiuj okupigantaj sole pri grenproduktado. Ili turnis sin for de la kampoj, transdonis grenkultivadon al virinoj kaj maljunuloj aŭ simple dezertigis la priresponsatajn kampojn. En la lastaj jaroj la ŝtato reduktis la investon por la agrikulturo, kaj ĝi konsistigis en 1986 nur 3.3% de la totala investo por la fundamenta konstruado. Ankaŭ en multaj lokoj kadukiĝis la konstruaĵoj por kampa irigacio. Reformado de la metodoj aĉeti kaj vendi grenon unuapaŝe ŝanĝis la malnovan situacion de monopolaj aĉeto kaj vendo, tamen ankoraŭ restas malaltaj la prezoj de la ĉefaj agrikulturaj produktoj laŭkontrakte aĉetitaj de la ŝtato, kaj en komparo kun la prezoj de industriaĵoj, la prezoj de la agrikulturaj produktoj estas pli malaltaj, dum draste ŝveliĝis la prezoj de kemia sterko, dizeloleo, insekticido k.a. produktaj rimedoj nepre necesaj por la terkulturistoj, kaj tio pezis la ŝarĝojn al la kamparanoj kaj malbone influis ilian aktivecon en terkulturado. Cetere, la industrioj de la urbo kaj kamparo, la trafiko, la domkonstruado k.a. okupis tre multajn agrojn. De 1981 ĝis 1985, ĉiujare Ĉinio perdis 470 mil hektarojn da agroj, kaj en la lastaj du jaroj Ĉinio perdis plu 670 mil hektarojn da agroj. Malfortaj estas la kamparaj servoj, la kvalito de la kamparanoj kaj la popularigo de agrikulturaj teknikoj.

Pro la supre menciitaj kialoj, la totala produktokvanto de greno malkreskis de 407.3 en la rekorda jaro 1984 al 379.1 miliardoj da kg. en 1985, kaj ĝi releviĝis al 391.1 miliardoj da kg. en 1986 kaj 401.2 en 1987, sed tiu cifero estis sub la nivelo de 1984.

Nemalmultaj problemoj troviĝas en la



Kamparanoj vendas grenon al la ŝtato laŭ kontrakto.

kampara reformado, sed mi opinias, ke tio estas perioda fluktuo en la agrikultura produktado kaŭzita de la merkato, kaj oni ne devas konkludi, ke tio estas atrofio aŭ krizo de la ĉina agrikulturo. Ĉar en la lastaj jaroj la produktokvanto de greno de Ĉinio fundamente fluktuis ĉirkaŭ 400 miliardoj da kg., kaj ne okazis al ĝi granda falo. Aliflanke, influate de klimato kaj aliaj naturaj faktoroj, la perioda fluktuo de leviĝo kaj reduktiĝo de grena produktokvanto estas malfacile evitebla, tute normala, kaj neniu lando en la mondo povas esti escepto tiufanke.

Por Ĉinio, la grena problemo por la miliardo da loĝantoj estas la plej grava afero influanta la tutan situacion. La leviĝo kaj reduktiĝo de grena produktado en la lastaj jaroj jam vekis sufiĉan atenton de la registaro.

Ĉinio planas produkti 410 miliardojn da kg. da greno kaj levi la kvantojn de aliaj agrikulturaj produktoj en 1988. Por tio la agrikulturaj departementoj de Ĉinio klopodos por la jenaj laboroj:

Profundigi la reformadon, daŭre perfektigi la familian laŭkontraktan responsan laborsistemon, rapidigi la reformadon de la prezaro de agrikulturaj produktoj, iom post iom forigi la ĉefajn faktorojn obstrukcantajn disvolviĝon de la agrikulturo, reguligi kelkajn rilatojn koncerne al la agrikultura disvolviĝo, nome, rilaton inter la prezoj de industriaĵoj kaj agrikulturaj produktoj, rilaton inter diversaj produktaj branĉoj kadre de agrikulturo,

rilaton inter urbataj kaj kamparaj industrioj kaj agrikulturo, rilaton inter produkto kaj vendo, kaj rilaton inter la en- kaj eksterlanda komerco.

Rezolute bremsi la ŝveligon de prezoj de agrikulturaj produktaj rimedoj. Por moderigi la streĉitecon en livero de agrikulturaj produktaj rimedoj, la ŝtato decidis preni la disvolvon de kemisterka industrio kiel strategian problemon, kaj planas produkti en 1990 cent milionojn da tunoj da kemia sterko.

Ĉi-jare la ŝtato multigos la investon por agrikulturo. Krom miliardo da jŭanoj kiel ekskluziva helpo de la industrio al la agrikulturo kaj miliardo da jŭanoj kiel senintereza pruntedono al la malriĉaj lokoj, la ŝtato asignos al la agrikultura produktado ankaŭ la imposton super la agroj de neagrikulturaj uzoj. Cetere, Ĉinio uzos kapitalojn liveritajn de la Monda Banko, Monda Nutraĵo-programo, Internacia Fonduso por Agrikultura Disvolviĝo k.a.

Ĉinio daŭre donos sufiĉan atenton al la grenaj bazoj kaj eksperimentaj regionoj de agrikultura modernigo. Ĉinio havas 110 bazojn de greno, 72

bazojn de kotono kaj 122 bazojn de brutoj kaj kortobirdoj, ĉiuj bazoj devas liveri pli da bonkvalitaj agrikulturaj produktoj. Cetere, Ĉinio establis 10 eksperimentajn regionojn por la agrikultura reformado en ekonomie evoluantaj lokoj, por trovi la vojon de raciaskala administrado de la kampara tero kaj agrikultura modernigo en tiuj lokoj, kaj kreskigi la hektaran produktokvanton de greno je dekon.

La disvolviĝo de agrikulturo dependas de avangarda agronomia scienco kaj tekniko kaj ankaŭ la altigo de la kvalito de la kamparanoj. La agrikulturaj departementoj de Ĉinio donis grandan zorgon al tiu laboro. En la pasintaj 3 jaroj en multaj lokoj oni establis scienc-teknikajn kursojn por 12.7 milionoj da kamparanoj. Se oni ĝeneraligos la nunajn normalajn teknikojn, la hektara produktokvanto kreskos je 750-1 500 kg. Nun la agrikulturaj departementoj jam ellaboris kaj ellaboras pliajn politikojn por kuraĝigi sciencistojn kaj teknikistojn fari kontraktitajn servojn en la kamparo por plej rapide disvastigi la nunajn praktikajn teknikojn en la agrikultura produktado kaj turni la fruktojn de scienca esplorado en realan produktivecon. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 28-j. oficisto dez. kor. kun geesperantistoj tm. pri diversaj temoj kaj interŝanĝi librojn, gazetojn kaj poŝtmarkojn. Adr.: Shao Qinghai, Habaga Zonghechang, Zhenglanqi, Neimenggu, Ĉinio.

* 28-j. instruisto dez. kor. tm. pri eduko, turismo, literaturo kaj komerco, kaj interŝanĝi ties E-materialojn. S-ro Xiong Linping, Aimin Chang Erqu, Dean, Jiangxi, Ĉinio.

* Dez. kor. kun tutmondaj geesperantistoj pri ĉiuj temoj, kaj interŝanĝi E-librojn. Liu Jianguo, Fuyang Shiyuan Jiaowuchu, Anhui, Ĉinio.

* Mi dez. kor. kun geesperantistoj, interŝanĝi librojn kaj konsulti unu al alia malfacilan demandon en fotografio. Adr.: Xu Hongchen, 100039 Xin Xiang, Zhong Xing Dian Ji Chang, Xingzhengke, Shi Jing Shan Qu, Beijing, Ĉinio.

* Dez. kor. kun amato de belarto, precipe el Pollando, Aŭstralio kaj Francio kaj interŝanĝi Esperantajn librojn kaj gazetojn. Adr.: Zhang Aiyu, 100026 Xin Xiang, Zao Zi Ying Yi Yong Ya Suo Ji Chang Xing Zheng Ke, Nongzhanguan lu, Beijing, Ĉinio.

* 25-j. studento dez. kor. kun geamikoj de la mondo, aparte junuloj, interŝanĝi pm. pk. bk. alumet-etikedojn E-tajn kaj aliajn, diskutas kun junuloj pri Esperanto. Adr.: Cao Pinaro, Ruzilu 25 hao, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio.

* E-kursanoj dez. kor. tm. kaj interŝanĝi diversajn E-librojn, muzikkasetojn, konojn kaj spertaĵojn pri niaj landoj. Skribu al: Humto Mayor, AA 11945, Bogoto, Kolombio.

* Uvis Blums, 15-j. knabo, gimnaziano, latvo laŭ nacieco, volonte kor. tm. precipe kun ĉinaj kaj japanaj esperantistoj, interesiĝas pri muziko, sporto, sporta medicino,

kaj pri psikologio, kolektas etajn kalendarojn. Aĝo kaj sekso de korespondamikoj ne gravas. Adr.: USSR - 229570, Dundaga, 1. Maija str. 2 - 18, Latva SSR.

* Elmar Virkavs, 37-j. latvo, serĉas diversajn leteramikojn el Ĉinio. Sekso ne gravas. Interesiĝas pri E-movado, monda literaturo kaj kulturo, kolektas bk. librojn. Adr.: USSR - 229570, Dundaga, Oktobra str. 1-14, Latva SSR.

* Ĉefaj geinfanoj (9-10-j.), gekursanoj kaj klubanoj (15-60-j.) de E-klubo ĉe kultura centro en urbo Nahod, dez. kor. kun ĉinaj gesanoj. Adr.: František Molik, Nový Svět, 269, CS 547 01 Nahod, Ĉeĥoslovakio.

* 12 gelernantoj (18-j.) de gimnazio dez. kor. tm. kun samaĝuloj pri ĉiuj temoj. Skribu al: Nes videregaende skole, N-2150 Arnes, Norvegujo.

* 24-j. studento de Varsovia Agrikultura Universitato pri ekonomio de agrikulturo kaj esp-isto dez. fari studentan praktikon eksterlande de julio '88 dum 3 sekvontaj monatoj. Ankaŭ konas anglan kaj germanan lingvojn. Roman Bura, Ul Krochmalna 3/119, PL-00-864 Warszawa, Pollando.

Maltrankvilo pri la loĝantaro

Bridi pliigon de la loĝantaro restas peniga tasko por la miliardo da ĉinoj. Hodiaŭ, kiam la ekonomia reformo akiris unuapajajn sukcesojn, la serioza problemo pri loĝantaro fariĝis pli evidenta, ĉar rapida dilatiĝo de la loĝantaro serioze malhelpas la ekonomian disvolviĝon kaj eĉ nuligos la fruktojn de la ekonomia disvolviĝo.

En 1986 kaj 1987 la ĉina loĝantaro plimultiĝis je 21 milionoj kaj 22 milionoj respektive, la jara naskokvanto superis 2 %, sed en 1985 ĝi estis 1.78 %.

Koncernaj specialistoj asertis: Se daŭros la nuna kresko, la loĝantaro de Ĉinio almenaŭ atingos 1.28 miliardojn en 2000 kaj multe superos la celon de la ĉina registaro bridi kreskon de la loĝantaro je 1.2 miliardoj en la fino de la 20-a jarcento.

Ĉinio, kiel lando kun plej multnombra loĝantaro en la mondo, komencis praktiki naskolimigon tro malfrue. Kvankam iuj akrevidaj personoj prezentis la problemon pri naskolimigo jam en 1954, tamen ĝi ne vekis meritatan atenton. En la sekvaj 20 jaroj, kvankam tiu problemo estis plurfoje prezentita, tamen ĝi neniam estis serioze traktita.

En 1973 la ĉina loĝantaro nombris jam proksimume 900 milionojn. Tiel multaj loĝantoj formis ĉiam pli grandan premon al la tre postiĝinta ekonomio de Ĉinio. Ĉar la kresko de loĝantaro multe superis la kreskon de la ekonomia disvolviĝo, aperis


seriozaj malfaciloj en provizado de vestoj, nutraĵoj kaj loĝejoj, veturado, edukado, higieno kaj aliaj kampoj de la socia vivo. Neniu povis eviti la konsekvencon de la senbrida pliigo de loĝantaro en la pasintaj 20 jaroj.

En 1973 la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio oficiale metis la laboron bridi la loĝantan kreskon en la jaran planon kaj kvinjaran planon pri la nacia ekonomia disvolviĝo, kaj alprenis rimedojn por konigi al la tuta popolo la gravan signifon de naskolimigo, disvastigi naskolimigon kaj kontraŭkoncipiĝo. Tio efikis certgrade. La naskokvanto en la tuta lando reduktiĝis al 2.9%, unuafoje malpli ol 3%.

En 1979 la Ŝtata Komisiono pri Naskolimigo de Ĉinio proponis al naskipovaj geedzoj de la tuta lando havi nur unu infanon. Poste la ĉina registaro definitive proklamis, ke naskolimigo estas unu el la fundamentaj naciaj politikoj.

Post la 10-jara penado la naskolimiga laboro jam disvolviĝis en la tuta lando kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. Laŭ statistiko, de post la 70-aj jaroj en Ĉinio la naskokvanto malpliĝis je ĉ. 200 milionoj. Ĉiu naskipova virino meznombre naskis 5.87 fojojn en la 50-aj jaroj kaj 2.3 fojojn en la 80-aj jaroj. En la tuta lando 30 milionoj da naskipovaj geedzoj promesis ne havi duan

Patrino kaj infano





Konsultiĝa aktivado pri eŭgeniko

infanon.

Kvankam estas rimarkindaj la sukcesoj de naskolimiga laboro, tamen la nuna stato de la ĉina loĝantaro estas maltrankviliga. La naskolimigado alfrontas malfacilojn unu post alia. La plej malfacila problemo troviĝas en la kamparo, kie vivas 800 milionoj da ĉinoj, inkluzive de ĉ. 200 milionoj da naskipovaj virinoj.

Laŭ statistiko, en la lastaj jaroj la duaj naskitoj konsistigis 31.5 % de la totala nombro de la novnaskitoj, la triaj kaj pliaj 17.3 %. Kaj ili plejparte naskiĝis en la kamparo. Enketo montris, ke la propono naski nur unu infanon ne estis varme aprobita en la kamparo. En la kamparo estas tre malmultaj familioj kun solinfano, pli multe da familioj havas du infanojn. Kompreneble ne estas tre granda la proporcio de tiuj familioj, kiuj havas tri aŭ pli multajn infanojn.

La obstakloj por naskolimigo en la kamparo devenis unue de la malnova tradicia koncepto, kiu jam profunde enradikiĝis ĉe kamparanoj. Ili opinias, ke nur filo povas daŭrigi ilian familion. Se la unua naskito estas ina, la

geedzoj do plu naskos ĝis kiam ili havas virbebon. Kvankam tiu koncepto estis kontinue kritikata dum la pasintaj dekoj da jaroj, tamen influate de la kutima forto, ĝis nun ĝi ankoraŭ havas profundan influon al la ĉinaj kamparanoj kaj estas la ĉefa ideologia obstaklo por disvolvi la naskolimigadon en la kamparo.

La produkta nivelo en la kamparo de Ĉinio estas malalta, kio estas alia grava kaŭzo de malfacila disvolvo de la naskolimiga laboro. Nun la agrikultura produktado estas farata ĉefe per fizikaj fortoj de la homoj, tial kamparanoj deziras havi pli da infanoj, precipe filojn. Tio estas por ili efektiva ekonomia bezono.

En la 80-aj jaroj, en la kamparo de Ĉinio oni praktikis laŭkontraktan respondecan produktadon. Tiu reformo konformas al la nuna produkta nivelo de la kamparo kaj akcelis agrikulturan disvolviĝon. Sed la nova ekonomia politiko ne reduktis la deziron de kamparanaj familioj pri laboruloj. Tio malhelpas la naskolimigon. Por solvi tiun kontraŭdiron, diverslokaj registaroj alprenis politikojn favorajn

al tiuj kamparanoj kun solinfano, en kapitala kredito, provizo je produktaj materialoj, lernado de iliaj infanoj k.a. por laŭdi ilin. Sed tia helpo estas malgranda, ne povas solvi malfacilojn de pli multaj familioj. Daŭre ekzistas la kontraŭdiro inter la naskolimigo kaj la deziro pri laborfortoj kaj estas tre peniga la naskolimiga laboro en la kamparo.

Estas maltrankvilige, ke Ĉinio iras al nova kulmino de naskado. En 1962-1972 aperis naskotajdo. En tiuj 10 jaroj la kresko de loĝantaro troviĝis en natura stato, kaj la naska procentaĵo atingis 3.3 %. Laŭ prikalkulado, ĉiujare en la venontaj 7-8 jaroj 11 milionoj da ĉinaj junulinoj atingos edziniĝan kaj naskipovan periodon kaj pliiĝos ĉ. 20 milionoj da homoj ĉiujare. Kaj tiu stato daŭros ĝis 1995.

Tiuj mirigaj ciferoj kaj kreska tendenco sendube estas severa defio por la ĉinaj registaro kaj popolo. Nun oni jam vidis la malfacilojn kaŭzitajn de la natura loĝantara dilatiĝo en la pasintaj jaroj, kaj ankaŭ antaŭsentis la minacon de la nuna loĝantara dilatiĝo al Ĉinio en la estonteco.

Ĝuste pro tio la ĉina registaro refoje anoncis, ke naskolimigo estas fundamenta nacia politiko de Ĉinio, kaj alvokas al la tuta popolo, ke ĉiu geedza paro havu nur unu infanon.

La Ŝtata Komisiono pri Naskolimigo de Ĉinio okazigis tutlandan kunvenon, en kiu oni diskutis tiun severan situacion kaj esploris pri novaj kontraŭrimedoj. Koncernaj esploraj institucioj faras profundan esploron pri loĝantara strukturo, ĝia plimaljuniĝo, teorio pri loĝantaro kaj antikoncepigo por efike solvi la loĝantan problemon de Ĉinio.

Kian rezulton atingos la supre menciitaj penoj? Ĝi vidiĝos post sufiĉe longa tempo. Tial, en tiu longa tempo, loĝantara problemoj ĉiam maltrankviligos la ĉinojn. ■



Mekanizita irigacia
sistemo

En sezono de rikolto

La riĉa Sanĝjang- ebenaĵo


Fotoj de GAŬ MINGJI kaj JANG ŜIŬJUN

En la orienta parto de Hejlongĝjang-provinco de Ĉinio kunfluas tri riveroj Hejlong, Songhŭa kaj Usuli, kaj la loko estas nomata Sanĝjang-ebenaĵo ("san-ĝjang" signifas "tri riverojn"). La ebenaĵo limiĝas per la Malgranda Ŝing'an-montaro en okcidento, Usulirivero en oriento, Hejlong-rivero en nordo kaj Ŝinkaj-lago en sudo. La loko estis dezerta sovaĝejo frekventata nur de bestoj kaj migraj birdoj.


La ebenaĵo tenas en si multajn naturajn riĉaĵojn. La vasta fekunda tero, abunda akvo kaj granda marĉejo estas utiligeblaj. La arbaroj liveras lignon, kaj la vastaj herbejoj favoras al paŝtado.

La ebenaĵo havas grandajn kultivejojn moderne ekipitajn, kiuj liveras al la ŝtato grandan kvanton da greno kaj bonkvalitaj sojfaboj.






Por kulturi virgan teron



Piroj devenintaj de Hokajdo



Sovaĝaj vinberoj, bona materialo por vino

Bonkvalitaj orelfungoj en arbaro




RARAJ HISTORIAJ OBJEKTOJ DE ĜJANGŜJI- PROVINCO

Teksto de ĜANG JUHŬA
Fotoj de ĜAŬ KEMING



Porcelana pavilonforma tenejo

Celadonverda poto kun kovrilo en formo de lotusfolio




Celadonverda porcelana ĉevalbredisto



En la lastaj 40 jaroj, en Ĝjangŝji-provinco ĉe la malsupra baseno de Jangzi-rivero, oni trovis dekojn da antikvaj ruinoj kaj tombejoj kaj centojn da ruinoj de antikvaj bakuloj, elterigis multajn bate faritajn ŝtonpecojn de paleolitiko, argilaĵojn de neolitiko, bronzaĵojn de Ŝang-dinastio (ĉ. 16-a jc. — 11-a jc. a.K.) kaj Ĝou-dinastio (ĉ. 11-a jc. — 256 a.K.), delikatajn fajencaĵojn, porcelanaĵojn, oraĵojn, arĝentaĵojn kaj jadaĵojn de diversaj dinastioj, inter ili estas nemalmultaj raraj trezoroj.

ELEGANTAJ BRONZAĴOJ

Antaŭe oni sciis nur, ke la baseno de la Flava Rivero estas la lulilo de la ĉina nacio, sed ne sciis, ke ankaŭ la baseno de Jangzi-rivero estas la origina loko de la ĉina nacio. Nun, la muld-ruinoj de bronzaĵoj kaj la delikataj bronzaĵoj de Ŝang-dinastio malkovritaj en la regiono sude de Jangzi-rivero ŝanĝis la malnovan konon de homoj kaj turnis ilian atenton al la baseno de Jangzi-rivero. Multaj delikataj bronzaĵoj elterigitaj en la ruino de Ŝang-dinastio en Uĉeng de Ĝjangŝji estas kompareblaj kun tiuj elterigitaj en baseno de la Flava Rivero. Ekzemple, la bronza *ding*-o (tripiedo) de Ŝang-dinastio kun tigroformaj teniloj kaj plataj bestoformaj piedoj, elterigita en Ĉingĝjang-gubernio en 1975, havas delikate mulditajn desegnojn kaj strangan formon. La bronza *ĝia*-o (antikva ĉina vinvarmigilo) de Ŝang-dinastio kun bestokapaj strioj, elterigita en Uĉeng en 1973, estas tre simila en formo kaj stilo al tiu elterigita en la baseno de la Flava Rivero. Oni elterigis ankaŭ tie brile akran bronzan lancon kun delikataj strioj. En 1985 en Sujĉŭan-gubernio de Ĝjangŝji, oni elterigis brile nigran bronzan *joŭ*-on (antikva ĉina vinujo) en plata ovala formo, kun mallonga kolo kaj granda ventro kaj kovrilo, ene sur ĝia ventro kaj ene sur ĝia kovrilo estas epigrafoj. Ili estas




Bronza vinujo kun tenilo

raraj bronzaĵoj de Ŝang-dinastio. En Sujĉŭan-gubernio de Ĝjangŝji oni elterigis ankaŭ bronzan *ge*-on (lanco kun vertikala klingo) kun epigrafo de Ĉin-dinastio (221-207 a.K.), ĝi estas historia pruvo pri la milita aktivado de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio en la suda Ĉinio por unuigi Ĉinion.


Krom la bronzaĵoj de Ŝang- kaj Ĝou-dinastioj, oni elterigis en Ĝjangŝji ankaŭ delikatajn bronzaĵojn spegulojn de diversaj dinastioj post la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). Ekzemple, en 1977 oni elfosis el tombejo de la Okcidenta Han-dinastio en Pingŝjang bronzan diafanan spegulon kun diametro de 7 cm. kaj pezo de 55 gramoj, sur ĝia dorso estas epigrafo "videbla sub sunlumo". Krom la spegula funkcio ĝi havas ankaŭ alian strangan funkcion, ke

sub la sunlumo kaj centrita lumo, ĝia epigrafo povas speguliĝi en la blanka muro. En 1979, sur la Drak-Tigra Monto en Gujŝji-gubernio, fama sanktejo de taŭismo (unu el la ĉefaj ĉinaj religioj), oni elterigis taŭisman bronzan spegulon de Song-dinastio (960-1279), sur ĝia dorso troviĝas desegno de 35 steloj, kiuj simbolas la Grandan Ursinon kaj aliajn. Tia spegulo malofte troveblas en la tuta lando. Ĝi estas valora materialo por esplori la doktrinon de taŭismo.

En 1982, oni elterigis en Anji-gubernio de Ĝjangŝji bronzan kompletan ĉinan ŝakon kun 32 bone konservitaj ŝakpecoj, ĉiu kun diametro de 3.8 cm. kaj diko de 0.7 cm., kio faris sensacion en la arkeologiaj kaj sportistaj rondoj. Sur la fronto de la ŝakpecoj estas



Bronzaj ŝakpecoj



La dorsa flanko de taoisma bronza spigulo

ideogramoj kaj sur la dorso desegnoj. Tiu malofta bronza ŝako de Song-dinastio estas enlande valora materialo por esplori la strukturon de la ĉina ŝako.

BUNTAJ FAJENCAĴOJ KAJ PORCELANAĴOJ

Ĝjangŝji estas la hejmloko de la ĉinaj fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj. La antikvaj bakujoj troviĝas tra la tuta provinco, oni jam elterigis dekmilojn da fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj de diversaj dinastioj. La rondfunda fajenca poto antaŭ 8 000-9 000 jaroj, elterigita en la ruino de la Fea Kaverno de Ŭannjan-gubernio, estas la plej frua fajencaĵo trovita en Ĉinio. La primitiva celadonverda porcelana *doiŭ-o* (antikva manĝaĵa vazo) kaj la primitiva celadonverda porcelana poto, elterigitaj en la ruino de Ŝang-dinastio en Ĉingĝjang kaj Ŭceng, estis bakitaj el kaolino en temperaturo de pli ol 1 200°C. Enlande estas malofte videblaj tiaj primitivaj porcelanaĵoj antaŭ pli ol 3 000 jaroj.

Post Song-dinastio, pli prosperis la produktado de fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj. Kaj ĉie estis bakujoj. Oni multe produktis maldikajn celadonverdajn porcelanaĵojn.

En 1983 oni elterigis en Tongŝan-gubernio de Ĝjangŝji celadonverdan vinvarmigan porcelanan kruĉon, kun glazuro kristala kaj diafana. Ĝi surhavas gravuritajn striojn de lotus-floraj petaloj, kun sidanta leono skulptita sur la kovrilo. Estas originala ankaŭ la celadonverda porcelana kapkuseno, sub ĝia iomete konkava malsupra parto gravuriĝis luktantaj drako kaj tigro. En Ĝjiĝoŭ estis famaj bakujoj de porcelanaĵoj de Song-dinastio, la nigre glazuritaj bovloj kun strioj de frankolino, bovloj kun strioj de tri feniksoj, bovloj kun strioj de arbofolioj, potoj kun koloraj strioj de galopanta cervo k.a. nun ankoraŭ havas grandan artan ĉarmon.

En Jŭan-dinastio (1271-1368) Ĝingdeĝen de Ĝjangŝji la unua produktis ĉinajn kolore desegnajn kaj ruĝglazurajn porcelanaĵojn — la bludesegnajn kaj ruĝglazurajn porcelanaĵojn. En 1980 oni trovis en Gau'an-gubernio de Ĝjangŝji subteran konservejon de Jŭan-dinastio, el kiu oni elterigis pli ol 200 porcelanaĵojn, inter ili estas porcelanaj florumoj kun ume-floraj bludesegnoj kaj grandaj potoj kun bludesegna kovrilo en

lotus-folia formo kaj blue desegnitaj per belaj strioj de drako. Alia glazure ruĝa porcelanaĵo *ji-o* (antikva ĉina lavovazo) kun desegnaĵo de sovaĝa ansero, estas tre viveca kaj ĉarma. En 1975 oni elterigis en Ĝiŭĝiang de Ĝjangŝji pagodforman bludesegnan vazon kun kovrilo, produktitan en 1319, kiu estas la plej frua bludesegna porcelana vazo de Jŭan-dinastio ĝis nun trovita. En 1972 oni elterigis en Ĝingdeĝen ruĝglazuran porcelanan scenejon en formo de pavilono, kun supren levigantaj tegmentaj anguloj, balustrado kaj aktoroj en malsamaj esprimoj. Sur ĝia dorso estas epigrafo kaj noto, ke ĝi estas farita en 1338. Samtempe elterigis du glazure ruĝaj porcelanaj homfiguroj kaj poto de Jŭan-dinastio kun pagodforma kovrilo kaj kvar bonaŭguraj animaloj. Tiuj kvar porcelanaĵoj de Jŭan-dinastio estas valoraj historiaj objektoj.

En la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Ĉing (1644-1911), pompe prosperis la produktado de porcelanaĵoj en Ĝingdeĝen, sen nombraj delikataj porcelanaĵoj konserviĝis kaj multaj estas rezervitaj en Ĝjangŝji. ■

Zensto — entuziasma semanto de Esperanto

Ĉinio havas multe da veteranaj esperantistoj, kiuj en sia juneco diligente lernis kaj disvastigis Esperanton kaj samtempe entreprenis progresajn aktivadojn per Esperanto. Ili faris kontribuon al la Esp-movado kaj la revolucia afero de la ĉina popolo kaj estas respektataj. Unu el ili estas Zensto.

En 1930 li komencis lerni Esperanton. Tiam lia patro lernis en la Koresponda Esp-kurso funkciigata de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio (ŜEA), ankaŭ Zensto lernis Esperanton kun sia patro kaj havis grandan intereson.

Tiam li legis propagandaĵojn pri Esperanto verkitajn de esperantisto Hujucz, kaj ankaŭ Esperantajn librojn kaj gazetojn. Lia kapablo verki kaj paroli Esperante plialtiĝis senĉese, sekve li komencis korespondi en Esperanto kun Hujucz, Bakin, Ĝang Ĉjiĉeng kaj aliaj eminentuloj.

Samjare, li laboris kiel redaktisto de ĵurnalo en Ŝanhajo. Por ke pli multe da personoj konu la Internacian Helpan Lingvon, li malfermis la rubrikon "Esperanta Kroniko" en la ĵurnalo por publikigi artikolojn pri Esperanto. Li kompilis lerno-libron "Esperanto: Dek Lecionoj" kaj disvastigis Esperanton en Ŝanhajo kaj Suĝoŭ. Tio havigis al li ŝancon konatiĝi kun multaj junuloj amantaj Esperanton.

En 1931, kiam li laboris en Ŝanhajo, li kaj memlernis kaj instruis Esperanton. En biblioteko de sia hejmloko Suĝoŭ li funkciigis

dimanĉan Esp-kurson. Ĉiun sabaton li veturis de Ŝanhajo al Suĝoŭ por doni lecionon. Tiutempe Hujucz, kiu ĵus revenis la patrolandon post vizito de Sovetunio, invitive de Zensto k.a., faris raporton pri la ekonomia konstruado kaj Esp-movado de Sovetunio. Finraportinte, li diris: "Se vi volas lerni Esperanton, vi povas vin anonci ĉe la biblioteko antaŭtagmeze de dimanĉo, tie funkcias Esp-kurso." Post tio, la nombro de lernantoj en la Esp-kurso atingis 100, kiu estis mirinda tiutempe.

Ankaŭ en la sama jaro, li, Hujucz, Ĝang Ĉjiĉeng kaj aliaj organizis la progresan organizon — la Ĉinan Proletan Esperantistan Union. Kaj li estis elektita kiel gvidanto de esplora sekcio de la unio. En kunveno por propagandi la kontraŭjapanan batalon por savi kaj liberigi la nacion, lia parolo vekis atenton de la reakciaj aŭtoritatoj. Li devigite ŝanĝis sian laboron kaj laboris en urbeto de Jangĝoŭ. Baldaŭ li

funkciigis tie Esp-kurson. Samtempe li kun lokaj progresaj personoj faris kontraŭjapanan kaj nacisavan aktivadon. Post nelonge, lia agado estis spionata. En 1933 li estis enkarcerigita kaj post unu jaro estis liberigita. Antaŭ la elkarceriĝo la reakciaj aŭtoritatoj minacis lin, dirante: "Nia pistolo sekvos vin, se vi denove faros tian aktivadon." Tamen post la elkarceriĝo li aktivis en Esperantaj rondoj kiel kutime. Li ĉiam ĉeestis Esperantajn prelegadon kaj ekspozicion de Ŝanhajo kaj diversajn Esperantajn aktivadojn de Suĝoŭ kaj Jangĝoŭ. Pere de Esperanto li trovis grupon da sinceraj amikoj kaj poste li estis refoje enkarcerigita, implikite de sia amiko.


En Jangĝoŭ, li ankaŭ kuraĝigis gejunulojn fari internacian korespondon, krom instruado de Esperanto al ili kaj interŝanĝo de lernosperto kun esperantistoj. Li mem longe korespondis kun ruso en Esperanto por lerni la rusan lingvon. Rekomendite de loka esperantisto, li funkciigis Esp-

S-ro Zensto (staranta) parolas en la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto.





S-ro Zensto (sidanta) kaj liaj lernantoj



S-ro Zensto (sidanta) kaj junaj esperantistoj

kurson en la 5-a mezlernejo de Jangĝoŭ. Post finiĝo de la lernado la kursanoj starigis la Jangĝoŭ-an Esperanto-Asocion, kiu estas la plej frua Esp-organizo de Jangĝoŭ.

En 1937, la Suĉua (Suĝoŭ-a) Esperanto-Asocio estis detruita kaj la milito alproksimiĝis al la urbo Suĝoŭ. Zensto devis transloĝigi siajn familianojn en Jangĝoŭ provizore. Poste la milito etendiĝis al Jangĝoŭ, li transloĝigis la tutan familion al Ĉangŝa de Hunan-provinco. Tie laboris liaj Esperantaj amikoj Torĉ k.a.

Nelonge post kiam li atingis Ĉangŝa, li kune kun Torĉ starigis esperantistan ligon kaj funkciigis Esp-kurson. Poste, li estis invitita al Mingŭo-universitato en Ĉangŝa por instrui Esperanton. Li kaj Torĉ kune verkis artikolojn pri Esperanto por Radio Ĉangŝa. Krome, li ankaŭ aktoris kaj verkis dramojn. Tial li ĝuis grandan influon en la loko.

En 1945, Zensto laboris en Hengjang de Hunan-provinco kaj funkciis kiel estro de la elementa lernejo por gefiloj de oficistoj kaj laboristoj de la telekomunika buroo. Tie li protektis iujn progresajn esperantistojn. Ekz., kiam fama esperantisto Ĵelezo estis spionata survoje al Hong-kongo, Zensto loĝigis lin en sia hejmo kaj skribis por li ateston. Dank' al tio Ĵelezo evitis

pridemandon de la malamikoj.

Post unu jaro Zensto venis al Ĉongĉing kun la telekomunika buroo. Baldaŭ li funkciigis Esp-kurson en sia buroo kaj sinsekve gvidis Esp-kurson de Ĉongĉing. Tiujare, Ĉongĉing starigis Esperanto-asocion kaj Zensto estis elektita kiel ĝia estro. Tiutempe la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio estis tre vigla, ofte okazigis kunsidon, diskutadon, prelegadon kaj ankaŭ invitis alilandajn esperantistojn konigi la Esp-movadon en siaj landoj kaj travivaĵojn en Ĉinio.

En 1952, Zensto eklaboris en la Ĉina Esperanto-Ligo kaj funkciis kiel ĝia sekretario. Li okupiĝis pri korespondo kun en- kaj eksterlandaj Esperantaj organizaĵoj kaj individuoj kaj pri Esperanta tradukado.

De 1964 ĝis 1969, Zensto okupis sin pri korespondo kaj tradukado en la redakcio de EPĈ. Li laboris serioze kaj devokonscie, kun entuziasmo kulturis gejunulojn kaj helpis ilin altigi sian laborkapablon.

Ekde 1964 li donis konversacian lecionon al la Esperanto-kurso de la Pekina Radio-instituto, kiu daŭris unu kaj duonan jarojn. Liaj studentoj diris, ke Zensto parolas Esperante tre flue kaj havas riĉan instruan sperton. Asociante Esperantaj vortoj kun la ĉiutaga vivo kaj stato de studento, li

instruis vigle kaj absorbite, ke la studentoj facile kaptis lernitaĵojn. Li ofte diris al siaj studentoj: "Antaŭ ol lerni Esperanton, vi devas ami ĝin kaj havi sindonemon same kiel Zamenhof." Post la diplomiĝo tiuj studentoj laboras en la Esperanta Sekcio de Radio Pekino, la redakcio de EPĈ k.a. kaj multaj el ili fariĝis ĉefaj fortoj en la Esperanta laboro.

Zensto okupis sin per Esperanta laboro jam 50 jarojn. Ĉie, kie li laboris, li semis Esperantan verdan semon. Preskaŭ ĉiutage li ricevas leterojn de aliaj lokoj. Iuj junuloj venis al li de tre malproksime speciale por viziti lin — nian Esperantan veteranon.

Zensto estas 83-jara, li ankoraŭ zorgis pri Esperanto. Eĉ en malsanul-lito li ankoraŭ legis leterojn senditajn de esperantistoj el diversaj lokoj de Ĉinio. Li letere respondis la malfacilajn demandojn de tiuj, kiuj konsultis lin pri ili.

Dum la pasintaj kelkdek jaroj Zensto senlace laboris por Esperanto kaj entuziasme disvastigis ĝin. Li estas respektata de multaj esperantistoj de Ĉinio. En 1985, kiam li 80-jariĝis, esperantistoj de Hŭangŝi de Hubej-provinco sidis ĉirkaŭ la granda naskiĝtaga torto kaj ekbruligis 80 ruĝajn kandelojn por celebri la 80-an datrevenon de lia naskiĝo kaj esprimi al li respekton kaj bondezirojn. ■

La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Jam komence de la nuna jarcento la fervojistoj — pro sia profesio ĉiam aganta internacie — ekkonis la valoron de la internacia lingvo Esperanto por la lim-transpasa trafiko kaj por kontaktoj inter kolegoj de diversaj fervojoj. Tio kondukis al fonda de la Internacia Asocio de la Esperantistoj-Fervojistoj en 1909.

La du mondmilitoj kaj la persekutoj fare de diversspecaj reĝimoj detruis multon, sed ne ĉion, tiel povis refondiĝi la nuna IFEF la 4-an de aŭgusto 1948. Kontraŭe al pli fruaj formoj, kiam ĝi dependis de sindikatoj, la nuna IFEF estas sendependa kun strikte demokrata strukturo. Laŭ ĝia statuto la decida organo estas komitato, konsistanta el delegitoj de la landaj asocioj — 18 en Eŭropo, unu en Japanio kaj plej nove en Ĉinio. La kvinkapa internacia estraro plenumas la decidojn de la komitato.

Kiel faka federacio ĝi klopodas atingi rezultojn ĉefe sur faka tereno, t.e. en la kadro de fervojaj kompanioj, fervojistaj organizoj kaj sindikatoj, kaj kompreneble krei rektajn kontaktojn inter fervojistoj de diversaj landoj. Tio estas aparte interesa, ĉar la "fervojista popolo" reprezentas dekojn da "profesioj" en komerca, funkcia, administra kaj multaj teknikaj fakoj. Sekve ankaŭ iliaj specialaj fakaj vortoj (terminoj) estas scienco por si mem.

Laŭ la celoj, fiksataj en la organiza statuto, IFEF starigis laborplanon, el kiu ni jen traktu kelkajn gravaĵojn. Ĝi diferencigas la taskojn laŭ tri niveloj, nome

taskojn de la federacio, de la landaj asocioj kaj de komisionoj.

a) Federaciaj taskoj

Unu el la plej gravaj taskoj estas ligi kaj flegi kontaktojn kun fervojaj aŭtoritatoj kaj gvidantoj, kun fervojistaj organizoj, ĉefe kulturaj kaj libertempaj. Tio validas i.a. por rilatoj al la speciala "Internacia Federacio de Kultur-flegantaj Fervojistoj" (FISAIC), en kiu estas organizitaj dekmiloj da ĉefe eŭropaj fervojistoj, ekz. kantistoj, muzikistoj, filatelistoj, radio-amatoroj, fotistoj, folkloraj grupoj ktp., sed ankaŭ la esperantistoj. Celo de ĉiuj tiuj kontaktoj estas informi tiujn ne-esperantistajn organizojn kaj personojn pri la Internacia Lingvo

kaj la agado de la fervojistaj esperantistoj. Unu el la plej gravaj rimedoj ĉi-rilataj estas la ĉiujaraj internaciaj kongresoj, kiuj donas multajn eblecojn informi la vastan publikon kaj la fervojajn aŭtoritatojn.

Alia kaj tute ne malgrava tasko estas la kontakto al la Universala Esperanto-Asocio, kies plej forta aliĝinta faka asocio estas IFEF. Ofte fervojistoj kunlaboras en LKK-oj de universalaj kongresoj kaj en la organiza strukturo de UEA.

Unu membro de la IFEF-estraro, la redaktoro, zorgas pri aperigo de 6 numeroj ĉiujare de la IFEF-organo "Internacia Fervojisto" kun jara paĝonombro de 80

Eldonaĵoj de diverslandaj fervojistaj Esperanto-organizoj



ĝis 100 paĝoj. Ĝi, tre utila ligilo inter membraro kaj estraro, donas organizajn kaj praktikajn informojn kaj multajn interesaĵojn el la fervojista mondo.

b) Taskoj de landaj asocioj

Kompreneble la taskoj sub a) koncernas ankaŭ la landajn asociojn, eĉ en pli intensiva formo kaj laŭ leĝoj kaj kondiĉoj, kiuj alternas de lando al lando. Precipe grava celo sur landa nivelo estas prezenti al la fervojoj la utilon de Esperanto por la trafiko, ekz. en formo de tradukitaj fervojaj informiloj aŭ de porpasaĝeraj klarigoj en horaroj aŭ de fervoj-internaj reglamentoj internaciaj.

Aldoniĝas por la landaj asocioj la kunlaboro kun fervojistaj sindikatoj, la organizado de jarkunvenoj, aranĝado de ekspozicioj kaj la ĝenerala informado per flugfolioj, afiŝoj kaj la utiligo de la oficialaj fervoj-internaj bultenoj por la propra informado. Sed unu el la ĉefaj celoj estas la okazigo de lingvaj kursoj, varbado de novaj membroj kaj ties daŭra prizorgado. Ankaŭ la livero de

artikoloj al la ĉiutaga gazetaro en la tuta lando estas grava afero. Ok landaj asocioj eldonis terminarojn en sia nacia lingvo.

c) Taskoj de komisionoj

En IFEF daŭre laboras la Terminara kaj Fakprelega Komisionoj. Lastatempe la Terminara Komisiono (TK) okupas sin pri kompilado de Terminaro (ĉirkaŭ 11 000 terminoj) surbaze de la seslingva oficiala terminaro de la Unuiĝo de Fervojoj. Ĝia celo estas, ke fine la fervojistoj kaj entute la esperantistoj en la tuta mondo havos eblecon unuece uzi la komplikajn fervojistan faklingvon. La kunlaborantoj de tiu internacia komisiono estas kolegoj de ĉiuj fakoj el 14 landoj. Por koordini kaj rapidigi la laboron, servas speciala "Terminara Kuriero", eldonata en FR Germanio.

La Fakprelega Komisiono (FK) ĉefe zorgas, ke la fakprelegoj en la IFEF-kongresoj havu, krom taŭge faka, ankaŭ senriproĉan lingvan nivelon. Tio nepre necesas, ĉar la fakprelegaj tekstoj

estas ĉiujare publikigataj kaj ofte tradukataj en plurajn lingvojn.

Memkompreneble apud la faka agado la IFEF-kongresoj kaj la jarkunvenoj de kelkaj landaj asocioj ofertas al siaj partoprenantoj allogajn programojn de teatraĵoj, muziko, kantado kaj folkloro, ofte en kunlaboro kun aliaj fervojistaj kulturaj grupoj.

Tiu tre konciza superrigardo neniel povas doni kompletan impreson pri la multflanka agado de la fervojistaj esperantistoj. Ili klopodas kontribui sian parton, por ke la heredaĵo de Zamenhof ne perdiĝu. Sed en multaj, precipe okcidentaj landoj, ili forte devas batali kontraŭ la "malsano" de la nuntempo: la indiferecenteco de la homoj, precipe de la junularo, kiuj preferas la televidon, la diskotekojn kaj ne ŝatas lerni pli ol necese. Kaj speciala malfaciliĝo rezultiĝas el la daŭra raciigado ĉe la fervojoj, el kiuj sekvas manko de junaj fervojistoj. Oni devas konstati, ke same kiel antaŭ cent jaroj esperantistoj devas alfronti multnombrajn problemojn. Ni majstru ilin. ■

ESP-NOVAĴOJ · ESP-NOVAĴOJ · ESP-NOVAĴOJ · ESP-NOVAĴOJ · ESP-NOVAĴOJ

KUNVENO PRI DISVASTIGO DE ESPERANTO EN ANHUJ-PROVINCO

En la 5-a kaj la 6-a de februaro la Anhuj-a Esperanto-Asocio okazigis kunvenon pri disvastigo de Esperanto, kiun ĉeestis respondeculoj de Esperanto-organizaĵoj kaj altlernejaj Esperanto-instruistoj de diversaj lokoj de la provinco. Ili rememoris la evoluon de la E-movado en la lastaj jaroj en la provinco, diskutis pri propagando kaj disvastigo de la internacia lingvo kaj plibonigo de ĝia instruado. Kelkaj instruistoj interŝanĝis spertojn pri E-instruado.

En la lastaj du jaroj pli kaj pli multaj fremdlingvaj instruistoj, sciencistoj kaj teknikistoj partoprenis promocian ekzamenon kun Esperanto kiel dua

fremda lingvo. Konforme al tio, la Anhuj-a Esperanto-Asocio decidis starigi Esperantan ekzamenan komisionon por prezenti unuecan ekzamenan temon, kontroli ekzamenon kaj aljuĝi poentojn.

LA POSTLABORA LERNEJO DE ESPERANTO FONDITA EN ŜJINING

Por kontentigi la bezonon de Esperanto-amantoj kaj tiuj, kiuj lernas Esperanton kiel duan fremdan lingvon, la Eduka Buroo de Ŝjining sankciis fondon de la Postlabora Lernejo de Esperanto. Nun Ĉinghaj-provinco, al kiu apartenas Ŝjining, havas pli ol 2 000 lernantojn de Esperanto. La fono de la lernejo akcelos la evoluon de la E-movado tie. La lernejo jam akceptis ĉ. 300

lernantojn. Nun aperis tiaj lernejoj ankaŭ en Huhhot, Kantono, Nanning kaj Liŭĝou.

S-RO JE ŜENGTAŬ FORPASIS

S-ro Je Ŝengtaŭ, fama ĉina edukisto, verkisto kaj figuro de socia aktivado, forpasis 94-jara en la 16-a de februaro en Pekino. Li estis unu el la fondintoj de la societo "Amikoj de Esperanto". Li fervore subtenis nian movadon. La ĉinaj esperantistoj esprimas koran kondolencan pro lia forpaso.

LA ĈANGŜA-A ESPERANTA FILATELISTOLIGO FONDITA

En la lastaj jaroj aperis en Ĉinio fervoro por poŝtmarkokolekto. Por propagandi kaj disvastigi Esperanton



Esperantistoj de la Orient-Ĉinia Normala Universitato

inter la filatelistoj, oni fondis la Ĉangŝa-an Esperantan Filatelisto-Ligon en Ĉangŝa la 28-an de februaro. Antaŭ tio oni fondis similan ligan en Ŝenjang.

E-ASOCIOJ FONDITAJ EN TRI ĈINAJ ALTTERNEJOJ

Antaŭ nelonge la Orient-Ĉinia Normala Universitato, la Uhan-a Politekniko kaj la Normala Universitato de Interna Mongolio fondis E-asociojn unu post alia. Tiel la nombro de E-asocioj en ĉinaj altlernejoj superis 20. Depost 1979 pli ol 70 altlernejoj en Ĉinio funkciigis nedevigajn E-kursojn kun pli ol 5 000 lernantoj.

ALVOKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Por plene ludi sian rolon, la Akademio de Esperanto, sendependa lingva institucio, devas nepre disponi pri la necesaj financaj rimedoj, kiuj ebligas kunordigi la laborojn de la kvardek kvin akademianoj loĝantaj sur kvin kontinentoj.

Tial la estraro de la akademio decidis krei klubon "La Amikoj de la Akademio de Esperanto", kies ĉefa rolo estos trovi ĉiaspecajn rimedojn kaj subtenojn kaj eldoni la informan bultenon "La letero de l' Akademio de Esperanto".

Jam aperis la dua numero. Informojn pri "La Amikoj" kaj "La Letero" kontraŭ respondokuponon vi ricevos de ĉi-suba adreso: LA AMIKOJ DE L' AKADEMIO DE ESPERANTO, 5 rue Leon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

ESPERANTA ARBO PLANTITA

La 16-an de decembro 1987, okaze de la centjara jubileo de Esperanto, Esperanta arboplantado okazis en la Kolegio de Altgrada Edukado de la Okcidenta Aŭstralio en Mount Lawley. La arbo nomiĝas *Angophora floribunda* simila al eŭkalipto. Ĝin plantis d-ro Keith Sutter, patrono de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la unua direktoro de la Triunua Pac-Esplor-Instituto. La ceremonion ĉeestis dudek kvin membroj de la Esperanta Ligo de Okcidenta Aŭstralio nome de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj aliaj eminentaj gastoj, i.a. Peter Natrass de la Perta urbomagistrato, kiu reprezentis la urbestron, kaj s-ino Sonya Grincieri de la ŝtata Departemento de Edukado, kiu reprezentis la ministraron.

La kolegio estas la sola universitat-nivela instituto en Aŭstralio, kiu instruas Esperanton.

LA ITABUNA ESPERANTO-ASOCIO PETAS HELPON DE VERKISTOJ

Bonvolu verki Esperante aŭ portugale artikolojn pri kia ajn temo rilate al Esperanto por la semajna brazila ĵurnalo "O PHAROL" (La Lumturo). Sendu kontribuojn al: Jota Mildes, eldonisto O PHAROL-COLUNA ESPERANTO, UMA Pnte, Av. Gusarapes, 1880 - 56300 - Petrolina (PE), Brazilo.

LA ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO FONDITA

Ĉi-jare s-ro Ralph Dumain kaj s-ino Minerva Massen el Usono

kunfondis novan asocion ATEO. Ĝiaj celoj estas: (1) kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn; (2) disvastigi Esperanton inter ateistoj; (3) defendi propran egalrajtecon kaj batali kontraŭ trudado de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn; (4)

Ceremonio de la arbo-plantado en 1987 okaze de la centjara Esperanto-jubileo



instigi ĉe Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe ne-religiaj grupoj, se oni varbas ĉe religiaj grupoj; (5) akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturen nivelon de Esperantujo; (6) libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, filozofiojn kaj ĉiajn sociajn problemojn. ATEO komencos komuniki per cirkulerojn, poste ĝi lanĉos plenskalan revuon eldonotan en Usono. Interesatoj kontaktu kun Ralph Dumain, 1629 Columbia Road, N. W., Apt. 615, Washington, DC 20009, Usono.

GIGANTA KURSO DE ESPERANTO EN POLLANDO

Post la 72-a UK en Varsovio la konata pola semajnevuo "Nowa Wies" (Nova Kamparo) komencis gazetkurson de E-o por komencantoj, al kiu aliĝis preskaŭ 5 000 gelnantoj el la tuta lando kaj dekoj el sovetunio. En februaro okazis dusemajna konversacia staĝo en Bydgoszcz, somere sekvis aliaj staĝoj. Nun oni urĝe serĉas diverslandajn korespondemulojn por amikeca kaj lingvoekzercakorespondado. Ĉiu, kiu volas ekligi kontakton kun diversaĝaj polaj komencantoj, skribu al: "Nowa Wies Esperanto-Kurso", co-480 Varsovio, str. Wiejska 17, Pollando.



La stando de la Eldonejo kaj Librejo Sonorilo, peranto de EPC, en la 51-a libroborso en Antverpeno, servas per Esperantaj libroj de Ĉinio.

PRI ĈINIO EN JUGOSLAVIO

Intereso pri Ĉinio post la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino ne malgrandiĝis.

En Zagreb (Jugoslavio) okazis en publika biblioteko programo pri "Esperanto kiel ponto de Ĉinio al aliaj landoj".

Pri historio de Esperanto en Ĉinio


kaj ĝia ligiteco kun la ĉina literaturo parolis Spomenka Ŝtimec. Siajn spertojn pri kunvivado kun ĉinoj kaj pri diversaj manieroj de kontaktado de ĉina kulturo kaj la cetera mondo prezentis jugoslavia ĵurnalistino ŝtudenta en Ĉinio Branko Merlin.

Post la prelegoj estis prezentita video-filmo pri la Esperanto-kongreso en Ĉinio.

S-ino Spomenka Ŝtimec en prelego



KARIKATURO



Araba anekdoto

Antaŭ multaj, tre multaj jaroj, kun siaj tri filoj en Arabio vivis reĝo riĉa, potenca kaj saĝa.

Iun tagon, kiam li estis jam tre maljuna kaj malsana, li antaŭsentis la proksimiĝon de la morto. Tial li venigis siajn tri filojn kaj diris al ili:

“Karuloj miaj, mi jam estas tre maljuna kaj tre malsana, kaj la neevitebla leĝo de la naturo baldaŭ plenumiĝos je mi, kaj .. mortos. Tial, antaŭ mia morto mi volas aranĝi kelkajn aferojn kun vi.” Kaj li sin turnis al la plej aĝa filo kaj lin demandis:

“Kion vi plej amas en la vivo?”

Kaj la junulo respondis: “Ho via Reĝa Moŝto kaj patro kara! Mi amas mian familion, miajn fratojn kaj la tutan tribon nian.”

Tiam la reĝo diris: “Vi heredos dudek mil glavojn, dudek mil lancojn, dudek mil ŝildojn, dudek mil kirasojn kaj dudek mil ĉevalojn, por ke vi havu bonan armeon por la protektado kaj defendado de via familio kaj via tribo.”

Poste la reĝo faris la saman demandon al la dua filo, kaj ĉi tiu respondis: “Ho reĝo majestega kaj patro amata! Mi certe amas miajn fratojn, familion kaj tribon, sed mi ankaŭ amas ĉiujn ceterajn arabajn tribojn de la regiono.”

Aŭskultinte tion, la reĝo diris: “Vi heredos cent mil glavojn, cent mil lancojn, cent mil ŝildojn, cent mil kirasojn kaj cent mil ĉevalojn, por ke vi povu organizi grandan armeon fortan por protekti kaj defendi viajn familion, tribon kaj

ĉiujn ceterajn arabajn tribojn de la regiono.”

Fine la reĝo demandis la plej junan filon: “Kion vi plej amas en la vivo?”

La knabo respondis: “Ho reĝo ĉiopova kaj patro karega! Mi amas ne nur miajn fratojn, familion, tribon kaj la ceterajn tribojn arabajn de la regiono, sed ankaŭ la tutan homaron; ĉiuj homoj en la mondo estas al mi fratoj amataj.”

Tiam la maljuna kaj malsana reĝo, emociite, kriis:

“Ho filĉjo mia! Vi ricevos nenion, ĉar vi estas ja tro riĉa!”

Esperantigis **GEORGO ABRAHAM** (Argentino)





GAŬ ŜINGĈUN:

Kiel ili fariĝis mastroj de kulturo?

Profesiaj akrobatoj de Uĉjaŭ en prezentado

En la lastaj jaroj, ĉinaj kamparanoj iom post iom ekhavis kompare riĉan vivon, sekve de tio, ili postulas enhavoriĉan kulturen vivon, ekz., viziti teatron kaj kinejon, legi librojn kaj spekti originalajn artaĵojn k.a. Ili volas ne nur spekti altnivelajn artajn verkojn kaj artajn programerojn, sed ankaŭ persone partopreni la popolkulturen praktikon. Tion bone pruvis kamparanaj familioj de Hebej-provinco, kiuj sin okupas amatoj aŭ profesie pri kultura aktivado, kiaj vendo de libroj, projekcio de filmoj, prezento de luktarto *uŝu-o*, akrobataĵoj, muzikaĵoj kaj teatraĵoj, ekspozicioj de pentraĵoj, fotoj, papertranĉaĵoj kaj kaligrafaĵoj, kaj funkciigo de kulturaj kaj artaj lernejoj. En Hebej-provinco aperis pli ol 50 000 kulturaj familioj profesiaj kaj amatoraj, kies aktivado estas rigardata kiel suplemento de la kamparaj kulturaj aferoj de la ŝtato.

FAMILIOJ DE KAMPARANAJ PENTRISTOJ

La pentraĵoj de kamparanaj

familioj de Ŝingĉi ne nur pendas en multaj kamparanaj domoj, sed ankaŭ pendas en la ekspozicia halo de la Ĉina Belarta Domo, unuaklasa ekspoziciejo de Ĉinio. Ilin aprenis multaj arto-amantoj ĉiutage. La loĝantoj de Ŝingĉi, ĉu viroj, virinoj aŭ junuloj, maljunuloj, prenas post laboro penikon kaj pentras scenojn de la vivo. Ili pentraĵoj elspiras agrablan kamparan odoron, ĉerpinte riĉajn nutrojn el popolaj prestinkuro, papertranĉaĵoj, popolaj kantoj kaj eĉ lokaj teatraĵoj. La pentraĵoj estas freŝaj enhave, simplaj kaj belaj forme, naivaj kaj viglaj en pentrado. Ili plene montras la sentimentojn de pentristoj. Ekz., "Paseroj Surprizitaj" de juna kamparanino Caŭ Ŝiŭjong prezentas la scenon ofte vidatan en la ĉina kamparo: Antaŭ la rikolta tempo, por gardi grenajn plantojn kontraŭ birdoj, oni starigis surkampe ĉifonfigurojn duvizaĝajn fronte kaj malantaŭe en blua vesto, kun pajoĉapelo surkapo kaj du etenditaj manoj tenantaj po unu bastonon, sur kies fino flirtas

rubandoj en la vento. Ĉirkaŭ ĝi flugas aroj da paseroj, kiuj ne kuraĝas surteriĝi. La pentraĵoj en plena strukturo artisme montras la belon de la vivo kaj humuron de ĉinaj kamparanoj.

Fakuloj alte taksis la pli ol 130 pentraĵojn de kamparanoj de Ŝingĉi eksponatajn en la Ĉina Belarta Domo. Ili opiniis, ke la pentraĵoj kuraĝe, senskrupule kaj vivece montras la deziron kaj idealon de la kamparanoj. Tio montris, ke nun la kamparanoj estas ne nur instruistoj de la estetiko, sed ankaŭ ĝiaj kreintoj.

Antaŭ nelonge en Ŝiĝaĝuŝang, ĉefurbo de Hebej-provinco, okazis neordinara ekspozicio de pentraĵoj de kamparanoj. Tie vidiĝis pli ol 100 pentraĵoj de kamparanaj pentristoj Ljang Bjaŭ kaj Ĵuan Ŝiŭhuj. Tio estis la unua fojo en Hebej-provinco. Kamparanoj ĝoje diris: "Tiuj pentraĵoj prezentas nian kamparan vivon. Ni havas al ili intimecon kaj ŝaton."

HEJMLOKO DE AKROBATAĴOJ

Pli ol 3 000 akrobatoj profesiaj

kaj amatoraj vigliĝas en Uĉjaŭ de Hebej-provinco, hejmloko de akrobataĵoj. En la 20 distriktoj-kaj urbetoj de la gubernio funkcias 58 amatoraj akrobataĵo-grupoj, krom unu grupo de cirk-akrobataĵoj kaj akrobatika lernejo.

Akrobataĵojn ludas 12 el la 18 familianoj de Ju Ĝinŝeng en Juĝi-distrikto. Lia plej juna filino komencis fari akrobataĵojn en la infaneco kaj ekludis surscene en la aĝo de 3 jaroj. Lia familio funkciigis akrobataĵo-grupon kaj ludis, en morta sezono de kamplaboroj, akrobataĵojn en Ŝanhajo, Nankino, Kantono kaj aliaj urbegoj, krom ofta ludado por vilaĝanoj en korto, sur kampo kaj placo. Ĝi ĉie ricevis laŭdon. Ankaŭ kamparano de Ĉangŝang-distrikto Ĝjang Ĝentong kaj liaj tri filinoj organizis individuan akrobataĵo-grupon. Ili duonjare kulturis teron kaj ludas akrobataĵojn en la hejmloko kaj duonjare prezentas akrobataĵojn aliloke. En aŭgusto 1986, Ĝjang kaj liaj tri filinoj vizitis kune kun la Hebej-a Amikeca Vizitgrupo Naganon kaj Tottori de Japanio. Tie ili prezentis 23-foje en 17 tagoj kaj estis varme bonvenigataj de japanoj. En oktobro 1987, du filinoj de Ĝjang prezentis akrobataĵojn "ludo per piedoj" en la Internacia Akrobatika Festivalo en Uĉjaŭ de Ĉinio. Lia plej aĝa filino Ĝjang Ĉangjan prezentis tableto-turnadon per la piedoj. Ŝiaj movoj estis lertaj kaj ekzaktaj. Kiam lia pli juna filino Ĝjang Aĵjan grimpis facile kaj petoleme sur la vazon sur la piedpintoj de la fratino, ŝia aminda kaj gaja mieno vekis ridegon ĉe la spektantoj.

GRUPO DE FILMOPROJEKCIO

En Liŭtun-distrikto de Ŝenŝjan-gubernio estas grupo de filmo-projekcio fondita de 3 kamparanaj familioj, kiuj projekcias filmojn de vilaĝo al vilaĝo. Ĝi starigis rilatojn kun alilokaj filmokompanioj kaj povas lui novajn filmojn rekte de

urbegoj, tio certigis la nombron de spektatoroj. Por kontentigi la bezonon de la kamparanoj, kiuj deziras lerni agronomiajn sciojn, ĝi projekcias ankaŭ agronomiajn scienc-edukajn filmojn. Ĉie, kie ili vizitas, ili kolektas la lokajn novaĵojn kaj verkis ilin en *ĉjuji-o** por prezenti antaŭ la projekciado.

Ankaŭ gemaljunuloj pli-ol-70-jaraj venis rigardi filmojn akompanate de siaj filoj aŭ nepoj. La rigardantoj diris, ke rigardi filmon vespere post la taga laboro riĉigas ilian kulturen vivon kaj samtempe donas al ili sciencajn sciojn, tial ili ne plu sentas la vesperon monotona.

PRIVATA LIBREJO

Ĝang Ĝigang, kamparano loĝanta en la strato Ĉenggŭan de Ŝenŝjan, lastatempe funkciigis librejon kaj jam vendis pli ol 100 mil ekzemplerojn da libroj. Lia librejo estas oportuna por la klientoj, ĉar ĝi negocas 12 horojn ĉiutage, de la 5-a matene ĝis vesperiĝo sen tagmeza ripozo. Dum la Printempa Festo, la ŝtataj librejoj havas feriojn. Profitante la feriajn tagojn por vendi siajn librojn li komercas jam en la dua tago post la Printempa Festo. Li ĉiam fervore konigas al la klientoj enhavon de la libroj kaj notas la librojn, kiuj mankas en lia librejo. En la lastaj 3 jaroj li notis pli ol 250 specojn de libroj kaj pli ol 340 ekzemplerojn. Li aĉetis 3 presbiopajn okulvitrojn por servi al gemaljunuloj en elektado de libroj. Foje iu pli-ol-60-jara maljunulo venis al lia libro-budo, sed li ne povis klare vidi la vortojn sur libro, Ĝang do proponis al li la okulvitrojn. La maljunulo aĉetis 3 librojn kaj foriris kontente.

POPOLA ARTISTO

En pli bona vivo, oni aspiras al amuzo. Maljuna popol-muzikisto Liŭ Hongŝin komencis lerni de sia patro popolmuzikaĵon en la aĝo de 7 jaroj. Nun li povas ludi pli ol

100 popolmuzikaĵojn kaj estas konata en la suda regiono de Hebej. La vilaĝanoj tre ŝatas la popolmuzikaĵojn de Liŭ, dum li ludas kun entuziasmo por ili. En la lastaj jaroj, kun leviĝo de la materia vivnivelo, la kamparanoj pli kaj pli forte deziras kulturen vivon. Do, popolmuzikaĵo-grupon funkciigis Liŭ kun siaj nevo, filo kaj filino, kiu laboras en gubernia urbo kiel provizora laboristino. Ili aĉetis motorciklojn por faciligi la prezentadon en multaj lokoj. Ili ludas ne nur en sia gubernio, sed ankaŭ en aliaj 10 gubernioj de la subprovincoj Handan kaj Ŝingtaj. Ili estas bonvenigitaj kaj laŭdataj de la lokanoj. De 1982, ili partoprenis dufoje en prezentado de popolmuzikaĵoj en la provinca ĉefurbo. La popolmuziko-kolekta departemento de Pekino kaj la Centra Arta Instituto sendis personojn al Jongnjan por surbendigi liajn popolmuzikaĵojn. Ankaŭ la Centra Muzika Instituto kaj la Popolarta Domo de Hebej-provinco faris sonbendigon kaj bildobendigon por li kaj lia filino.

* *Ĉjuji-o*: speco de ĉinaj popolaj prezentaj artoj inkluzivantaj diversformajn kant-rakontojn, humurajn dialogojn k.s.

Kamparano-pentristo Ljang Bjaŭ en la ekspozicio de liaj verkoj



Jang Ĝijing sin dediĉanta al kuracado de kancero per ĉina medicino

La pli-ol-50-jara d-ino Jang Ĝijing estas etstatura kaj aspektas afabla. Ŝi batalis kontraŭ la feroĉa demono — kancero kaj malfermis al si vojon en kuracado de malignaj tumoroj per terapio kombinanta la ĉinan medicinon kun la okcidenta.

Antaŭ nelonge mi vizitis d-inon Jang en la tumorologia fako de la Pekina Ĉin-medicina Hospitalo. En la intervjuo ŝi malkaŝe diris al mi, ke ŝi ne intencis okupiĝi profesie pri kancerologio komence de sia laboro.

En 1957 Jang Ĝijing diplomiĝis el la Ŝanŝji-a Medicina Instituto kaj eklaboris en la fako de interna medicino de iu hospitalo en la antaŭurbo de Pekino. Post unu jaro ŝi faris 3-jaran progresigan studon en la Pekina Ĉin-medicina Lernejo. Enirinte la pordon de la Pekina



D-ino Jang Ĝijing


Ĉin-medicina Hospitalo ŝi ankaŭ volis labori en la fako de interna medicino. Sed la gvidanto de la hospitalo decidis, ke ŝi laboru en la tumorologia fako. Tiam

kuracistoj ĝenerale opiniis, ke kuraci malignajn tumorojn estas malfacile kaj senrezulte, tial ili ne volis labori en tiu fako.

La pacientoj, kiuj venis al la tumorologia fako de la hospitalo, plejparte estis diagnozitaj aŭ operaciitaj en alia hospitalo. Por pliiĝi esperon de la vivo, ili sin turnis al kuracistoj de la ĉina medicino. Vidinte la pacientojn suferantajn de grava malsano, Jang Ĝijing konsciis sian kuracistan devon. Ŝi pensis, ke la okcident-stilaj medicinistoj faras al kancersuferantoj nur operacion, aktinoterapion kaj kemian terapion. Ĉu oni povos trovi metodon laŭ la fundamenta teorio de la ĉina medicino por atingi kuracan efikon?

Jang Ĝijing havis unu pacienton

D-ino Jang Ĝijing pridemandas malsanulon.



de mama kancero, kiu ulceriĝis grave. Sed li ne volis operacion. D-ino Jang atente ekzamenis lian kazon kaj prove kuracis lin per dekoktaĵo kaj ŝmiraĵo. Post du monatoj la paciento estis resanigita.

La unuafoja sukceso firmigis ŝian fidon. Ŝi komencis atente resumi siajn spertojn kaj esplori pri la leĝo en la kuracado. La ĉina medicino havas multajn metodojn por kuraci tumorojn, ekz., fortigi ĉji kaj stimuli la lienan funkcion, vigligi sangan cirkuladon kaj solvi sangan stagnaĵon, senfebrigi kaj sentoksigi k.a. Jang Ĝijing fine formis sian originalan kuracan teorion surbaze de siaj propraj klinikaj spertoj. Ŝi nomis ĝin "terapio de *jin*-nutrado kaj retrokupa regado".

D-ino Jang diris al mi, ke la diversaj korpopartoj de sana homo funkcias en ekvilibro, malsanoj ne povas ataki ilin. Kiam la ekvilibro estas detruita, oni do malsanas. Laŭ la teorio de la ĉina medicino pri *jin* kaj *jang*, kvin elementoj, visceraj simptomoj (vd. "Pri Fundamenta Teorio de la Tradicia Ĉina Medicino", p.29 de EPĈ n-ro 1, 1988), la pulmoj estas *jin*-organo kaj regas ĉji de la tuta korpo, ĝi reguligas kaj stimulas la funkcion de diversaj organoj. Ĝuste pro tio d-ino Jang unue aplikas fortigon al la pulma *jin* en kuracado de ĉiu ajn kancero, kio montras, ke ŝi observas la principon de la ĉina medicino pri tuteca reordigo kaj kuracado. La *jin* kaj *jang*, la kvin elementoj estas reciproke inhibiciataj kaj helpataj. Kiam la pulma *jin* estas fortigata, la aliaj organoj, kiaj hepato, koro, lieno kaj renoj estas ankaŭ iagrade nutrataj kaj reordigataj. Tio estas la teorio de retrokupa regado observata de d-rino Jang. Ĝi estas samtempe tonika al *jin* kaj *jang*, sed en la kuracado oni devas reordigi la tonikan gradon al *jin* kaj *jang*, laŭ la konkreta stato de la paciento por restarigi la ekvilibron de *jin* kaj *jang* en la korpo de la paciento kaj atingi la celon detru



D-ino Jang Ĝijing en diagnozo

la vivkondiĉojn de kancero en homa korpo.

Tion dirinte, d-ino Jang prezentis leteron al mi. Ĝi estis skribita de teatra aktoro Li Ŝu. En la letero estas foto de lia tuta familio. Vidante la ridetan Li Ŝu sur la foto, oni ne povas imagi al si, ke antaŭ 20 jaroj li estis suferanto de pulma kancero, destinita al morto. En 1964, Li Ŝu estis ektomiita je unu pulmo. La kuracisto antaŭdiris, ke li vivos maksimume tri monatojn. D-ino Jang faris al li ekzamenon kaj opiniis, ke lia ĉefa problemo estas pleŭra adhaŝaĵo. Ŝi do faris regan kuracadon kaj donis al li preskribojn por fortigi ĉji, revigligi *lŭomaj* (branĉaj vojoj de *ĝinglŭo*, tra kiuj ĉji cirkulas tra la tuta korpo) kaj ekspektorigi. Post du semajnoj ĉesis la brusta doloro, poste la paciento daŭre prenis dekoktaĵon tri jarojn. Dank' al tio Li Ŝu fundamente resaniĝis kaj nun ankoraŭ korespondas kun d-ino Jang.

Fari anticipan regadon al kancero per ĉinaj medikamentoj estas alia grava kuraca metodo aplikata de d-ino Jang por preventi recidivon kaj malboniĝon de la malsano.

Ĝaŭ Juĝe estas instruistino de elementa lernejo de Hejlongĝjang-provinco. Antaŭ kelkaj jaroj, kuracisto diagnozis, ke ŝi suferas lastaperiodan kojlan kanceron. Loka hospitalo faris al ŝi paliativan operacion: ne fortranĉi la kanceron kaj fari nur ĉirkaŭvo-

jon por ke la intesto ne iru tra la kancero. Laŭ ĝenerala kazo ŝi povis vivi maksimume unu jaron. D-ino Jang faris al ŝi kuracadon nutri *jin* kaj fortigi la lienan funkcion, fortigi la renoj kaj sentoksigi, kaj aplikis al ŝi hemostazan drogon por fari anticipan regadon. Ĉar seriozan sangofekadon ĝenerale suferas malsanulo de lastaperioda kojla kancero. Kvankam tio ne okazis al Ĝaŭ Juĝe, tamen estis preventita eventuala graviĝo de la kazo, dank' al la anticipe aplikata kuracado. Post kvar jaroj Ĝaŭ Juĝe iom post iom resaniĝis kaj denove eklaboris en la lernejo.

En la pasintaj jardekoj Jang Ĝijing dediĉis sian tutan tempon kaj energion al esplorado pri kuracado de kanceraj. Ŝi iam ŝmiris sian mamon per ŝmiraĵo mem farita por provi la kuracefikon. Grandaĝaj pacientoj ne povas elteni operacion kaj iras malfacile, ŝi do portas kuracilon al ili. Krome, ŝi kuracis fremdlandajn pacientojn de malproksimaj lokoj.

Mi demandis d-inon Jang, kian planon ŝi havas en la estonteco. Ŝi serioze respondis: "En kuracado de kanceraj, mi prove trovis iujn metodojn, sed nemalmultaj problemoj restas ne solvitaj. Ekz., mia kuraco de kanceraj en la gala sistemo kaj hepato ne rikoltis deziratan efikon. Mi devas fari pluan penadon. Mi estas konvinkita ke la kancero absolute ne estas nekuracebla."

Maljunaj geedzoj (Novelo)

"Kantu por ni kanton pri maljuneco!"

La geedzoj refoje kverelis. Ili en la aĝo de proksimume 70 jaroj kune vivis pli ol kvardek jarojn kaj en sincera amo kaj en senĉesa kverelado. Estas jam nekalkuleble, kiom da fojoj ili kverelis en la pasinteco. Tamen ĉiufoje paco revenis apenaŭ du horojn post la kverelo, kaj ili denove harmoniis, kvazaŭ du tasoj da akvo kunmiksita.

Sed hodiaŭ la kverelo senprecedence furioza eksplodis pro plej malgranda bagatelo, same kiel ĉe aliaj geedzoj. Ĉi-foje la kverelo eksplodis nur pro tio: La edzino jam pretigis la vespermanĝon, sed la edzo ankoraŭ sin klinis super tablo por purigi la pipon, kaj sur la tablo estis svarmo da paperpecoj, ĉifonoj, papertordadoj gudroplenaĵoj. . . La edzino urĝis lin purigi la tablon, sed li siavice obstinis en sia faro. Jen la edzino ekgrumblis kiel aliaj maljunulinoj. Grumblado de edzinoj ofte estas meĉo de kverelo, kaj la maljunulo vere ekflamis. Ambaŭ ekkverelis inter si kaj murmuris pri antaŭaj kulpoj de la rivalo. La kverelo fariĝis pli kaj pli akra. La edzino kolere kaptis la pipon kaj ŝovis ĝin en sian poŝon, dum la edzo ĵetis la tabakujon teren kaj debatis la cindrujon teren. Montrante neniom da cedo, la edzino insultis per la raŭka seka voĉo:

"Rompu jam! Pli bone vi rompu ankaŭ la kruĉon!"

Tion aŭdinte, la oldulo eksaltis de sur la seĝo kiel delfeno, prenis

de sur la tablo la porcelanan kruĉon kun freŝa teo kaj forte ĵetis ĝin sur la plankon. La edzino akre ekkriis de teruro. Rigardante la disrompaĵojn kaj la disajn flakojn, la maljunulino severe kriegis kontraŭ la maljunulo:

"Eksedziĝu, tuj!"

La minaco estis ŝia kutima armilo dum la juneco, kiam ilia kverelo atingis la kulminon. Komence la minaco efikis por subigi la rivalon, sed poste ĝi senvalidiĝis pro tio, ke la minaco neniam efektiviĝis. Tamen ŝi ankoraŭ tion kriis ĉe kverelo aŭ por montri sian furioziĝon aŭ por vidigi sian kredon je ĝia efiko. Sed post la 60-jariĝo, ŝi neatendite demetis la minacon. Hodiaŭ ŝi refoje faris tiun minacon, tio montris ŝian koleron neretenebla.

Ankaŭ la edzo bolis de kolero, kvazaŭ taŭro frenezigiĝus ekscitite de la ruĝa tuko de toreisto. Li brue spiregis foje refoje kiel lokomotivo, rapide kaj blinde turniĝadis en la ĉambro. Farinte du cirklojn, li haltis kaj turniĝis alidirekte. Post tio li pafiĝis al la pordo, abrupte malfermis ĝin kaj eliris, ĵetfermite la pordon, kvazaŭ li neniam revenus.

La maljunulino ankoraŭ ne ĉesigis la koleron. Vizaĝe al la malplena ĉambro, ŝi daŭre insultis la edzon. Lacigita de la insultado, ŝi duonkuŝiĝis en la lito kaj eksentis aflikton kaj ofendiĝon: Ŝi pensis, ke ŝi havus infanon, se ŝin ne trafus dum ŝia juneco intesta

tuberkulozo. Se ŝi havus infanon, ŝi povus loĝi ĉe li kaj tute ne bezonus koleriĝi kontraŭ la pli kaj pli obstina, malpacienca kaj malprudenta oldulaĉo. Sed nun ŝi devis kunvivi kun li, pretigi por li manĝon, kaj eĉ devis meti bovlon, teon kaj cindrujon antaŭ li, malgraŭ tio la edzo ofte koleriĝis kontraŭ ŝi. . . Dum ŝi malgaje pensadis, larmoj elruliĝis el ŝiaj okuloj ĉirkaŭitaj de delikataj faltoj.

Post longa tempo la murhorloĝo batis la okan. Pasis ĝuste du horoj post la kverelo. Oni ne scias kial ĉiufoje, du horoj post la kverelo, certe akurate ŝanĝiĝas la humoro, same kiel en printempo degelas la glacio sur rivero. Kvietiĝis la ĵusaj ondegoj de la humoro, kvazaŭ nenio okazus. Eksonis refoje ĉe ŝiaj oreloj la minaco "Eksedziĝu, tuj!" Subite ŝi sentis la absurdecon kaj ridindecon de la minaco. Ĉu decas eksedziĝi en la aĝo de proksimume 70 jaroj? Ŝi ekridis, kaj la rido glatiĝis la falton en la koro, forpelis komplete ŝiajn koleron, plendon kaj ofendiĝon. Ŝi eksentis solecon, kaj la kvieteco en la ĉambro eĉ tedis ŝin. Sekve bedaŭro ŝteliĝis en ŝian koron. Ŝi pensis: "Ĉiajn malfacilojn kaj danĝerojn ni travivis, ĉu la bagatelo indas kverelon?" Ŝi tiel bedaŭris tion ĉiufoje post kiam kvietiĝis la kverelo. Kaj nun. . . la edzo jam devenis reveni. Antaŭe, kiam ili kverelis, kutime la edzo forlasis la hejmon kaj senbrue revenis post ĉirkaŭ unu horo. Sed hodiaŭ li foriris kun malsata



stomako kaj ankoraŭ ne revenis post du horoj. Kien li iris? Falis densa neĝo. Li forkuris sen ĉapo kaj koltuko. Ĉu li glitfalas pro senatenteco? Tion pensante, ŝi ne povis resti plu en la ĉambro. Ŝi frotis al si la palpebrojn streĉitajn pro sekiĝo de la larmoj, surmetis sur sin veston, dehokis la ĉapon kaj koltukon de la edzo kaj eliris el la ĉambro.

Daŭris la neĝado, kaj la neĝo amasiĝis ĝis super la maleoloj. Ŝi ĉirkaŭrigardis kaj iris orienten, ĉar ĉiumatene ili promenadis orienten kaj post ĉirkaŭirado ili revenis de okcidente.

Ne estis tre malhele en la nokto. Ĉiuj arboj estis kvazaŭ farbitaj per blanka koloro. La sveltaj figuroj

de la arboj vile presiĝis sur la fono de nokto. La neĝo faris la pavimon pli dika, pli supla kaj pli ĉarma. En la lumo de stratlampoj, grandaj neĝflokaj faladis glime. La neĝo elspiris humidan kaj freŝigan odoron, klare kaj oreplacē knarante sub tretado. Kiam la humida neĝo tuŝiĝis kun la vangoj, oni sentis tiklon, malvarmon kaj komforton. En tio la ordinara, tre konata mondo tuj fariĝis sublima, solena, superba kaj vivoplena.

En neĝo ŝi subite rememoris foran okazaĵon inter si kaj li.

Antaŭ 50 jaroj, ili ambaŭ, viglaj en la aĝo de malpli ol 20 jaroj, studis en sama universitato. Tiam li estis firmvola kaj sangvina, ŝatanta flugpilkon, kanton kaj

teatron kaj radikala en la penso. Ŝi ne scias, ĉu ŝi radikaliĝis pro la korinklino kaj alirado al li, aŭ ekŝatis lin kaj aliris al li pro la resonanco en ideologio. Ili ambaŭ estis membroj de la studenta teatra grupo de la universitato. Ŝi dancis tre bele. Ĉiufoje, kiam malfrue finiĝis provludo, li akompanis ŝin hejmen. Antaŭe ili interparolis nature eĉ antaŭ la publiko, sed nun ili tamen silentis survoje. Ili iradis senparole kaj la vojo ŝajnis multe pli longa kaj aŭdiĝis nur la paŝbruo. Sed kiel dolĉa embaraso!

Ŝi memoris klare, ke tiutage neĝis. Ili paŝis sur neĝo. Estis iom post la oka vespere. En la lastaj tagoj ŝi maltrankvile kaj atende antaŭsentis, ke li ion diros al ŝi. Sur la kvietaj vojetoj apud la rivero, subite li nereteneble premis ŝin al sia sino. Ŝi forpuŝis lin kaj kolere jetadis al li neĝbulojn. Sed li senmove staris kiel ŝtupo, lasante sin ataki de ŝi per neĝbuloj, ĝis li estis superŝutita kiel neĝohomo. Subite ŝi haltis kun sia jetado, fikse rigardis lin momenton kaj jetiĝis al li. Ŝi sentis, ke lia arda pasio transmisiĝis sur ŝin tra la dika tavolo da neĝo. Ili enamiĝis per la eksterordinara batalo.

Dum multaj jaroj la ĉarma sceno klare gravuriĝis en ŝia koro. En ĉiu neĝtago ŝi rememoris la ebriigan okazaĵon. Dum la junaĝo ŝi rememoris la okazaĵon preskaŭ ĉe ĉiufoja neĝo; kaj en la mezaĝo ŝi hazarde rememoris la aferon, kaj se ŝi menciis tion al sia edzo, li ekridetis kompreneme kaj ambaŭ silentiĝis ŝajne rememorante la dolĉan aferon. Kiam ili maljuniĝis, ŝi malofte rememoris la okazaĵon eĉ en neĝtago. Ĉu la spertoj dum la vivo estis tro multaj kaj subpremis la okazaĵon? Sed kial hodiaŭ ĝi subite reaperis en ŝia memoro kaj tiel forte tuŝis ŝian koron?...

Nun ŝi maljuniĝis, kaj duonjarcento jam pasis de post tiu etapo. La tempo daŭre kondukis ilin antaŭen, kaj dume ilia energio preskaŭ tute elĉerpiĝis. Ŝiaj

gamboj, antaŭe tre viglaj kaj fortaj, nun debiliĝis kaj rigidiĝis. Multjara reŭmatismo kurbigis ŝiajn genuojn, kiuj doloris ŝin en pluvaj kaj neĝaj tagoj. Ŝi tremetis ĉe ĉiu paŝo kaj devis multe klopodi por eltiri la piedojn el neĝo. Pro senatenteco ŝi falis, kaj feliĉe, ke la neĝa kovraĵo estis dika kaj supla. Ŝi enigis la manojn en neĝon kiel apogilojn kaj malfacile starigis. Kaj en tiu momento alia okazaĵo kaptis ŝian memoron —

Ho, tio okazis nelonge post ilia nupto. Iun vesperon ili iris rigardi la filmon "Moderna Tempo" de C. S. Chaplin. Kiam ili iris en la kinejon, la ĉielo estis griza, kaj kiam finiĝis la filmo, ĉio estis blankigita de la daŭra neĝo. Feliĉaj pro la novgeedziĝo, ili pasigis la malriĉajn tagojn en poezia animstato. La neĝflokaj

flirtantaj en vento kvazaŭ distris ilin, kaj la blanka neĝo estis tiel pura kaj kristala, kiel iliaj koroj. Ili iris gaje interparolante kaj poste ekkuris de ĝojo. Ŝi glitfalas en neĝon. Li etendis al ŝi la manon por starigi ŝin. Sed ŝi forbatis lian manon: "For la manon, mi ne bezonas vian helpon!"

Ŝi estis sama kiel li en la karaktero — obstina.

Ŝi facilmove starigis kiel cervido. Sed nun ŝi, febla kiel maljuna ĉevalo, frontis kontraŭ grandan malfacilon por starigi sin. Kiel forte ŝi dezirus, ke la edzo estu tuj apude! Kvankam ankaŭ li seniliĝis kaj per unu mano ne povis starigi ŝin, tamen li povis etendi ambaŭ manojn. Sed tio estis jam kontentiga! Duope estas pli bone almenaŭ ol unuope.

Ŝi estis feliĉa, ke ŝi, kvankam maljuna, havis la edzon, kiu akompanis ŝin dum pli ol kvardek jaroj. Malgraŭ ke li estis malpacienca, obstina, nepurema, neatentema, li estis honestulo sen ajna malvirto. Li absorbiĝis en elektra transmisio kaj malmulte zorgis pri la dommastrumado. Kvankam li emeritiĝis, tamen li de tempo al tempo iris al la oficejo por pasigi kelkan tempon, kvazaŭ ĝi havus nerompeblan rilaton kun li. Ŝi ŝatis la karakteron de sia edzo, ke li estis vera viro, malkaŝema, malvenĝema. Senatenteco ne estas kulpo, male ĝi markas virecon. . . Ju pli ŝi pensis, des pli ŝi amis sian edzon. Senspure forvapiĝis unu post alia la neelteneblaj indignindaĵoj de la edzo, kontraŭ kiuj ŝi klare plendis antaŭ du horoj. Nun ŝi maltrankviliĝis pro la foririnta edzo. Ju pli ŝi serĉis, des pli serioziĝis ŝia maltrankvilo. Kiel ŝi vivus plu, se perdiĝus la edzo? Kvankam lia tondra ronkado ofte vekis ŝin el dormo, tamen ŝi ne povis endormiĝi sen la ronkado, kiam li forestis pro oficevojaĝo. Tion pensante, ŝi ekhavis la fortan deziron tuj retrovi la edzon.

Ŝi vagis ĉirkaŭ unu horon en neĝo. Eble estis jam la deka, kaj preskaŭ neniuj paŝis sur la strato. La edzo ankoraŭ ne vidiĝis. Maldensiĝis la neĝo. La piedoj doloris al ŝi, kaj la genuoj suferigis ŝin pli forte. Jam estis malfacile por ŝi levi la piedojn. Ŝi decidis iri hejmen por vidi, ĉu la edzo revenis.

Ŝi iris hejmen. Kiam ŝi estis tute proksima al la hejmo, ŝi trovis, ke lampo brilas en la hejmo; la lumo verŝiĝis sur la neĝon formante du oranĝajn kvadratojn. Ĉe tio ekbategis al ŝi la koro: Ĉu revenis la oldulo aŭ ŝi forgesis malŝalti la lampojn?

Veninte al la pordo, ŝi trovis, ke kontinuo da freŝaj piedsignoj etendiĝis ĝis la perono. Ĉu la edzo postlasis la spurojn? Ĉu najbaro faris tion?



Ŝi klinis sin kaj atente observis la spurojn en profundaj neĝkavoj, sed ŝi neniel povis konstati, ĉu la spuroj estis postlasitaj de la edzo.

“Ho ĉielo,” ŝi pensis, “kiel stulta mi estas, ke mi eĉ ne povas rekoni liajn piedsignojn, kvankam mi vivis kun li jam la tutan vivon.”

Skuante la kapon, ŝi surpaŝis la peronon. Ŝi murmuretis al si malfermante la pordon: “Estus preferinde, ke la oldulo estas hejme!” Hodiaŭ ŝi denove perceptis la pasion, kiu tuŝis ŝian koron antaŭ 50 jaroj.

Ŝi malfermis la pordon — ha, la edzo estis fumanta sidante ĉe la tablo. La disrompaĵoj de la kruĉo estis forbalaitaj, la stovo estis pliardigita. Ŝi tuj sentis dolĉan kaj varman atmosferon, kiu premis forte ŝian frostigitan korpon. Ŝi vidis, ke sur la tablo staras du tasoj da teo, unu antaŭ la edzo, kaj la alia, aliflanke sur la tablo, evidente rezervita por ŝi... La edzo, vidinte ŝin, ekrigardis al ŝi kaj obeeme mallevis la okulojn. Lia rigardo evidentigis ĝenatecon, embarason kaj bedaŭron. La edzo ĉiam montris tian rigardon post kverelo. En ĝojo pro paciĝo post kverelo, tia rigardo estis por ŝi subtila konsolo.

Ŝi staris, ŝajne ion ekpensis, elpoŝigis la pipon, iris al la edzo



kaj donis ĝin al li. Ŝi sentis kuntiriĝon de la nazo, sed pene detenis sin de larmoj. Ŝi nenion diris, forturnis sin por varmiĝi por

la edzo vespermanĝon kun aldono de du frititaj ovoĵoj...

Esperantigis ŬANG CAJJI

KORESPONDI DEZIRAS

* Volonte kor. kun spertaj, seriozaj kaj novaj esperantistoj, por perfektigi lingvoscion. Adr.: Pawel Dabek, 92-538 Lodz, ul Czerniko 1^am 61 bl 473, Pollando.

* Rob Hardy, psikiatro 37-jara, dez. korespondi kun ĉina esp-isto, esperante ke la lasta korektus liajn leterojn kaj revenigus ilin al li. Adr.: 211, Shreveport Rd, Barksdale

AFB, Louisiana 71110-2045, Usono, USA.

* Dez. kor. Lukacs Arpad, Str. Paringului 13/13, Jg-Mures 4300, R.S.Romanio. Interesiĝas pri informo rilate al hungaroj vivantaj en oriento.

* Dez. kor. tm. pri diversaj interesoĵ. Adr.: Nils Alvar Eksten, Pl. 780 Allarp Skaralid, S-260 70 Ljungbyhed, Svedujo-Sveden.

* Malgranda grupo de gekomencantoj (16-38-jara) dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Skribu al: Hans Schilling, Amtsstrasse 10, DDR - 1170 Berlin,

DDR.

* 22-j. litova junulo dez. kor. pri “rock” muziko, lingvoj, filatelo k.a. Adr.: Gintaras Žiaunys, P.O.Box 422, 232004 Vilnius, Litovio, USSR.

* Grupo de gejunuloj (14-18-j.) revas okupiĝi pri tradukado de diverslingva poezio kaj prozo en rusan lingvon pere de ricevotaj laŭvortaj E-tradukaĵoj. Preparados analogajn tradukaĵojn por ĉiuj dezirantoj. Adr.: USSR 744028, Aŝhabad ul. Surikova 21-1-18, Akopian A.M.

Ĉina ĝardenistiko

Teksto de LU LIĜJA

Fotoj de ŬEJ JAN

Ĉinaj ĝardenoj ekaperis en la dinastioj Ĉin (221-206 a.K.) kaj Han (206 a.K.-220 p.K.). Ili prezentas la stilon de la orientaj naturpejzaĝaj ĝardenoj konsistantaj el ŝtonoj, akvo, floroj, herboj kaj konstruaĵoj. La ĉina ĝardenistiko kunfandis la artan belon kaj tiun de la naturo, kaj ankaŭ diversajn tradiciajn artojn de la

ĉina nacio, kiaj arkitekturo, pentrarto, literaturo, teatro, kaligrafio kaj gravurarto. Kaj pro tio la ĉinaj ĝardenoj estas elegantaj kaj poeziaj.

Artisme aranĝitaj rokaĵoj imite laŭ la naturaj montoj estas unu el la enhavoj plej esprimriĉaj en la ĉina ĝardenistiko. Oni faras

rokaĵojn, kavernojn kaj valetojn en ĝardeno el naturaj ŝtonoj en malsamaj formoj, koloroj, vejnoj kaj kvalitoj. La diversformaj rokaĵoj povas vekti imagon ĉe turistoj pri naturaj montoj kaj arbaroj, kaj ili sentas sin kvazaŭ en natura montaro. Tiu simbolisma arto kaj la "montoj kaj arboj sur malgranda peco da papero" sur la ĉinaj pejzaĝaj pentraĵoj donas same bonan efekton malgraŭ malsamaj artoj. Ekzemple, la rokaĵo en Gejŭan-ĝardeno de Jangĝoŭ prezentas pejzaĝojn variantajn laŭ sezonoj per tipa abstrakta imago. La bambuaro en la florteraso ĉe la enirejo estas punktita de stalagmitoj por aludi "printempajn bambuĝermojn post pluvo". Oni aranĝis rokaĵojn en akvo por aludi poeziajn somerajn nubojn kun mirindaj montpintoj. Por aŭtuno oni faris monteton el flavaj ŝtonoj, kiuj prezentigas kvazaŭ aŭtunaj folioj en vesperruĝo. Oni faris vintran monteton per blankaj rokaĵoj simbolantaj neĝan leonon kaj plantis umeflorojn. Krom la rokaĵoj, oni aranĝis ankaŭ groteskajn ŝtonegojn en ĝardeno por beligi la medion, kio estas speciala tradicio de la ĉina ĝardenistiko.


Muroj en ĝardeno



“Monto kaj akvo ĉarmigas unu la alian.” Akvo donas al la ĉinaj ĝardenoj vivon kaj vigecon. La lagoj, ĉu ondantaj grandaj ĉu kvietaj malgrandaj, ĉiuj estas gravaj partoj de la ĉinaj ĝardenoj. Ekzemple, Kunming-lago en la Somera Palaco en Pekino, ondeta kaj vasta, kontrastas kun la rubanda Posta Lago ĉe la norda piedo de Ŭanŝou-monto, kiu interligas la disajn vidindejojn laŭborde. Kiam oni boatas sur la zigzaga akvosurfaco jen larĝa jen mallarĝa, oni forgesas reveni ravite de ritmeco kaj kvieteco de la medio. Ĉinoj kutime ornamas ĝardenojn per kvietaj basenoj kaj fluanta fonto. Ili reliefigas elegantecon kaj kvietecon de la ĝardenoj per naturaj lagbordoj kaj kvietaj akvosurfacoj.

En la ĉina ĝardenistiko gravan lokon okupas la diversformaj kioskoj, terasoj, turoj, pavilonoj, pontoj kaj koridoroj. Ili, kiel dispozicia centro de ĝardeno, kune kun la montetoj, akvo, floroj kaj herboj donas apartan ĉarmon. Ili estas ne nur ornamaĵoj de la ĝardenaj vidindejoj, sed ankaŭ belvidejoj kaj lokoj por ripozo kaj distriĝo. Ĝardenoj havas vidindejojn ofte en tri aŭ kvar flankoj. Oni konstruas sur nerigardindaj muroj pordojn aŭ arte kraditajn fenestrojn, aranĝas en la korto ekster la muroj malgrandajn vidindejojn per arboj kaj rokoj, kiuj formas naturajn bildojn kun la pordoj kaj fenestroj kiel kadroj. La ĉina ĝardenistiko akcentas imagan efekton. Ekz., en la senventa Lotusventa Kiosko en la ĝardeno Ĝuōgēngjūan en Suĝou oni sentas sin kvazaŭ en vento.

Floroj kaj arboj, kiuj povas esti kaj ĉefaj kaj akcesoraj vidindaĵoj en la ĉina ĝardenistiko, aldonas al la ĝardenoj pli da vigeleco kaj koloroj per sia forta vivpovo kaj naturaj pozoj. Vidindaĵoj en la ĝardenoj plejparte estas formitaj el floroj kaj arboj. Ekz., la “Ravina Pin-vento” en la Someruma



Belvidejo en la ĝardeno Ĝuōgēngjūan

Montvilao de Ĉengde ricevis sian nomon pro la ventsusuro en pinaro; “Sunreflekta Tropeolaro”, belega sub la sunbrilo, fariĝis unu el la famaj vidindaĵoj de la Someruma Montvilao; kaj la “Pluvaŭda Ĉambro” en la ĝardeno Ĝuōgēngjūan en Suĝou troigas pluvan atmosferon per la susurado de pluvo sur baŝoj. Tial en la ĉina ĝardenistiko floroj kaj arboj povas esti ne nur la ĉefa

temo de vidindaĵoj reaperiganta naturajn pejzaĝojn, sed ankaŭ ornamo kaj kontrasto de la vidindaĵoj. En iuj ĝardenoj oni rigardas vidindaĵojn tra interplektitaj arbobranĉoj aŭ maldensaj arbofolioj, tiamaniere oni povas ankaŭ ĝui riĉajn spacotavolojn kaj implicitan profundan ĉarmon.

Versduo kaj tabulo kun surskribo estas okulfrapa trajto de la



Parto de Liŭjŭan-ĝardeno

ĉina ĝardenistiko. Iliaj enhavoj ofte rilatas al la medio de la konstruaĵoj, plejparte estas famaj poemoj, kiuj aludas karakterizaĵojn de iu vidindaĵo kaj vekas imagon. Dum vizito oni povas ĝui belajn kaligrafiaĵojn kaj gravurarton, kiuj dotis la pejzaĝan ĝardenon per eleganta literatura etoso.

La ĉinaj tradiciaj ĝardenoj dividiĝas ĝenerale en tri specojn, nome imperiestrajn ĝardenojn, privatajn ĝardenojn kaj naturajn pitoreskejojn.

La imperiestraj ĝardenoj plejparte konstruiĝis en norda Ĉinio. Ili karakteriziĝas per superbeco kaj grandiozeco. Ili okupas vastan areon de belaj naturaj montoj kaj akvo. Imperiestroj konstruis luksajn kaj brilkolorajn kioskojn, terasojn kaj pavilonojn en siaj ĝardenoj, kiuj prezentas grandiozan pejzaĝon, kiaj Bejhaj-parko, la Somera Palaco kaj la Someruma Montvilao. La palaco Jŭanmingjŭan en Pekino, nomata

“ĝardeno supera al dek mil ĝardenoj”, estis distingiga verko de la ĉina ĝardenistiko. Bedaŭrinde ĝi estis forbruligita de britaj kaj francaj agresantoj en 1860.

En Ĉing-dinastio (1644-1911) la ĉina ĝardenistiko atingis sian kulminon. Kun apero de granda nombro de imperiestraj ĝardenoj ankaŭ altranguloj kaj nobeluloj konstruis privatajn ĝardenojn. Ĉar tiaj ĝardenoj plejparte estis konstruitaj de instruituloj kaj ĉi tiuj ne rigardis honorajn altan rangon, bonan salajron kaj riĉecon, sed noblaj eviton de la ekstera mondo kaj ermitan vivon, tial en ĝardeno-konstruado ili strebis al kvieteco, eleganco, romantismo kaj modesteco, kunfandante la ĉinan tradicion literaturon kaj aliajn artformojn en unu tuton, por ke la ĝardenistiko kaj pejzaĝaj pentraĵoj kaj idilioj reliefigu unu alian. En la riĉa suda Ĉinio kun abundaj produktaĵoj kaj disvolvita kulturo

prosperis privataj ĝardenoj. El ili la privataj ĝardenoj en Suĝoŭ konstruitaj en la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Ĉing estas plej admirataj en- kaj eksterlande. La imperiestraj ĝardenoj konsistas ĉefe el grandiozaj palacoj, dum la privataj karakteriziĝas per simpleco, eleganco kaj natureco. La konservataj famaj privataj ĝardenoj estas Ĝuoĝengjŭan, Liŭjŭan, Ŭangŝijŭan k.a.

Krom artefaritaj ĝardenoj, Ĉinio havas ankaŭ multe da belaj naturaj pitoreskejoj kun naturaj vidindaĵoj kiel la ĉefaj kaj artaj ornamoj kiel akcesoraj. Oni plektis belajn mitojn kaj legendojn por tiuj pitoreskejoj, sekve ili portas misteran koloron kaj ŝorĉan ĉarmon, kiaj la Okcidenta Lago de Hangĝoŭ kaj la Malgranda Okcidenta Lago de Jangĝoŭ. Kvankam la naturaj pitoreskejoj ne estas tiel delikataj kaj luksaj, tamen ili bele impresas per estetika eleganco kaj lakoneco. ■



EL POPOLA ĈINIO

Poŝtkesto 77

Pekino, Ĉinio

Adreso de la sendinto (skribu preslitere):

S-ro S-ino F-ino:

(família nomo en majusklo)

Strato:

Urbo:

Lando:

Kara leganto,

Ni kore dankas vin pro via konstanta subteno kaj kunlaboro.

Profitante la nunan okazon, ni multe dankas ankaŭ tiujn, kiuj afable plenigis kaj resendis niajn enketilojn dissenditajn fine de la pasinta jaro. Ni volonte atente konsideros kaj laŭeble plenumos iliajn dezirojn.

Ekde 1988 en "El Popola Ĉinio" aperas la novaj rubrikoj "Ĉina Medicino", "Ĉinaj Moroj" kaj "Vivo de Ordinaraĵoj". Ni esperas, ke vi donos viajn impresojn pri la diversaj aspektoj de la n-roj 1-6/1988 de EPĈ (t.e. ekde la artikoloj kaj bildoj ĝis la kovrilo). Precipe bonvenaj estos viaj opinioj konkrete esprimitaj. Kun amika saluto kaj antaŭdanko.

LA REDAKCIO DE EL POPOLA ĈINIO


This image shows a full page of a worksheet designed for handwriting practice. It features approximately 20 horizontal dashed lines spaced evenly across the page, providing a guide for letter height and placement. The background is plain white, and there are no other markings or text present.



Rokaĵo en Gejŭan-ĝardeno de Jangĝoŭ FOTO DE GAŬ MINGJI

Ŭangŝi-ĝardeno en Suĝoŭ FOTO DE JAN ĜIN





La Somera Palaco

FOTO DE DONG ZONGGUJ

Koridoro kun
kiosko en ĝardeno

La Nebulpluva Pavilono en la Someruma Montvilao en Ĉengde





Kradita fenestro
en ĝardeno



La Lotusventa Kiosko en Ĝŭoĝeng-ĝardeno en Suĝoŭ



Korpo-sanigaj metodoj

La korpo-sanigaj metodoj ĉi tie pritraktataj karakteriziĝas per kombino de movado de membroj, ekzercado de spiroj, malstreĉo de korpo, absorbo de menso kaj memmasaĝo. La metodoj celas revigligi la vitalan energion, cirkuligi la sangon, fortigi la muskolojn kaj ostojn, forigi lacon kaj ĉagrenon, longigi la vivon per reguligo, kuraci kaj preventi malsanojn.

Jam en la medicina verko "Pri Kaŭzoj kaj Simptomoj de Malsanoj" de Suj-dinastio (581-618 p.K.) de Ĉinio estas notitaj korpo-sanigaj metodoj, kiuj cirkulas de generacio al generacio kaj estas tre bonvenaj ankaŭ hodiaŭ. Ekde ĉi tiu numero nia rubriko konigos al la legantoj kelkajn el ili.

METODO POR SANIGI LA KAPON

Kapharoj

1. Laŭ la vidpunkto de la ĉina medicino, oni devas ofte kombi siajn kapharojn, ĉar tio povas eksciti la kapon, vigligi ĝian sango-cirkuladon, stimuli al ĝi nutrodonon kaj ĉarmigi la harojn. Tiun metodon povas modere apliki ankaŭ suferantoj de cerba arteriosklerozo, cerba trombozo, cerba embolozo kaj hemiplegio pro cerba hemoragio, kiuj iom post iom resaniĝas, aŭ kiujn atakas la sekvaĵoj. Sed ili, precipe suferantoj de hipertensio, ne kombu forte por eviti troekscitiĝon.

2. Sidu sur planko, kun haroj malkombitaj, vizaĝo direktita al oriento kaj manoj firme pugnitaj. Enspiru kiel eble plej profunde kaj elspiru malrapide

kun mallaŭta buŝbructo. Levu la manojn super la verton, svingu ilin plurfoje kaj premu per la polmoj jen kaj jen la orelojn. Tio povas kuraci kapdoloron. Tenu la kapharojn permane kaj malsupren tiretu ilin 5 fojojn kaj tio povas malhelpi ilian blankiĝon.

3. Sidu sur planko, kun gamboj etenditaj kaj 30 centimetrojn distancaj inter si. Metu la manojn sur la krurrojn, kurbigu la talion kaj klinu la kapon kiel eble plej antaŭen (vidu la bildon 1). Ekzercu vin 12-foje kaj tio povas reguligi la vertebraron, nigrigi, moligi kaj briligi la kapharojn dum longa tempo.

4. Sidu sur planko, kun genuoj fleksitaj. Tenu la piedfingrojn per la manoj kaj laŭeble klinu la kapon, por ke la energio de la visceroj supreniĝu al la kapo. Tio povas kuraci surdecon kaj malklaran vidadon. La ofta ekzercado iagrade malhelpas harblankiĝon.

Vizaĝo

1. Ne sidu post satmanĝado, sed promenu aŭ ion faru por eviti dispepsion, doloron kaj malvigliĝon de la kvar membroj kaj malhelpi velkon de la vizaĝo.

Kiam vi ankoraŭ sentas vin varma post trinkado de vino, ne lavu vian vizaĝon per malvarma akvo, alie estiĝos furunko sur la vizaĝo.

Ne dormu kun vizaĝo neŝirmita eksterdome en somera nokto, ĉar roso povas dikigi la haŭton de la vizaĝo kaj kaŭzi tinion.

2. Sidu kun taliŝo rekta kaj klinu




1



2



3



4

la kapon jen dekstren, jen maldekstren, kun fermitaj okuloj. Sepfoje faru profundan spiron per la nazo. Tio povas kuraci gravan intermitan kapdoloron.

3. Metu la manojn malantaŭ la kapon, kun interkruciĝantaj fingroj (vidu la bildon 2), forte movu la kapon dekstren kaj maldekstren 14-foje, premu 14-foje la kapon per la polmoj, poste klinu la kapon malantaŭen. Faru ĉiun ekzercon por certa tempo, poste klinu la kapon antaŭen, malantaŭen, dekstren kaj maldekstren kaj fine rapide movu la manojn 21-foje malantaŭen. Tio povas kuraci gravan intermitan doloron en la

kapo, akselo, brako kaj kubuto.

4. Kuŝu surdorse, elspiru plene, tenu la spirhalton kiel eble plej longe kaj enspiru malrapide (vidu la bildon 3). Ekzercu vin ĝis ŝvitiĝo. Tio povas kuraci gravan intermitan kapdoloron.


5. Etendu unu brakon kun manplato supren kaj kurbigu la alian por tiri eksteren la mentonon per la mano (vidu la bildon 4). Faru la ekzercon 14-foje senĉese (inverse same). Poste etendu la brakojn flanken kaj movu la talion laŭeble dekstren kaj maldekstren. Faru la ekzercon 14-foje rapide. Tio povas forigi la movobstrukcon de la nukaj vertebroj kaj

kuraci kapdoloron, kapturnon, laringalgion k.a.

6. Se via spino estas rigida, entiru la kolon inter la ŝultrojn, levu la kapon por direkti la gorgan pomon laŭeble supren kaj turnu la kapon dekstren kaj maldekstren po 21 fojoj por froti la ŝultrojn. Paŭzu. Faru denove la ekzercon, post kiam vi kvietiĝas. Unue malrapide kaj poste rapide. Se vi ne sentas spinan rigidecon, faru la ekzercon po 14 fojoj matene, tagmeze kaj vespere. Tio povas forigi febron kaj doloron ĉe la kolo, vertebroj kaj artikoj kaj kuraci afton, kapturnon kaj gingivajn ŝvelon kaj doloron. ■

(Daŭrigota)

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Üejfang 2. Ĝenning-a Buji-Mjaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio 3. Hebej-provinco 4. Ĝjangŝji-provinco
5. Zigong 6. Ĝuanghan-gubernio 7. Enping-gubernio

La kampanjo de klasika prozo en Tang-dinastio

de MEJ ĜI

La kampanjo de klasika prozo en Tang-dinastio estis reforma kampanjo en literaturo. La “klasika prozo” diferencas de la ritma prozo karakterizita per paralelismo kaj multteornamiteco. La prozo de Ĉinio estis prospera antaŭ Ĉin-dinastio (221 — 206 a. K.) kaj en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.). En la periodo de Ses Dinastioj (de la komenco de la 3-a jc. ĝis la fino de la 6-a jc.) furoris la ritma prozo, la literaturistoj troe ĉasis la pompecon de vortoj kaj frazoj kaj paralelismen, neglektante enhavon, tio malhelpis la disvolvigon de prozo. En la meza periodo de Tang-dinastio, iuj intelektuloj, malkontentaj je la realo kaj aspirantaj socian reformon, pli forte sentis, ke per tia formalisma stilo estas malfacile esprimi sian penson, kaj proponis revivigi la klasikstilan prozon, rompi la katenon de la stilo al prozverkado kaj restarigi la tradicion de realisma kaj modesta prozo furoranta antaŭ Ĉin-dinastio kaj en Han-dinastio. Ĉar la periodo estas pli antikva ol la Ses Dinastioj, tial la tiam verkitaj prozaĵoj estas nomataj klasika prozo. Kaj la reforma kampanjo nomiĝas la kampanjo de klasika prozo. La ĉefaj trajtoj de klasika prozo estas ĝiaj malstriktaĵoj frazoj kaj senĝena formo. La ĉefa tasko de la kampanjo estis reformi la stilon, formon kaj literaturan lingvon. Ĝi profunde influis la disvolvigon de la proza literaturo de Ĉinio.

Han Ju (768—824) estis unu el la ĉefaj gvidantoj de la kampanjo. La kampanjo de klasika prozo iniciatita de li ŝajne estis por “restaŭro”, sed fakte celis renovigon kaj kreivon surbaze de la heredita tradicio. Han Ju proponis kombini artikolon kaj doktrinon, kun la lasta kiel la ĉefa. La de li proponita doktrino teorie estis la tradicia doktrino de konfuceanismo. Sed en lia verka praktiko tio portis alian enhavon, nome: La artikolo devas porti konkretan enhavon, sed ne nur esti rimedo por prediki la doktrinon. En la reformo de stilo, Han Ju proponis starigi normojn de nova klasika prozo pri la leksikono kaj gramatiko: Unue, “la malnovaj frazoj estu nepre forigitaj”, kaj novaj

frazoj ĉiam postulataj; due, “ĉiu frazo devas bone plenumi sian taskon”. La frazoj devas esti konvenaj kaj fluaj. Unuvorte, li ĉiamaniere klopodis krei literaturan lingvon kunfandantan la leksikonon kaj gramatikon de antikvuloj, spegulantan la realon kaj esprimantan penson, kaj penis uzi la novan literaturan lingvon por krei novan liberan kaj fluan



formon. Tio estis la ĉefa enhavo de lia reformo de stilo kaj ankaŭ la ĉefa atingo de la kampanjo de klasika prozo.

Ĉirkaŭ Han Ju kolektiĝis multaj progresaj literaturistoj. Ili subtenis unu alian, plenenergie propagandis la kampanjon de klasika prozo kaj pozitive faris verkadon. Han Ju mem estis eminenta verkisto de klasika prozo. Lia verko estas "Kolekto de Sinjoro Ĉangli" en 40 volumoj (Ĉangli estas alia nomo de Han Ju). Li uzis sian novstilan klasikan prozon en verkado de politikaj komentarioj, leteroj, eseoj, funebraj artikoloj, epitafoj kaj aliaj kaj verkis multajn eminentajn prozaĵojn. Liaj artikoloj pri personoj, aferoj kaj objektoj donis klaran kaj perfektan figuron. Ekz., "Daŭrigo pri Biografio de Ĝongĉeng (altrangulo) Ĝang", kiu priskribis kortuŝajn kaj laŭdindajn heroaĵojn de lokaj generaloj Ĝang Ŝjun (Ĝongĉeng), Ŝju Jŭan kaj Nan Ĝijun en la defendo de ilia urbo por rezisti kontraŭ la ribelo de la lokaj militaristoj An Luŝan kaj Ŝi Siming. Interalie, troviĝas brila paragrafo pri Nan Ĝijun, kiu iris al la loka militaristo Helan por peti militan helpon:

"Nan Ĝijun iris al Helan por peti militan helpon. Helan enviis Ĝang Ŝjun kaj Ŝju Jŭan pro tio, ke iliaj reputacio kaj meritoj estis pli grandaj ol la liaj, kaj ne volis ilin helpi. Helan amis la bravan Nan Ĝijun, kaj devigis lin resti. Li pretigis bankedon en akompano de muziko kaj invitis Ĝijun altabliĝi. Ĝijun emocie diris: 'Ĉe mia forlaso la popolanoj de Sujjang malsatis jam pli ol unu monaton! Kvankam mi mem volas manĝi ĉi tie, tamen mia konscienco tion ne permesas; eĉ se mi manĝos, mi ne povos engluti.' Tion dirinte, li elingigis sian glavon, forhakis sian fingron kaj montris ĝin sangan al Helan. Ĉiuj ĉeestantoj stuporiĝis de mirego kaj larmis de emocio pro Nan Ĝijun. Fine Nan vidis, ke Helan neniel volas doni militan helpon, kaj tuj forrajdis. Antaŭ la elurbiĝo, li elingigis sian sagon kaj pafis ĝin al la pagodo. La sago trafis pagodan brikon. Li ĵuris: 'Venkinte la ribelantojn, mi certe ekstermos Helan! La sago montris mian volon!'"

La priskribo estas mallonga, sed vive prezentiĝas la lojala kaj brava heroo antaŭ niaj okuloj.

La lirika prozo de Han Ju karakteriziĝas per harmonia kombino de sentoesprimo kaj rakonto. En sia artikolo "Funebro al la Dekdua Nevo" per libera stilo li esprimis sian profundan funebron al la nevo. La rakonto pri familiaj bagateloj elverŝis la sinceran parencean senton de la aŭtoro kaj ankaŭ lian suspiron pri la vivo de ŝtata oficisto. Ĉiu vorto kaj ĉiu frazo estas kortuŝaj. Ĝi ja estas malofte vidata funebra artikolo.

Han Ju verkis nemalmultajn brilajn argumentajn artikolojn, interalie "La Eseo" havas plej altan literaturan valoron. Per priskribo de travivaĵoj de drako, ĉevalo aŭ *ĉjilin* (mita besto. Pri ĝi bonvolu legi la 3-an n-ron de EPC, 1988, p.65), la eseo prezentas lian malĝojon, ĉagrenon kaj solecon. Ili havas parabolajn ĉirkaŭparolon, delikatan intrigon kaj grandan influon sur la posta prozo. Tion bone ekzemplas "La Eseo 4: Pri Ĉevalo". Jen ĝia teksto:

"En la mondo estis unue Bole, kaj poste mil-lia (unu lio = 1/2 km.) ĉevalo. Mil-liaj ĉevaloj troveblas ofte, sed malofte tiaj homoj, kia Bole. Tial, bonaj ĉevaloj ne estas rigardataj kiel mil-liaj, sed malhonore traktataj de bredistoj kaj mortas ĉe staloj same kiel la ordinaraĵ ĉevaloj. Mil-lia ĉevalo unufoje povas manĝi cent litrojn da greno. La bredisto ne scias, ke ĝi havas apetiton de mil-lia ĉevalo. Tial la ĉevalo, kapabla galopi mil liojn, sed kun malsata stomako, ne povas montri sian kapablon. Ĝi eĉ ne povas kompari sin kun ordinara ĉevalo, por ne paroli pri ĝia kapablo galopi mil liojn. Vipado ne observas ĝian leĝon, nutrado ne sekvas ĝian kapablon. Aŭdinte ĝian henon, oni ne komprenas ĝian deziron. Kun vipo en la mano oni diris: 'Superegaj ĉevaloj ne troviĝas en la mondo!' Ho ve! Ĉu vere ne estas tiaj ĉevaloj? Fakte oni ilin ne konas."

Bole estis antikva majstro por ekzameni ĉevalon. Uzante la komparon, ke mil-lia ĉevalo ne renkontis Bole, Han Ju malkaŝis, kiel la feŭda socio ne taksis kaj strangolis eminentulojn, montris sian domaĝon al la eminentuloj kaj ankaŭ sian



ĉagrenon. Kvankam tiuj eseoj estas perlo el liaj prozaĵoj, tamen oni plej multe laŭdas liajn argumentajn artikolojn, nekalkuleblajn kiel literaturaj verkoj, ekz., “La Origino de Konfuceanismo”, “La Pereco de Moralo”, “Pri Sekvado post Majstro”. Tiuj artikoloj impresas grandioze kaj senĝene kaj reprezentas la originalan stilon de Han Ju. Ekz., “Pri Sekvado post Majstro” aplikas komparon por kritiki la tiaman socian moron ne respekti majstrojn. Ĝi iom post iom profundigas kaj montras fortan infekton.

En la literatura verkado Han Ju realigis sian teorion de klasika prozo. Li liberigis sin de la kateno de ritma prozo kaj aplikis purajn frazojn kaj liberan stilon en verkado, kio faris liajn artikolojn viglaj, naturaj, liberaj kaj laŭdataj de la posteuloj.

La alia grava persono en la kampanjo de klasika prozo estis Liŭ Zongjŭan (773 — 819). En la kampanjo lia rolo estis malpli granda ol tiu de Han Ju, sed lia sukceso sur la kampo de la proza literaturo superis tiun de Han Ju. Liŭ iam pozitive partoprenis en politika reforma kampanjo. Malsukcesinte en la kampanjo, li estis malpromociita vicprefekto de Jongĝoŭ (la nuna Lingling de Hunan-provinco). Tie en la dekjara vivo li havis la ŝancon kontakti kun malsupratavolaj popolanoj kaj koni iliajn suferojn. Kaj plie, li mem estis daŭre persekutata de la politikaj malamikoj. Li vivis solece kaj mizere. Ĝuste en tia medio li verkis multajn eminentajn prozaĵojn.


Liaj prozaĵoj estas enhavoriĉaj kaj diversaj. Interalie, la satiraj fabeloj kaj pejzaĝaj notoj estas la plej riĉaj je kreivo. En siaj satiraj fabeloj li disvolvis apologajn fragmentojn, uzatajn kiel komparoj en prozaĵoj de literaturistoj antaŭ Ĉin-dinastio, en mallongajn, kompare perfektajn artikolojn kun pli forta beletra gusto. Tio donis al la fabeloj sendependan literaturan pozicion. Samtempe li donis al la fabeloj pli profundan kaj pli realan enhavon kaj faris ilin satira literaturo kun batalspirito. La fama “Tri Admonoj” per rakontoj pri alko, azeno kaj rato mokas la homojn arogantajn pro favoro de la mastro aŭ blindajn pretendemulojn kaj rimarkigis ilian neeviteblan pereon. Ekz., “Azeno en Gujĝoŭ” estas lingve viveca, populara kaj edifa. Jen ĝia teksto:

“Antaŭe en Gujĝoŭ ne estis azeno. Fervora homo enportis ĝin per ŝipo. Kondukinte ĝin al la loko, oni ne sciis kiel ĝin disponi, kaj lasis ĝin ĉe montopiedo. Vidante ĝin giganta, tigro prenis ĝin kiel dion. La tigro sin kaŝis en arbaro por subrigardi kaj iom alproksimiĝis respektoplene, sed ne konis ĝin. Iun tagon, la azeno iais, la tigro terurigis kaj forkuris, opiniante, ke la azeno volas ĝin mordi. Sed la tigro vidis la azenon foje refoje kaj sentis, ke tiu ĉi



havas nenian mirindan kapablon. La tigro iom post iom al kutimiĝis al la azena krio, plurfoje alproksimiĝis al ĝi, sed fine ne kuraĝis batali kontraŭ la azeno. La tigro pli kaj pli agis senĝene kaj kuraĝis ofendi la azenon. La azeno ekbolis de kolero kaj kalcitris. La tigro ekĝojis pensante: ‘Ĉu nur tiu kapablo!’ Sekve de tio la tigro sin ĵetis al la azeno muĝante, rompis ĝian gorĝon, formangis ĝian karnon kaj foriris. Ho, ve! Laŭ la granda korpo kaj akra krio, oni sentis, kvazaŭ la azeno posedus kapablon eksterordinaran. Se ĝi ne montris sin senkapabla, eĉ feroca tigro pro timo ne kuraĝis ataki ĝin. Nun la afero tiel okazis. Vere malĝojinda!”

Liŭ Zongjŭan estis tre lerta en priskribo de pejzaĝoj. Diference de la ĝenerala priskribo, li ne sole priskribis la naturon, sed penetrigis sian ĉagrenon kaj malĝojon en la priskribon. “Ok Notoj en Jongĝoŭ” estis verkita de li en Jongĝoŭ post degrado, kiel lia reprezenta verko. Jongĝoŭ siatempe estis malfrekventata loko, tie ondis montoj, profundis valoj kaj interkruciĝis riveroj.



Liŭ Zongjŭan ofte ekskursis al montoj. Laŭdire en iu serena aŭtuna tago, la montoj, ĉu foraj ĉu proksimaj, konturiĝis klare. Li subite rimarkis, ke la antaŭe neatentita pejzaĝo de la Okcidenta Monto estas mirinde bela. Li do gvidis kelkajn homojn surgrimpi la monton, traborante al si la vojon en veprejo. De tie li rigardis la ĉirkaŭaĵon. La ondantaj montoj kaj la verdaj kampoj ĉiuj prezentiĝis antaŭ liaj okuloj. La natura pejzaĝo larĝigis liajn vidkampojn. Li sentis, ke nur ĉi-foja surmontiĝo estas vera ekskurso, kaj verkis prozaĵon "Piknika Ekskurso al la Okcidenta Monto" por memoro. Poste li trovis la lageton Gumang, nordokcidente de la monto je 200 paŝoj. La lageto fontis de monta roĝo, kiu torentis malsupren kaj en ebena loko formiĝis 0.7-hektara klara lageto. Ĉirkaŭ la lageto prosperis arboj kaj sur rokmuro krispiĝis fonto. La pejzaĝo ja estis tre kvieta. Liŭ Zongjŭan aĉetis la lokon, tie aranĝis terason, plilongigis la parapeton kaj kondukis la montan akvon en la lageton, kie la

akvo oreplacĉe murmuris. Por tio li verkis "Noto pri la Lageto Gumang".

Okcidente de la lageto troviĝis monteto, sur kiu pompis multaj verdaj bambuoj kaj arboj kaj groteskis multaj ŝtonoj. Liŭ Zongjŭan aĉetis la monteton, kaj kune kun siaj amikoj faris ordigon, por ke la loko fariĝu pli ĉarma. Pri tio li verkis artikoleon "Noto pri la Monteto Okcidente de la Lageto Gumang" kaj gravuris ĝin sur ŝtono. En la ekskursaj notoj Liŭ Zongjŭan kun profunda amo admiris la belecon de la naturaj pejzaĝoj, bedaŭris ilian longtempan nekonatecon kaj ĝojis pri ilia eltrovo. Pere de tio li montris sian aflikton kaj indignon pro forgesiteco kaj forlasiteco. Ĉe li la naturaj pejzaĝoj ne estis apatiaj ekzistaĵoj, sed liaj intimaj amikoj. La pejzaĝoj sub lia plumo ĉiuj distingiĝis per trajtoj harmoniaj kun liaj karakteroj.

Liŭ Zongjŭan atingis certan sukceson ankaŭ en verkado de prozaĵ biografiaj. Ekz., "Anekdotoj de Taj'ŭej (kortegano respondeanta pri militaj aferoj) Dŭan", "Rakonto de Serpento-kaptisto" k.a. estis tre sukcesaj. "Rakonto de Serpento-kaptisto" kun malpli ol 500 ideografiaĵoj rakontis pri la tri generacioj de la serpento-kaptisto Ĝjang, kiu preferis morti pro kapto de venenaj serpentoj, ol morti antaŭ tiranismo. La verko vivece kaj delikate bildigis la psikan staton de la serpento-kaptisto kaj la persekutadon de la kruelaj oficistoj en la vilaĝoj. Ĝi profunde malkaŝis la tiaman socian realon.

Han Ju kaj Liŭ Zongjŭan estis ne nur klasikaj prozistoj, sed ankaŭ poetoj. Ili ambaŭ postlasis multajn poemojn. ■

Du prozaĵoj de Tang-dinastio

Pri sekvado post majstro

de HAN JU

En la antikveco ĉiuj lernantoj havis majstron. La majstro predikas, donas sciojn kaj solvas malfacilajn problemojn por ili. La homoj ne estas denaske posedantaj ĉiujn sciojn. Ĉu ili neniam rekontiĝas kun malfacilaj problemoj? Se oni ne disĉipliĝas, do iliaj problemoj restas por ĉiam nesolvitaj. La pliaĝajn homojn, kiuj scias kompreneble pli frue ol mi, mi prenas kiel miajn majstrojn. Ankaŭ la malpli aĝajn, kiuj scias pli frue ol mi, mi prenas kiel miajn majstrojn. Mi lernas de ili sciojn,

malgraŭ ke ili estas pli aŭ malpli aĝaj ol mi. Pro tio, ĉu nobeloj ĉu pleboj, ĉu junaj ĉu maljunaj, ĉiuj talentuloj povas esti miaj majstroj.

Ho ve! La moro respekti majstron estas longtempe neglektata, tial estas malfacile senperpleksigi la homojn! Eĉ la antikvaj sanktuloj, multe superaj al la ordinaraj homoj, lernis de majstro. La nunaj ordinaruloj, multe malsuperaj al la sanktuloj, tamen hontas lerni de majstro. Tial la sanktuloj ĉiam pli

eminentiĝas, dum la malsaĝuloj stultiĝas. Ĝuste el tio venis sanktuloj kaj malsaĝuloj, ĉu ne?

Oni amas sian filon kaj elektas por li majstron, sed ili mem hontas lerni de majstro. Vere nebulkapaj! La majstroj instruas al la infanoj nur librajn sciojn kaj voĉlegadon. Ili ne predikas, nek donas sciojn, nek solvas por ili malfacilajn problemojn, pri kio mi aludis supre. Oni sin turnas al majstro por lerni legi, sed kun malfacila problemoj oni eĉ ne faras tion, kaj rezulte ili kaptas la bagatelan sed

forlasas la gravan, en kio mi ne vidas ilian prudenton. Sorĉistoj, kuracistoj, muzikistoj kaj diversaj metiistoj neniam hontas lerni unu de alia. Sed kiam aristokratoj kaj burokratoj mencias pri siaj majstroj, ili mokridas. Demandite, ili respondas: "Ilia aĝo estas preskaŭ sama, la klerco simila. Lerni de malaltrunguloj estas hontinde, kaj lerni de altrunguloj ŝajnas fari flaton." Ho ve! De tio oni povas scii, kial la moro respekti majstrojn ne estas restarigita. La sorĉistoj, kura-

cistoj, muzikistoj kaj diversaj metiistoj estas subtaksataj de kleruloj. Nun la prudento de kleruloj estas eĉ malpli granda, tio ne estas miriga!

Sanktulo havas pli ol unu majstron. Konfuceo lernis de Tanzi, Ĉanghong, Ŝiŝjang kaj Laŭdan. Ilia virto kaj talento estas malpli granda ol tiu de Konfuceo. Konfuceo diris: "Se iras kune tri homoj, inter ili certe estas homo, kiu povas esti mia majstro." Tial, la disĉiplo ne estas certe malpli

talenta ol la majstro, dum la majstro ne certe pli prudenta ol la disĉiplo. Oni konas la veron aŭ frue aŭ malfrue kaj havas malsaman fakan kapablon. La afero ja tion pravas.

17-jara Li Pan ŝatas klasikan prozon. Li bone scias la konfuceanisman klasikan verkojn kaj lernas de mi, ne katenante sin per la vulgara moro. Mi admiras lin, ke li lernis de aliaj kiel antikvuloj, kaj verkis tiun artikolon por donaci al li. ■

Noto pri la monteto okcidente de la lago Gumang

de LIŬ ZONGJŬAN

En la oka tago post mia eltrovo de la Okcidenta Monto, mi iris 200 paŝojn laŭ valo nordokcidenten kaj trovis la lageton Gumang. Okcidente de la lago je 25 paŝoj ŝtonbaraĵo retenas la torentan kaj profundan akvon. Sur la baraĵo kuŝas monteto. Sur ĝi kreskas bambuoj kaj arboj, apikas rokoj sennombraj kaj majestaj kun tero sur sia dorso kaj ili konkuras per diversaj groteskaj pozoj. La rokoj, interpuŝiĝantaj kaj malsupren kliniĝantaj, aspektas kiel bovoj kaj ĉevaloj trinkantaj ĉe roĵo. La suprenlevitaj viciĝantaj aspektas kiel brunaj ursoj montgrimpantaj.

La monteto kovras malpli ol unu muon (1/15 de hektaro). Oni povas eĉ ĝin enkaĝigi.

Mi demandis pri ĝia mastro. La respondo: "Ĝi estas posedaĵo de Tang. Li volis vendi ĝin, sed neniu aĉetis." Mi demandis pri la prezo. Oni diris: "Apenaŭ 400 moneroj." Kompatante la monteton ignoratan, mi aĉetis ĝin. Miaj amikoj Li Ŝenjŭan kaj Jŭan Keĝi tiam ekskursis kune kun mi. Ni ekstazis neatendite de ĝojo. Ni do alprenis laborilojn, sarkis herbaĉojn, forhakis malbelajn arbojn kaj forbruligis ilin. Jen elstarigas belajn arbojn, montriĝas ĉarmaj bambuoj kaj vidiĝas groteskaj rokoj. Tie ĉi ni rigardas la altajn montojn, ŝvebantan nubaron, fluantan rojon, birdojn kaj bestojn en senzorga petolado. Ili ĉiuj gaje prezentigas ĉe la monteto. Ni kuŝas sur mato kun la kapo sur kuseno. Antaŭ niaj okuloj kvietas

la refreŝiga pejzaĝo, ĉe la oreloj murmuras la akvo, la senzorga spirito ĉirkaŭŝvebas super la libera medio kaj la animo kunfandiĝas kun la profunda kaj kvieta medio. En malpli ol dek tagoj mi akiris du belajn lokojn, tion eĉ antikvaj pejzaĝo-amantoj eble ne atingis.

Ho! Se tiu bela pejzaĝo vidiĝus apud la ĉefurbo Ĉang'an, la ekskursemaj nobeloj konkuris aĉeti ĝin. Eĉ estus malfacile akiri ĝin kun taga prezo-altigo je mil taeloj da oro. Nun ĝi troviĝas en tiu ĉi loko, vilaĝanoj kaj fiŝistoj volis vendi ĝin por 400 moneroj, sed ne sukcesis en pluraj jaroj. Mi kaj miaj amikoj akiris ĝin ĝoje. Ĉu ĝi vere trovis ŝatanton? Mi skribis la noton sur roko por celebri ĝian fortunon. ■

(Daŭrigo de p. 46)

tostis unu por la alia interŝanĝante la pokalojn. Komike estas, ke ĵus reciproke riverencinte, la "nov-edzo" tuj forŝiris la vualon de sur

la "novedzino" brakumis kaj kisigis ŝin kvazaŭ en nupta vespero.

La valizoj de la turistoj jam estas metitaj sur aŭtojn, sed ili ankoraŭ kun bedaŭro premas la manojn de la gastigantoj.

Nemalmultaj larmas. La turistoj el diversaj landoj, parolantaj malsamajn lingvojn, havas komunan senton. La plurtaga gastado restos bela kaj neforgesebla en ilia memoro. ■

Agrabla gastado ĉe vilaĝanoj

— Primora turismo de Ŝiĝjaĝuāng-vilaĝo

Ŭejfang en Ŝandong-provinco estas fama kajto-urbo de Ĉinio. Tie ĉiujare okazas internacia kajta festivalo. En la lasta jaro la urbo ekfunkciis “primoran vojaĝlinion de mil lioj” (1 lio = 0.5 km.), kiu altiras multajn alilandajn turistojn.

La vojaĝlinio trapasas 7 guberniojn kaj urbodistriktojn sub Ŭejfang, inkluzive de 24 vidindejoj, 3 primoraj turismaj vilaĝoj kaj 4 muzeoj. Interalie, Ŝiĝjaĝuāng-vilaĝo de Anĉiŭ-gubernio estas nepre vizitota de ĉiuj turistoj.

Ŝiĝjaĝuāng distancas de Ŭejfang nur 50 km., aŭ unuhoran aŭtoveturadon. Ĝi estas malgranda vilaĝo kun 260 familioj el 1 200 homoj. Pura strato trairas la

vilaĝon. Troviĝas kaj kabanoj kaj etaĝdomoj en bonordaj vicoj. En 1983 primora vojaĝgrupo el 60 junuloj de Mie-gubernio de Japanio la unua venis tien kaj pasigis tri agrablajn tagojn. Post tio la primora turisma servo de Ŝiĝjaĝuāng altiras pli kaj pli multajn vojaĝantojn. En la lastaj jaroj la vilaĝo gastigis pli ol 4 500 turistojn el 80 landoj kaj regionoj kiel Japanio, Usono, Kanado, Italio, Britio kaj Francio.

Ŝiĝjaĝuāng estas tipa nordĉinia vilaĝeto. Antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio en 1949 ĝi estis vilaĝo de farmuloj fame konata en Ŝandong-provinco. 80% de ĝiaj familioj vivis el almozo. Nun ĝi jam fariĝis riĉa vilaĝo kun diskonigita famo. Ĝi konservas

siajn simplajn morojn, kaj ĝiaj loĝantoj estas simplaj kaj honestaj. En festoj ili kutimas pendigi versparojn sur la pordoj de kabanoj, etaĝdomoj kaj ĉe tenejoj, kuirejoj kaj porkejoj. Ĉiu hejmo havas surmure bildkadrojn, en kiuj montriĝas grandaj kaj malgrandaj fotoj de la familianoj. Alia muro estas plena de novjaraj bildoj. La tuta ĉambro estas saturita de ĝojo de kampara vivo.

Ĝenerale 2-4 gastoj loĝas en unu familio. Ĉe kiu ili gastas, ties novaj familianoj ili fariĝas kaj estas varme akceptataj.

Gastado ĉe vilaĝanoj estas enhavoriĉa. Interalie, manĝi ĉe la gastigantoj kaj lerni de ili kuiradon plej interesas la turistojn. Kvankam la dommastrinoj estas lertaj en kuirado, tamen por kontentigi la gastojn per ĉiam novaj menuoj dum sinsekvaj tagoj, ili devas multe cerbumi. La materialoj por kuirado estas lokaj produktaĵoj. Ĉiu sezono donas siajn freŝajn legomojn. En somero oni havas kukumojn kaj tomatojn, en aŭtuno, melongenojn kaj fazeolojn. Unuvorte, kio maturiĝis, tio aperas sur la manĝotablo. Kiam maizo maturiĝas, oni manĝas maizon; kiam batato maturiĝas, oni manĝas bataton; kiam akvomelono maturiĝas, oni manĝas akvomelonon. Iu japana knabino, maĉante freŝe kuiritan maizon, diris: “Vere bongusta! Vere bongusta! Neniam antaŭe mi manĝis tian bongustaĵon.” Unikaj frandaĵoj de la vilaĝo, kiaj tritavola kuko, silksimilaj spagetoj kaj frititaj melongenopecoj, tre plaĉas al la turistoj. Sed plej agrable por la gastoj estas fari

Turistoj lernas fari *ĝjaŭzi*-ojn en kamparana hejmo.





Alilandaj turistoj en vilaĝo

ĝjaŭzi-ojn (manĝaĵo el farĉitaj past-buletoj) kune kun la gastigantoj. *Ĝjaŭzi*-oj estas tre ŝatataj de nordaj ĉinoj. En la pasinteco oni manĝas *ĝjaŭzi*-ojn nur en festoj. Nun la vilaĝanoj riĉiĝis, kaj ankaŭ *ĝjaŭzi*-oj fariĝis ofta manĝaĵo. Fari *ĝjaŭzi*-ojn por la lokanoj ne estas malfacile, sed por la alilandaj vizitantoj tio postulas iom da peno. Kiam la dommastrino pretigis paston kaj farĉon, la familianoj faras *ĝjaŭzi*-ojn ĉe tablo gaje babilante. Multaj fremdlandanoj neniam antaŭe vidis *ĝjaŭzi*-ojn, des malpli scias kiel fari ilin. La dommastrino instruas al ili kiel prepari la pastofolian eksterajon de *ĝjaŭzi*-oj kaj kiel kovri farĉon faldante la eksteran parton kaj preme kunigante la randon. La unuaj paŝoj de lernado ne estas facilaj. La *ĝjaŭzi*-oj faritaj de la gastoj ofte estas misformaj, tro grandaj kaj malbelaj; rigardante ilin eĉ la

farintoj mem skuas la kapon, levas la ŝultrojn aŭ eksplodas per ridego.

Ĉar la turistoj manĝas kaj loĝas ĉe vilaĝanoj kiel membroj de ties familio, kompreneble, ili ankaŭ laboras kun aliaj familianoj. Kiam la gastigantoj iras sarki kampon, tion faras ankaŭ la gastoj; kiam la gastigantoj iras rikolti kukumojn aŭ fazeolojn, ankaŭ la gastoj sekvas. Krome la gastoj ankaŭ nutras porkojn kaj kokojn, disgrajnis maizospadikojn kaj senŝeligas arakidojn, unuvorte, ili faras ĉion, kio troviĝas ĉe mane. Kelkiam la gastoj eĉ akompanas la gastigantojn viziti bazaron.

En la vilaĝo ne mankas amuzoj por la turistoj. En la junulara domo de la vilaĝo turistoj povas legi diversajn librojn, ĵurnalojn kaj gazetojn. Cetere ili povas ludi ŝakon kaj tablotenison, televidi aŭ rigardi videoregistraĵojn. En la

vilaĝo troviĝas kolosa karuselo. De la antikveco la lokanoj ŝatas sin amuzi per balanc-ludo. Multaj hejmoj havas sian pendolon. Oni staras sur ĝi kaj eksvingiĝas per sia propra ekpuŝo. Balanciĝi alten estas tre agrable. La karuselo ne bezonas ekpuŝon de la ludantoj. Sur ĝia framo estas dekelke da sidlokoj. Kiam la ludantoj sidiĝis sur ili, la karuselo ekmoviĝas per ekpuŝo de apudstarantoj. La karuselo pli kaj pli altiĝas rotacianta. Sidi sur ĝi estas tre plezure, sed, kompreneble, ankaŭ iom da kuraĝo estas bezonata. Ĉe falo de la nokta kurteno, la gastigantoj invitas la gastojn al la vilaĝa placo por rigardi artfajrajon. Infanoj kantante kaj dancante esprimas bonvenigon al la amikoj venintaj de malproksime. Ankaŭ la turistoj, mano en mano, gaje kantas kaj dancas ĝis profunda nokto. Iuj kuŝas sur terlitoj, unikaj en norda Ĉinio, kaj



Balanc-ludo

aliaj sur ordinaraj lignaj litoj; remaĉante la ĝojplenan tagon, ili iom post iom endormiĝas.

Por akcepti la ĉiam kreskantan vizitantaron, la vilaĝo perfektigis siajn turismajn instalaĵojn, kaj pliriĉiĝis la enhavo de la gastigado. En 1983 oni reformis gastejon kun malgranda korto en konstruaĵon en stilo de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.), kaj ornamis ĝin laŭ moroj de Ming-dinastio kaj Ĉing-dinastio (1644-1911 p.K.). La konstruaĵo nomiĝas etnografia korto. En la korto estas tri ĉambroj interkomunikitaj. La meza ĉambro-

estas por la komunaj aktivadoj de la familio. Meze de ĝia malantaŭa muro pendas bildo de longvivulo. Sub la bildo estas santala kvadrata tablo, ĉe kies ambaŭ flankoj staras po unu brakseĝo. La plafono estas tegita per rozkolora papero kun desegnaĵoj. En ĝia centro pendas sesangula ornama lanterno. La orienta ĉambro estas dormejo por la pliaĝuloj, kaj la okcidenta por junaj generacioj. La mebloj en la ĉambroj gustas je antikva simpleco, ege diferenca de tiuj de nuntempaj vilaĝaj familioj; nur la tualeta spegulo kaj ludilo tigro sur la tablo iom sentigas modernan vivon. Scivolemaj turistoj petas

tranoktadon en la korto por sperti la vivon de antikva ĉina vilaĝo, aŭ pli ĝuste, por vidi la vivmedion de riĉa familio en antikva Ĉinio. Nun en la vilaĝo alia eleganta antikveca domo estas konstruata. Kiam ĝi estos starigita, oni ekspozicios en ĝi antikvajn ĉiutagajn necesajojn, produktajn instrumentojn kaj metiartaĵojn kun loka originaleco.

Oni preparas por la turistoj du ĉevalĉarojn. Ĉe la vekiĝo de la naturo en printempo turistoj povas veturi sur kampvojo por ĝui la pejzaĝon.

Ekbruo de ĝojo rompis la idilian kvieton. Nun la primora turismo venas al sia kulmino: nupto en antikva nordĉinia vilaĝo prezentata speciale por la turistoj. La plej brila parto de la prezentado estas bonvenigo de novedzino, ke ne nur alilandanoj, sed ankaŭ la nuntempaj ĉinoj trovas ĝin interesa. La longa vico de orkestro, irante fronte, ludas altpitĉajn kaj briltonajn *turna*-ojn kaj frapas surdigajn tamburojn kaj gongojn. Sekvas du palankenoj, ruĝa kaj blua. Kiam la palankenoj atingas la hejmon de la novedzo, la novedzino, subtenata de aliaj, iras el la palankeno, en bunta ŝalo, ruĝa vualo kaj bela diademo; la novedzo kun ruĝa rubando kondukas la novedzinon antaŭ la halon, kaj tiel komenciĝas la geedziĝa ceremonio. Laŭ la ordono de la ceremonia prezidanto la novgeedzoj riverencas unue al la ĉielo kaj la tero, poste al la (bo)gepatroj, kaj fine unu al la alia. Post tio la novedzo kondukas la novedzinon en la nuptan ĉambron. La antikva kutimo ege interesas la turistojn. Aprile de la pasinta jaro juna itala paro venis ĝuste je la unua datreveno de sia nupto kaj naskiĝtago de la juna sinjorino. Rigardinte la prezentadon, ili ekscitiĝe portis palankenon kaj poste simple surmetas sur sin nuptajn kostumojn. Ili riverencis al la ĉielo kaj la tero kaj

(Daŭrigo sur p. 43)

NOVAJ POŝTKARTOJ ELDONITAJ

DE ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

(kun 4-lingvaj klarigoj: ĉina,
Esperanta, angla, japana)



Dek Famaj Floroj de Ĉinio

En 1987, ĉinaj ekspertoj el diversaj lokoj elektis umefloron, peonion, krizantemon, orkideon, ĉinan rozon, rododendron, kamelion, lotusfloron, osmanton kaj narcison kiel dek plej famajn tradiciajn florojn de Ĉinio. Ili, kreskante en malsamaj medioj, havas variajn kolorojn, aromojn kaj formojn.

10X14.7 cm. 10 pecoj. 87-CEsEJ-582

Orkideo

La orkideo estas unu el la ok famaj florplantoj de Junnan-provinco de Ĉinio. Ĝi havas altan valoron de aprecado pro siaj floroj belaspektaj, brilkoloraj kaj bonodoraj. La 11-specaj orkideoj en tiu ĉi serio de poŝtkartoj kreskas en densaj arbaroj de malproksimaj montoj de Ĉinio.

10X14.7 cm. 10 pecoj. 87-CEsEJ-561

Pejzaĝoj de Ŝanhajo

Ŝanhajo, la plej granda industria kaj komerca urbo de Ĉinio, situas sur la delto kie Jangzi-rivero enfluas en la Orientan Ĉinan Maron. Kun delikataj ĝardenoj en rafinita stilo, majestaj antikvaj temploj, modernaj konstruaĵoj kaj luksaj hoteloj, Ŝanhajo, kiel unu el la ĉinaj urboj plej frue malfermitaj al la eksterlando, altiras al si pli kaj pli da vizitantoj en-kaj eksterlandaj.

10X14.7 cm. 10 pecoj. 87-CEsEJ-562

Liĝjang-Rivero

La montoj kaj riveroj de Guĵlin estas delonge konataj kiel la plej belaj sub la ĉielo. Interalie Liĝjang-rivero, pli ol 400 kilometrojn longa, rimarkinde kompletigas la lokan belecon. La meza parto de la rivero, de Guĵlin ĝis Jangŝuo, akompanata de ĝibaj karstaj montetoj, estas unu el la famaj pitoreskejoj de Ĉinio. Ambaŭbordo de la fluo estas groteskaj montpintoj kaj ĉarmaj vilaĝoj, kiuj speguliĝas en la klara akvo.

10X14.7 cm. 10 pecoj. 87-CEsEJ-589

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPĈ

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN),
Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Vizito al la Ŝtona Montvilaĝo

En la Ĝenning-a Buĵi- kaj Mĵaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio en la meza parto de Guĵoŭ-provinco, la plej vasta karsta regiono de la mondo, loĝas 110 000 buĵioj. Bajŝuj-rivero preterfluas la lokon kaj formas multajn grandiozajn belajn akvofalojn pro la granda niveldiferenco kaj troa torenteco. Inter ili estas Hŭangĝuŝu, la plej fama akvofalo en Ĉinio. La akvofalo estas 66.8 metrojn alta kaj 81.2 metrojn larĝa. La torenta akvo flugas rekte malsupren, kvazaŭ elverŝita neĝo, faras sennombrajn ondojn en la Rino-cera Lago ĉe la rokmura piedo. La

malrapide leviganta akvonebulo altas centojn da metroj kaj vualas la akvofalon. En la bela natura medio troviĝas Ŝtona Montvilaĝo de buĵioj, ĉar tie estas mondo de ŝtono.

La vizito al la Ŝtona Montvilaĝo estis neforgesebla por mi kaj miaj kamaradoj. La vilaĝo distancas ne malproksime de la akvofalo, sur ĝia alta vilaĝa pordo okulfrapas tri grandaj gravuritaj ideografiaĵoj "Ŝitoŭ Ĝaj (Ŝtona Montvilaĝo)". Gastamaj buĵioj ludis bronzajn tamburojn kaj tamtamojn, surnaojn, flutojn kaj

trumpetojn por bonvenigi nin, malproksimajn gastojn.

Transpasinte la vilaĝpordon, mi kvazaŭ eniris ŝtonan mondon: La stratoj estas pavimitaj per ŝtonaj platoj, la kortomuroj kaj domoj estas konstruitaj el ŝtonoj, larĝaj kaj maldikaj ardezoj tegmentas la domojn, eĉ la tabloj, benkoj, kuvoj, mueliloj, pistujoj kaj kuirfornoj estas faritaj el ŝtono. Dum vizito al la vilaĝo ni ĉie vidis ŝtonajn objektojn, ni ascendis ŝtonajn ŝtuparojn, trairis ŝtonajn pontojn kaj pordojn, eniris ŝtonajn domojn kaj sidiĝis sur ŝtonajn benkojn. La akompananto en la vizito diris al mi, ke ĉiuj viroj en la vilaĝo estas ŝtontajlistoj kaj ili heredigas la metion de generacio al generacio. Kiam iu familio konstruas sian domon, la tuta vilaĝo helpas ĝin. Ŝtona muro alta je kelkaj kaj eĉ dekelkaj metroj povas esti konstruita firme sen mortero. La tegmentoj estis skvame kovritaj per maldikaj ardezoj. La gravurado de drakoj kaj feniksoj estis plenumitaj de majstraj ŝtontajlistoj.

La buĵioj estas nacieco kun longa historio. Iliaj prapatroj estis tieaj indiĝenoj. Ĝis nun ĉe ili ankoraŭ konserviĝas historiaj spuroj de klana komunumo surbaze de sama loko kaj sama familio. Ofte la montvilaĝoj estas loĝlokoj senescepte de buĵioj kun sama familia nomo. La 220 familioj de la Ŝtona Montvilaĝo havas saman familian nomon U. Ĝiaj vilaĝanoj nomas unu alian onklo, frato aŭ fratino laŭ


Pejzaĝo de la Ŝtona Montvilaĝo



generacieco. Ili devas geedziĝi al bujioj de alia vilaĝo kun malsama familia nomo.

Ĉe ili la viroj laboras surkampe kaj la virinoj ŝpinas kaj teksas hejme. Preskaŭ ĉiuj virinoj havas unu man-movan ŝpinilon. Ĉiujare, krom la surkampa okupata sezono de du-tri monatoj, ili tage laboras surkampe, vespere ŝpinas kaj teksas dome. En vintra libera tempo ili ŝpinas kaj teksas tuttage. Ili povas mem kulturi, sensemigi kotonon, ŝpini, teksi, tinkturi kaj kudri veston. La virinoj portas nigran bluzon, butonatan ĉe la dekstra flanko, kun borderitaj manikoj kaj pasamentoj, duonsfera brodita desegnaĵo sur la ŝultroj, longan multplisitan jupon el vaks-tinkturita nankeno kun bluaj desegnaĵoj sur blanka fono kaj kvadratan brokatan kaptukon.

Mi tie rigardis vaksan tinkturon de bujiaj virinoj. La vaksa tinkturo daŭris centojn da jaroj. Knabinoj komencas lerni tion en la dekjara aĝo. Ili fluidigis abelan vakson, trempis en ĝi kupran tranĉilon kaj pentris per ĝi desegnaĵojn sur blanka tolo. Sekiginte la vaksajn desegnaĵojn, ili metis la tolon en tinkturan



En la Ŝtona Montvilaĝo


vazegon por fari ĝin blua aŭ nigra, sekve brogis la tolon en kaldrono por degeligi la vakson, kaj fine la vakse pentritaj desegnoj restas bluigitaj. La Ŝtona Montvilaĝo estas nomata "hejmloko de buj-nacieca vakstinkturado", ĝiaj vakstinkturaĵoj estas kvalite pli

altaj ol tiuj de aliaj lokoj, ili havas pli delikatajn kaj klarajn desegnaĵojn neniam senkoloriĝintajn. Mi tie aĉetis kelkajn poŝtukojn. La poŝtukoj portas desegnojn de floroj, herboj, insektoj, fiŝoj, birdoj kaj bestoj, kiuj estas linie simetria, desegne harmoniaj kaj impresas antikvece kaj gracie.

Buji-aj knabinoj en vaksa tinkturado



Mi aĉetis ĉe junulino tornistron broditan en forta nacieca gusto. La nigra sako surhavas belajn brodaĵojn el koloraj silkaj fadenoj. La vakstinkturaĵoj, brodaĵoj kaj brokatoj estas tradiciaj metiartaĵoj de la bujioj. En la lastaj jaroj la vakstinkturaĵoj kaj brokatoj de bujioj vendiĝis eksterlande. En 1981 buji-a knabino de la Ŝtona Montvilaĝo teksis romban brokaton longan je 1.7 metroj, ĝi eksponiĝis en Usono kaj estis laŭdata de diverslandaj aprecantoj. Iuj alilandaj turistoj al la akvofalo Hŭanggŭoŝu speciale venis al la Ŝtona Montvilaĝo por aĉeti vakstinkturaĵojn kaj brokatojn en la celo konservi ilin kiel valorajn naciecajn metiartaĵojn. ■



Fosilia dinosaŭro en la muzeo

En hejmloko de dinosaŭroj

En la lastaj jaroj oni elterigis grandan kvanton da dinosaŭraj fosilioj en la urbo Zigong, Siĉŭan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. La urbo, konata kiel produkto de putsalo dum 2 000 jaroj, nun estas honorata per hejmloko de dinosaŭroj.

Dinosaŭroj estis mezozoikaj rampuloj. Ili estis multspecaj kaj malsamaj en la formo, grandeco kaj vivmaniero. Grandaj dinosaŭroj longis dekojn da metroj kun pezo de 40-50 tunoj kaj la malgrandaj longis malpli ol unu metron. Ili, karnovoraj kaj herbovoraj, vivis sur tero aŭ ĉe marĉejo. En mezozoiko (antaŭ ĉ. 65—250 milionoj da jaroj) dinosaŭroj estis en sia prospero. Tiam dinosaŭroj rampis sur tero, naĝis en akvo kaj flugis en aero. Kaj en la lasta periodo de mezozoiko ili ĉiuj malaperis sur la tero. Nun oni konas ilin nur laŭ iliaj fosilioj. La granda faka Muzeo de Fosiliaj Dinosaŭroj en Zigong estas konstruita sur la ruino de grotoj kun dinosaŭraj fosilioj. Ĝi prezentas la mondon de dinosaŭroj ekzistintaj en


mezozoiko.

Antaŭ pli ol 70 jaroj oni trovis dinosaŭran fosilion en la regiono de Zigong. Somere de 1972 iu geologo, kiu prospektoris silvinon en Daŝanpu de Zigong, trovis dinosaŭrajn fosiliojn en nudaj stratumoj apud ŝoseo. Komenĉiĝis nova elfoso. Multaj ĉinaj arkeologoj laboris en la montetaro kaj malkovris kontinuan fosilian vejnon. Ili konstatis la lokon kiel trezorejon de fosilioj. En oktobro de 1977 oni elfosis tie la unuan fosilian dinosaŭron pezan 40 tunojn.

En la regiono estas malkovritaj pli ol 50 punktoj de fosiliaj dinosaŭroj, inter kiuj la plej okulfrapa estas aro da fosiliaj dinosaŭroj de Daŝanpu 11 km. fore de la centro de la urbo. Tie kuŝas fosiliaj dinosaŭroj unuj sur aliaj kaj la loko ŝajnas grandega tombejo de dinosaŭroj. En la interspaco de ĉ. 3 000 kvadrataj metroj estas elfositaj pli ol 70 fosiliaj dinosaŭroj, el kiuj 30 haŭas kompletan ostaron. Ili vivis antaŭ 160 milionoj da jaroj. Preskaŭ ĉie

en la grejsaj tavoloj de Daŝanpu dikaj 4-5 metrojn troveblas fosilioj, inter kiuj la plej multaj estas tiuj de saŭropodoj (*Saur-poda*), poste tiuj de ornitokioj (*Ornithischia*) kaj stegosaŭroj, kaj ankaŭ tiuj de malmultaj alispecaj dinosaŭroj. Krom fosiliaj dinosaŭroj, oni trovis ankaŭ aron da fosiliaj ostoj kaj kranioj de paleovertebruloj.

Ankaŭ en aliaj partoj de la mondo malkovriĝis dinosaŭraj fosilioj samtempaj kiel tiuj de Daŝanpu, tamen ili lokiĝis sporade kaj estas malmultaj. La fosilioj de Daŝanpu estas grandkvantaj, multspecaj, lokitaj dense kaj konservitaj bone. Tio malofte vidiĝas en la mondo. De Daŝanpu oni trovis spuron kaj akiris materialojn por esplori pri la osta klasifiko, fiziologiaj ecoj, origino, evoluo kaj pere de la dinosaŭroj. Kun diversaj fosiliaj dinosaŭroj de Zigong, ĉinaj arkeologoj faris esploron pri ekologio de dinosaŭroj, paleogeografio, paleoklimatologio, paleontologio k.a., kaj akiris iujn sukcesojn.




Fosilia kranio de dinosaŭro

Por bone konservi la fosiliajn dinosaŭrojn de Daŝanpu, fine de 1982 la ĉina registaro decidis en la loko konstrui naturan muzeon — la Muzeon de Fosiliaj Dinosaŭroj de Zigong en Siĉŭan. Ĝi kovras 25 000 kvadratajn metrojn kaj konsistas el eksponejo, verda zono kaj kromdomoj. La eksponejo, kun plankareo de ĉ. 6000 kvadrataj metroj, konsistas el la salonoj de dinosaŭra historio, de fosiliaj dinosaŭroj, de grejsaj tavoloj kun fosiliaj dinosaŭroj kaj aliaj tri salonoj.

La eksteraĵo de la eksponejo estas masonita el naturaj grejsaj pecoj. Ĝi aspektas kiel granda groto de mezozoiko. Enirinte tra ĝia fronta pordo simila al disfendita roko, oni sentas sin kvazaŭ en dinosaŭra palaco de la antaŭhistoria periodo. En la teretaĝo de la eksponejo estas tombejo de dinosaŭroj kun areo de 1900 kvadrataj metroj, kiu konsistas el la subtera salono kaj tiu de grejsaj tavoloj. En la grejsaj

tavoloj horizontale disetendiĝintaj vidiĝas interkrucitaj fosiliaj ostoj de dinosaŭroj. Apogante sur

Tie oni malkovris fosiliajn dinosaŭrojn.




balustrado, oni povas rigardi la miniaturon de la tombejo de gigantaj dinosaŭroj kaj ĝui mirindaĵon de la naturo.

En la impona salono eksponiĝas 10 diversgrandaj rekunigitaj fosiliaj ostaroj de dinosaŭroj. Du fosilioj de herbovoraj plesiosaŭroj nomataj Emej-dinosaŭroj de Siĉŭan-provinco, ĉiu longas 20 metrojn kaj altas 10 metrojn. Apud ili estas malgranda familio de dinosaŭroj. Dinosaŭrido sin premas al siaj gepatroj, trinkantaj kaj herbovorantaj. Ĉe la alia flanko, karnovora dinosaŭro, tirano de dinosaŭroj, ĵetas sin kontraŭ stegosaŭron haste rezistantan. Malgranda ornitokio estas ekkuronta tuj, pterodaktilo flugas kaj fiŝsaŭro naĝas ĝoje. Tie ree prezentiĝas la sceno el la naturo de Daŝanpu en la antaŭhistoria periodo, en ĝi interkruciĝas riveroj, prosperas plantoj, ĉie skrapas arboj kaj diversaj dinosaŭroj kaj aliaj bestoj konkuras unuj kontraŭ aliaj. ■

Manĝbastonetoj — mirinda manĝilo

de LAN ŠAN



Manĝbastonetoj uzataj tiamaniere

Manĝbastonetoj estas fiero de la ĉina nacio. Ili kune kun tranĉiloj kaj forkoj de eŭropanoj estas manĝiloj furorantaj en la nuna mondo.

En la prahistorio oni ne sciis, kio estas manĝiloj. Tiam ili prenis manĝaĵojn per siaj manoj. En longa tempo la antikvaj ĉinoj

renkontis malfacilon, kiam ili prenis varman kaĉon. Ili do prenis laŭplaĉe herbotigojn aŭ bastonetojn por sin helpi. En la longtempa uzado ili pretervole kaj iom post iom posedis la kapablon laŭvole preni manĝaĵojn per la bastonetoj. Jen naskiĝis la primitivaj manĝbastonetoj. Antaŭ pli ol 1 000 jaroj oficiale aperis manĝbastonetoj,

noto pri ili tiam vidiĝis en antikvaj literaturoj.

La manĝbastonetoj poste enkondukiĝis en multajn landojn de Azio. Ili fariĝis ĉefaj manĝiloj ne nur por la ĉinoj, sed ankaŭ por la koreoj kaj japanoj.

Paro da manĝbastonetoj havas plurajn funkciojn en manĝado. Per ili oni povas tenajli, teni, levi

Manĝbastonetoj kaj pladoj



kaj kirli mute pli facile ol per tranĉiloj kaj forkoj. Oni malfacile enbuŝigas vermicelojn farunajn kaj fabo-amelajn kaj similajn manĝaĵojn per forkoj kaj kuleroj, sed tion facile plenumas per bastonetoj. Oni povas diri, ke manĝbastonetoj funkcias kiel longigitaj homaj manoj. Ĝenerale dirite, per manĝbastonetoj oni povas fari ĉion anstataŭ per fingroj, dume la manĝbastonetoj ne timas varmon, nek malvarmon.

La manĝbastonetoj, kvankam simplaj, tamen en la uzado perfekte praktikas la levstangan principon. Iu japana erudito studis la strukturan principon de mekaniko pri manĝbastonetoj kaj mezuris tion per instrumentoj. Li diris, ke uzi manĝbastonetojn en manĝado koncernas moviĝon de pli ol 30 artikoj kaj pli ol 50 muskoloj, kiaj tiuj de fingro, polmo, pojno, brako kaj ŝultro. La nervoj de tiuj artikoj kaj muskoloj ligiĝas kun la cerbaj nervoj. Tio estas utila ekzerco ankaŭ por la

cerba kortekso. Tial iuj fiziologoj asertas, ke uzi bastonetojn en manĝado utilas al la homa sano kaj precipe al la kresko de infanoj. Uzi manĝbastonetojn en infaneco povas lertigi iliajn manajn muskolojn kaj ekzerci la cerbon. Nun iuj eksterlandanoj ekuzis ĉinajn manĝbastonetojn en manĝado.

Manĝbastonetoj ne nur estas manĝiloj, sed ankaŭ havas eksterordinaran utilon en la popola vivo de Ĉinio. Estas interesa la danco de manĝbastonetoj, popola danco de mongoloj de Ĉinio. Kun fasko da manĝbastonetoj en la manoj la dancantoj frapas jen siajn ŝultrojn kaj manojn, jen talion, gambojn kaj piedojn, eligante ritman sonon. Frapante, ili dancas, jen sin turnante, jen surgenuante. Moviĝas ankaŭ iliaj ŝultroj kaj talioj. La dancmovoj estas graciaj, ritmo-fortaj kaj interesaj.

La ĉinoj uzis manĝbastonetojn jam milojn da jaroj. Pro la

malsamaj naturaj medioj kaj vivaj kondiĉoj oni faras manĝbastonetojn el malsamaj materialoj. La plej ordinara manĝbastoneto estas bambuaj kaj lignaj, dum la oraj, arĝentaj, jadaj, eburaj, kupraj kaj feraj estas maloftaj. Nun estas ankaŭ plastaj manĝbastonetoj. Iliaj formoj estas cilindraj kaj kvadrataj, ĝenerale dikaj supre kaj maldikaj malsupre. La delikataj manĝbastonetoj surhavas pentraĵon, ĉizitajn ideogramojn kaj eĉ gravuraĵojn ĉe la supra parto. La manĝbastonetoj produktitaj en malsamaj lokoj ĝenerale portas la lokajn trajtojn. Ekz. La Tjanĝu-aj manĝbastonetoj de Hangĝou estas faritaj el maldikaj bambuoj kreskantaj sur Tjanĝu-monto kun solida interno, post pli-ol-dek-foja prilaborado, kiaj segado de bambuo, raspado de la ekstremo, vaksado kaj tegado. La Tjanĝu-aj manĝbastonetoj estas ĝenerale uzataj kaj havas certan aprekan valoron. ■

KORESPONDI DEZIRAS

- * Laste kreita Pola-Ĉina Rondo en Varsovia Filio de P.E.A. petas pri ĉinaj turismprospektoj, afiŝoj, libroj kaj bultenaj eldonaĵoj, pm. bk. kalendaretoj ktp. por konstanta ekspozicio pri Ĉinio en nia klubo. Volonte ligos kontaktojn kun ĉinaj esp-istoj situantaj proksime de norda limo. Adr.: Teresa Jankowska, Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42, PL-00921 Warszawa, Pok. 120, Pollando.
- * 22-j. agronoma teknikisto kaj amatora pentristo volas kor. tm. pri pentrarto, naturo, vojaĝado, numismatiko kaj amikeco, interŝanĝi pm. kaj bk. Adr.: Gergely Andras, Sinmartin 230, Jud Harghita Cod 4133, Rumanio.
- * Dez. kor. tm., interesiĝas pri teatro, muziko, sporto, kaj kolektas bildkartojn. Adr.: Celina Kijonka, ul. Jednosci Nanodowej 2E/5, 44-224 Knurow, Pollando.

- * Volas kor. kun 14-18-j knabinoj. Adr.: Kovacs Jozsef, Magyarorsz. Hatvan, Beke ut 52, 3000, Hungario.
- * Dez. kor. tm. Esperanta Klubo en Kolegio, 49490 Noyant, Francio.
- * 45-j. Ralf Lindberg dez. kor. tm., ŝatas metion, naturon k. fotografion kaj kolektas pm. Adr.: Muraregatan 9, S-693 00 Degerfors, Svedio.
- * Dez. kor. tm. geedzoj Stefka kaj Zjubomir Vasilevi, Zelenka 62, 5000 Veliko Jarnovo, Bulgario.
- * 21-j. studento dez. kor. pri ĉiuj temoj kaj interesiĝas pri muziko, vegetarismo, diversaj religioj de la mondo. Adr.: Marek Wojtaszek, ul. Sienkiewiczza 45/6, 62-600 Kolo, Pollando.
- * Dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj pri literaturo, muziko, arto kaj kulturo. Skribu al: Klaus Wittwer, Pecsers Strabe 8, Schwerin i. M., DDR-2790.
- * 50-j. instruistino dez. kor. tm. esperante aŭ germane pri arto, vojaĝo, emancipado kaj kolektas paperajn buŝtukojn. Gisela Freise,

Parchimer Str. 6, Schwerin, DDR-2792.

- * 42-j. artisto dez. kor. kun gesamideanoj pri belartoj. Laszlo Szlauko, H-1021 Budapest, Kuruclesi 50, Hungario.
- * 36-j. esperantisto, fraŭlo, dez. kor. kun 30-40-jaraj fraŭlinoj. Ben Parkinson, Pasaje Lapanto, 6, 4^o, 3B, 14011-Kordovo, Hispanio.
- * Geesp-istoj - komencantoj el Brazilo dez. kor. tm. pri diversaj interesoj. Adr.: San Karlo Esperanto-Klubo, Caixa Postal 164, CEP: 13560, Sao Carlos - SP, Brasil.
- * Dez. kor., interesiĝas pri arto de orientaj landoj, kol. pm. bk. Marike Laht, Paikese pst, 89, 200 009 Tallinn, Estonio, Sovetunio.
- * 3 geknaboj (11, 10 kaj 9 jaraj) dez. kor. kun samaĝaj amikoj. Skribu al Cynthia, Anne, David c/o Esperanto Klubo, 5 Rue des Teinturiers, 42000 Saint-Etienne, Francio.
- * 11-jara knabo dez. kor. kun tutmondaj esp-istoj. Dobromil Plesnar, Dokerska 23 M 26, 54142 Wroclaw, Pollando.

Ĝingĝoŭ, regiono de antikva kulturo kaj novaj industrioj

Teksto de CAŬ BAJLONG

Fotoj de CAJ HAJFENG

Veturinte el la Tri Gorĝoj, mia ŝipo eniris en Ĝjanghan-ebenaĵon (la baseno de la riveroj Jangzi kaj Hanŝuj). Jangzi-rivero pasis tra Ĝingĝoŭ de Ĝiceng-urbo en Hubej-provinco ĝis la orienta parto de Ĝjanli-gubernio. Tiu parto longa je 423 km. de la rivero nomiĝas Ĝingĝjang-rivero. Ĝingĝjang fluas sur la ebenaĵo zigzage kaj malrapide, tial la tero kaj sablo venintaj de la supra parto de Jangzi-rivero sedimentis jaron post jaro tie en la riverlito; sekve de tio la riverlito pli altiĝis ol la tersurfaco ambaŭborde. Laŭ historia dokumento, jam en 317 p.K. oni komencis konstrui digojn por bridi la inundon. En la 14-a

jarcento fragmentoj de digoĵ kunligiĝis. Tiam Ĝingĝjang fariĝis "supertera rivero".

La rivervojo en malsupra Ĝingĝjang estas pli kurbiĝplena. Laŭ rekta linio, la distanco inter la du ekstremoj de tiu parto estas nur 80 km., sed pro la 16 grandaj kurbiĝoj la rivervojo longiĝas ĝis 240 km. Pro tio, ke la akvo pasas malfacile, kaj ke la digo estis malofte riparata, ofte okazis inundo. Dum la 352 jaroj de 1497 ĝis 1849 breĉiĝo de la digo okazis meznombro en ĉiu 15-a jaro. Ĉiu breĉiĝo de la digo kaŭzis al la popolo grandan perdon de vivoj kaj havaĵoj. En 1931, inundo de Ĝingĝjang dronigis pli ol 140 mil


homojn kaj suferiĝis ĉirkaŭ 30 milionoj da homoj. Tie cirkulas la onidiro: Ĝingĝoŭ timas ne militon, sed digobreĉiĝon.

FORFLUIGEJOJ DE ĜINGĜJANG

Dum la lastaj 30 jaroj, la popola registaro metis grandan atenton sur la digon de Ĝingĝjang. Ĝi ripariĝis ĝin ĉiujare, konstruigis la forfluigejon de Ĝingĝjang en 1952, kaj poste, la forfluigejon de Hanŝuj-rivero ĉe Duĝjataj.

La forfluigejo de Ĝingĝjang situas en Gong'an-gubernio, sude de la rivero. Ĝi okupas 920 kvadratajn kilometrojn kaj povas teni ĉirkaŭ 6 miliardojn da kubmetroj da akvo. La ĉefa parto de la konstruaĵo konsistas el la enlasa kluzo Tajpingkoŭ ĉe la norda fino, kun 52 pordoj kaj longo de 1 054 m., la reguliga kluzo Hŭangŝantoŭ ĉe la suda fino, kun 32 pordoj kaj longo de 337 m., ellasa kluzo kaj digoĵ ĉirkaŭe. Kiam la flukvanto leviĝas kaj superas la tralasan povon de la rivero, oni povas malfermi la kluzon kaj konduki la superakvon en la forfluigejon.

La granda konstruo de la forfluigejo estis plenumita en 75 tagoj. En 1954 okazis inundo malofte en la lasta jarcento, la digo kaj Uhan, la plej granda urbo en centra Ĉinio, estis minacataj.



Malfermite, la 54-porda akvoenlasa kluzo rapide forkondukis kvinonon de la inundo, kaj efike malaltigis la diluvan kulminon. Unuafoje la konstruaĵo montris sian povon. De multaj jaroj Ĝingĝjang-digo kaj aliaj efike protektis la 23 000 000 muojn (1 muo = 1/15 hektaro) da fekundaj kampoj, la 13 000 000 loĝantojn, la novajn urbojn, fabrikojn, minejojn kaj entreprenojn ambaŭborde de la rivero.

Starante sur la digo mi vidis jenan bildon: unuflanke de la digo rivero torentas, dum aliflanke staras urbo kun fabrikoj kaj bonordaj stratoj. La akvonivelô de la rivero pli altas ol la tegmentoj de unuetaĝaj domoj. Vidate de malproksime, la ŝipoj kvazaŭ veturus sur la tegmentaro. Tie estas Ŝaŝi, urbo kun prosperaj industrioj.

URBO KUN LEVIĜANTAJ TEKSTILA KAJ MALPEZAJ INDUSTRIOJ

Ŝaŝi de antikve estas transiga centro de materialoj kun prosperaj komerco kaj metiindustrioj. En 1895 oni faris ĝin aperta havenurbo al la eksterlando. Ĝis antaŭ 1949, kiam Ĉinio liberiĝis, Ŝaŝi ĉefe estis konsumata urbo, havante apenaŭ industrion. Nun en la urbo ĉie vidiĝas nove konstruitaj domoj kaj fabrikoj. Bonorde staras publikaj konstruaĵoj kaj domblokoj de urbanoj. Jam formiĝis ĉi tie industria sistemo kun tekstila industrio kiel la kerno. Tie estas ankaŭ fabrikoj de mekaniko, metalurgio, ŝipfarado, elektroniko, optikaj aparatoj, konstrumaterialoj, manĝaĵoj, pakumo k.a. La tekstila industrio okupas superan pozicion en la enlanda kaj eksterlanda komercaj konkurencoj. Se temas pri la produktiveco de la tekstila industrio, la urbo nun posedas 300 000 spindelojn, 8 000 teksmaŝinojn, pli ol 9 000 lan-spindelojn, kaj jaran produktopovon de 10 000 tunoj da trikaĵoj, jaran produktopovon de



En la Ŝaŝi-a Akvoproviza Servo

4 800 tunoj da kemia fibro, kaj jaran produktopovon de 240 milionoj da metroj da pres-tinkturita ŝtofo. Kun kompleta tekstila sistemo ampleksanta branĉojn de kotona, kemia, lina, lana, kaj silka teksado kaj tinkturado, trikado kaj teksmaŝino-farado, Ŝaŝi funkcias kiel unu el la gravaj tekstilaj bazlokoj de Ĉinio.


En la lastaj jaroj, ankaŭ malpezaj industrioj de ĉiutagaj bezonaĵoj rapide disvolviĝis en Ŝaŝi. Nove konstruitaj fabrikoj de fridujoj, lavmaŝinoj, termosoj kaj ĉiutagaj kemiaĵoj fariĝis apogilo por prosperigo de la industrioj de la urbo.

La totala industria produktovaro de Ŝaŝi en 1949 estis 10 milionoj da jŭanoj kaj en 1986 ĝi atingis 2 miliardojn da jŭanoj. La meznombra jara kresko en la lastaj 37 jaroj estas 14.8%. La pokapa industria valoro estas 10 mil jŭanoj. Ĝi jam fariĝis unu el la plej rapide evoluantaj industriaj urboj de Ĉinio en la lastaj jaroj.

Kio estas la ĉefa faktoro de la rapida disvolviĝo de ĝiaj tekstila kaj malpezaj industrioj? La

respondo mi trovis en intervjuo de Liŭ Ĉŭanke, la estro de la Ŝaŝi-a Littuka Fabriko kun historio de pli ol 30 jaroj. Li diris, ke la ĉefaj produktaĵoj de fabriko devas esti fortaj en konkurenco ne nur sur la enlanda merkato, sed ankaŭ sur internacia merkato. Ekzemple, la fabriko prenas atutan fremdlandan produktaĵon kiel sian normon, kaj ĝiaj produktaĵoj estas tre ŝatataj de komercistoj de pli ol 50 landoj kaj regionoj. En la specimena montrejo de la fabriko ekspoziciigas ne nur produktaĵoj kun tradiciaj ĉin-stilaj desegnoj de floroj, sed ankaŭ specoj kun romantikaj geometriaj figuroj en internacie furoraj koloroj.

Estas tiaj malproksimvidaj entreprenistoj, kiuj, sub la ŝtata politiko malfermi la pordon al aliaj landoj kaj vigligi ekonomion enlende, metas aleksteran ekonomion sur gravan lokon, enkondukis avangardajn teknologiojn kaj optimumigis produktan strukturon. De post 1983, en la urbon enkondukitaj estas pli ol 200 avangardaj laborlinioj kaj gravaj pecoj; pli ol 40 specoj da produktaĵoj estis produktitaj laŭ internaciaj normoj. Interalie, la



Branĉo de Ĝingĝjang-rivero

diversaspecaj kolorriĉaj termosoj kaj la fridujo "Ŝasong" farita en ĉina kaj alilanda teknologio estas bonvenaj sur la en- kaj eksterlandaj merkatoj, kaj la ofertado ne povas kovri la mendadon.

LA CENTRO DE ĈU-KULTURO

Tio, kio plej min interesis dum mia vizitado sur Ĝjanghan-ebenaĵo, estas Ĉu-kulturo de Ĝingĝoŭ. La nuna nomo de Ĝingĝoŭ estas Ĝjangling, urbo distanca de Ŝaŝi je 4 km. Enirinte la urbon Ĝingĝoŭ, oni sin trovas kvazaŭ en antikva kastelo. La urbomuro, la elegantaj antikvaj konstruaĵoj kun elstaraj aleroj kaj lakitaj traboj kaj kolonoj pentritaj kaj ĉizitaj atestas, ke ĝi estas fama historia urbo. Laŭ historia noto, en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) la urbo Ĝjnan de Ĉu-regno situis en la proksimo. Ĝjnan estis la plej granda kaj plej prospera urbo en la sudo de la tiama Ĉinio. Dokumento priskribis ĝian prosperon, ke "vesto nova en mateno fariĝas malnova en vespero (pro interpuŝado en homsvarmoj)".

Ĝugong-palaco de Ĉu-regno troviĝis sur la bordo de Jangzi-rivero. Oni priskribis la palacon jene: "Centfutaj pavilonoj ĵetas sian bildon sur la akvon, en la pavilonoj ĉarmas aroj da belulinoj el la nordo."

La urbo servis kiel la ĉefurbo de Ĉu-regno 411 jarojn. Vizitis ĝin multaj famuloj, kiaj Konfuceo, Ĝuang Zi kaj Mo Zi. Ankaŭ patriota poeto Ĉju Jŭan (340-278 a.K.) oficis por la kortego ĉi tie.

En la Muzeo de Ĝingĝoŭ mi vidis la ekstrakton de Ĉu-kulturo. Tie konserviĝas multaj silkaĵoj elfositaj el tombo de Ĉu-regno. La silkaĵoj restas belaj kun delikataj desegnoj. Inter ili estas kolorsatenaĵoj, borditaj ĉemizoj kaj litkovriloj. Sur la litkovriloj troviĝas figuroj de starantaj kaj dancantaj feniksoj, spiralaj drakoj kaj dancantaj homoj en fluaj linioj, krome troviĝas ankaŭ geometriaj figuroj de spiraloj, romboj kaj rektanguloj.

Lakaĵo estas unu el la delikataĵoj de Ĉu-kulturo. En 1965 oni elfosis surtablan ekranon kolore lakitan, kiu longas je 54 cm.

kaj altas je 15 cm. Sur ĝi estas vivoplena bildo de 55 konkure batalantaj bestoj, kiaj ranoj, cervoj, serpentoj kaj paseroj, en aĵuro kaj reliefo. La lako restas en sia freŝbrila koloro.

Ankaŭ la muziko de Ĉu-regno atingis konsiderinde altan nivelon. En 1970 oni trovis ĉe la suda muro de Ĝjnan-urbo 25 ĉing-ojn* en serio kun koloraj pentraĵoj. La belaj sonoj formas precizajn skalojn. Eĉ hodiaŭ oni povas ludi oreplacajn melodiojn per ili.

Post la unuiĝo de Ĉinio ekde Ĉin-dinastio (221-207 a.K.), la ĉefurbo de Ĉu-regno estis ruinigita. La Monto Fenikso ĉe la sudorienta angulo de Ĝjnan-urbo fariĝis tombejo en Ĉin- kaj Handinastioj (221 a.K. — 220 p.K.). En 1975 tie arkeologoj prifosis 33 tombojn kaj elfosis multe da delikataj lakaĵoj kaj aliaj raraj objektoj, inter ili estas antikva kadavro el la okcidenta Handinastio (206 a.K. — 8 p.K.).

La kadavro konserviĝas en hermetika termostata ĉambro en la Muzeo de Ĝingĝoŭ. Oni povas vidi ĝin tra vitra ĝiceto. Laŭ la elfositaj dokumentoj, la mortinto entombiĝis 60-jara en 167 a. K., t.e. dumil jarojn antaŭe. Ĝi pezas 52.5 kg, altas 1.60 m. Eĉ hodiaŭ la molaj histoj, kiaj haŭto kaj muskoloj, restas elastaj, kaj la artikoj en la membroj estas kurbigeblaj. La 32 dentoj ĉiuj restas firmaj. En sekco oni trovis, ke la meningaj vejnoj estas klaraj, organoj en torako restas senmankaj. La subhaŭta fibro restas simila al la novaj. La sendifekte konservita kadavro markas, ke la tiama kontraŭputra tekniko de Ĉinio jam atingis altan nivelon. ■

* Ĉing-o estas antikva ĉina frap-instrumento el ŝtono aŭ metalo. En ludado oni ofte uzis vicon da ĉing-oj, ĉiu kun aparta ton-alto.



Murego de la antikva urbo Ĝjangling




En la Littuka Fabriko de Ŝaŝi




Ŝaŝi ĉe Jangzi-rivero



Antikva lakita ak-
voĉerpilo trovita
en Ĝjangling



Reguligaj kluz-
pordoj de akvo-
ellasa konstru-
aĵo de Ĝingĝjang





Nova dombloko en Ŝaŝi



Eksportotaj termosoj
produktitaj de la Ter-
moŝa Fabriko de Ŝaŝi

Gemelaj urboj — pontoj de amikeco

La ĝemeligo de urboj de Ĉinio kaj aliaj landoj multe disvolviĝis en la pasintaj jaroj. Post kiam Ĉinio ekpraktikis la pord-malferman politikon, la ĝemelaj urboj de Ĉinio kaj aliaj landoj starigis amikajn interrilatojn en politiko, ekonomio, kulturo, komerco, scienco, tekniko kaj trejnado de fakuloj. Ĉinoj rigardas ĝemeligon de urboj kiel efikan rimedon por profundigi la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj kaj ankaŭ kiel novan vojon por akceli la mondpacon.

Junie de 1973 Tjanĝin de Ĉinio kaj Kobe de Japanio fariĝis ĝemelaj urboj. Tio estis la unua fojo por Ĉinio. Ĝis la fino de aŭgusto 1987, 275 urboj kaj provincoj de Ĉinio ĝemeliĝis kun tiuj de aliaj landoj.

PONTO DE AMIKECO

Reciproka vizito de gvidantoj, interŝanĝo de sciencistoj, teknikistoj, studentoj kaj diplomito-studentoj, interŝanĝo de kulturo, eduko kaj sporto kaj kontaktiĝo de junuloj, virinoj kaj infanoj, ĉio ĉi estas pontoj de amikeco inter ĝemelaj urboj. Ĉi tiuj ĝojas kaj gratulas unu alian pro la brilaj sukcesoj kaj laŭeble helpas unu alian.

Ĝemeliĝis Siĉŭan-provinco de Ĉinio kaj Miĉigano de Usono. La Miĉigana Departemento de Naturaj Riĉfontoj deziris rarajn fazanojn de Siĉŭan-provinco. Post

nelonge, en 1985, la provinco donacis al la departemento 30 fazanojn kaj krome 2 300 fazan-ovojn. Surbaze de egalrajteco kaj reciproka utilo, iuj urboj de la provinco laŭeble la unuaj aĉetas produktojn de la urboj de Miĉigano kaj la provinco si-
flanke ricevas helpon kaj subtenon de Miĉigano.

KUNLABORO EN EKONOMIO, KOMERCO, SCIENCO KAJ TEKNIKO

La kontakto kaj kunlaboro en ekonomio kaj komerco estas

grava parto de la rilatoj inter ĝemelaj urboj. Dank' al tio, multaj lokoj de Ĉinio rimarkinde progresis en la ekstera komerco. En la pasintaj naŭ jaroj Ĝjangsu-provinco per tiu vojo eksportis varojn valorantajn 225 milionojn da usonaj dolaroj, importis avangardajn ekipaĵojn kaj instrumentojn valorantajn 41.775 milionojn da usonaj dolaroj kaj akceptis alilandajn helpajn projektojn bezonantajn 12.883 milionojn da usonaj dolaroj. Nombro da

Membroj de la Edinburga Amikeca Delegacio de Britio vizitas la pagodon Dajan en la ĝemela urbo Ŝji'an.





Interparolas artistoj de la ĝemelaj provincoj Alberta de Kanado kaj Hejlongĝjang de Ĉinio.

entreprenoj funkciigataj de ambaŭ flankoj akiris bonan ekonomian efikon kaj iliaj produktoj eniris en la internacian merkaton. Post kiam ĝemeliĝis Hiroŝima de Japanio kaj Siĉŭan-provinco de Ĉinio, por akceli la ekonomian kunlaboron, la antaŭa sendis al la lasta trakti pri komerco, okazigo de foiro kaj ekspozicio de ĝiaj produktoj. Poste la ekspozicio akiris grandan sukceson en Hiroŝima.

Kune kun la disvolviĝo de ekonomio kaj komerco, la scienc-teknika kunlaboro kaj interŝanĝo de ĝemelaj urboj kreskis tagon post tago.

Ekde 1983 la Ĉengdu-a Veld-maŝina Fabriko de Siĉŭan kaj la

kompanio Sparko de Ljubljana de Jugoslavio kunlabore produktas maŝinojn por arka karbon-dioksida veldo, kiuj atingis la internacian avangardan nivelon. La totala valoro de importitaj kaj eksportitaj varoj estis 360 000 usonaj dolaroj. Ankaŭ la Ĉengdu-a Elektr-instrumenta Fabriko kunlaboras kun la kompanio en produktado de elektr-instrumentoj, kaj ĝia totala valoro de importitaj kaj eksportitaj varoj atingis 580 000 usonajn dolarojn. La dupecaj produktoj estas bonvenaj en- kaj eksterlande kaj donis bonan ekzemplon por la scienc-teknika kunlaboro inter la ĝemelaj urboj de Ĉinio kaj Jugoslavio.

Nun en la internacia merkato la

livero de artaj koraj valvoj ne povas kontentigi la bezonon, kaj Ĉinio ne povas grandkvante produkti ilin pro teknika kaŭzo. La Gŭangdong-a Popola Hospitalo kaj la Gŭangdong-a Kardiopatia Instituto kunlaboris kun la Pacifika Limigita Kompanio de biomedicino de Aŭstralio en kuna investado kaj fondis fabrikon en aŭgusto 1986 por produkti tiajn valvojn. Ĉiujare la fabriko produktas 5 000 valvojn, kies plejparto vendiĝas al aliaj landoj. Koncernaj fakuloj montris, ke kun la plivastiĝo de la enlanda merkato la jara produktokvanto de la fabriko grandiĝos dekoble.

INTERŜANĜO DE FAKULOJ KAJ TEKNIKOJ

En la lastaj jaroj la interŝanĝo de fakuloj kaj teknikoj inter ĝemelaj urboj de Ĉinio kaj aliaj landoj rikoltis bonan efikon. Multaj alilandaj fakuloj estis invitataj en Ĉinion kaj per siaj sperto, tekniko kaj saĝo kontribuis al ĝia ekonomia konstruado.

Hejlongĝjang-provinco de Ĉinio kaj Hokajdo de Japanio situas ĉe la sama latitudo kaj estas famaj grenproduktejoj. Ĉiujare ekde 1982 la provinco invitis hokajdan rizspecialiston s-ro Masajĉi Hara fari teknikan direktadon de seka rizkulturado kaj maldensa transplantado en malvarma zono, kio donis bonan efikon. Tia tekniko ŝparas semon, laborfortojn kaj akvon kaj estas facile lernebla, kaj la hektara produktokvanto kreskis de 1 500 al 4 500 kg. La kultur-areo pliiĝis de 200 000 en 1983 al 800 000 hektaroj en 1987. En tiuj jaroj li funkciigis por la provinco dekojn da trejnaj kursoj, kun partopreno de ĉ. 8 500 personoj.

En la pasintaj jaroj Ljaŭning-provinco en nordorienta Ĉinio invitis 98 alilandajn fakulojn de sia ĝemela urbo labori aŭ prelegi en Ĉinio. Ili solvis multajn malfacil-

ajn problemojn. La ĉindevenaj usonaj fakuloj pri ŝoseaj pontoj Liŭ Fej kaj Haŭ Ĝinŝeng helpis la provincon revizii projektojn de 26 pontoj de la Ŝenjang-Daljan-a Ŝoseo, kio raciigis kaj bonkvalitigis la pontojn kaj ŝparis pli ol milionon da jŭanoj.

La esplora grupo de la Akvoproduktaĵa Departemento de Fuĝjan-provinco de Ĉinio faris esplorojn en ĝia ĝemela ŝtato Tasmanio de Aŭstralio kaj aĉetis tie ostridojn de Pacifiko. La provinco sukcesis provbredi ilin, aplikante la koncernan avangardan teknikon de Tasmanio. 99% de la ostridoj vivas. Ili kreskas pli rapide ol tiuj de Japanio kaj Tajŭan de Ĉinio. Kaj la breda kosto por ĉiu hektaro estas malpli alta ol tiu de Japanio je ĉ. 100 000 jŭanoj.

DIVERSFORMA INTERŜANĜO DE KULTURO

Kultura interŝanĝo estas konsistiga parto de la kontaktoj inter ĝemelaj urboj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

En 1986 Ŝanhajo okazigis

internacian televidan festivalon pri ĝemelaj urboj, en kiu partoprenis 105 televidaj filmoj, rakontaj, kantodancaj, pejzaĝaj kaj movobildaj, produktitaj de 24 televidaj stacioj de 19 ĝemelaj urboj de 16 landoj. Dank' al tio, Ŝanhajo starigis amikajn rilatojn kun televidaj stacioj de 10 ĝemelaj urboj. La festivalo ricevis laŭdon de ĉinoj kaj alilandanoj. Ili opiniis, ke ĝi estas bona formo de kultura kaj arta interŝanĝo kaj bona okazo por artistoj lerni unu de alia.

Somere de 1987, invitite de ĝemelaj urboj kaj aŭtoritatoj de la Internacia Arta Festivalo, la Siĉŭan-a grupo de senakompana rakonto-kantado vizitis sep urbojn de Jugoslavio kaj Aŭstrio kaj faris tie 11 seancojn. Ĉiufoje la sidlokoj estis plene okupitaj kaj la prezentado devis esti longigita. Ifoje la aplaŭdado daŭris eĉ pli longe ol la prezentado mem. En la sekva tago iuj el la rigardantoj eĉ veturis centojn da km. por refoje ĝui la prezentadon en alia urbo. Multaj opiniis, ke la Siĉŭan-a senakompana rakonto-kantado estas la plej altnivela programero

de la festivalo kaj senkompare bela ĝuo.

Laŭ invito de Düsseldorf de FR Germanio, la Akrobata Trupo de Ŝenjang turneis en 1986 en pli ol 30 urboj por komerca celo kaj altiris pli ol 300 000 rigardantojn. Multaj el ili diris kun admiro, ke ili ĝuis la veran arton de la ĉina popolo kaj vidis ĝian bonan temperamenton.

En la lastaj du jaroj Ŝji'an akceptis la Infanan Ĥoron kaj Geknaban Sportan Grupon de Kioto, Japanio. Dank' al la vizito, geknaboj de la du landoj ekhavis profundan amikecon. Ĉe la adiaŭo ili forte bedaŭris la disiĝon. Reveninte al sia patrolando, iu japana knabo skribis: "Ŝji'an estas mia dua hejmurbo, kiun mi neniam forgesos dum la tuta vivo. Vicestro Miĉiko Takahaŝi diris en sia letero: "Estas netaksebla la signifo de la fakto, ke la geknaboj kun larmoj en la okuloj adiaŭis unu alian. Tio montris, ke la amika semo semita de la maljuna generacio floras en ilia koro." ■

KURANTAJ AFEROJ · KURANTAJ AFEROJ · KURANTAJ AFEROJ · KURANTAJ AFEROJ

NOVAJ SUKCESOJ EN LA NACIA EKONOMIO DE ĈINIO

La totala naci-ekonomia produktovaloro de Ĉinio en 1987 superis 1 000 miliardojn da jŭanoj kaj per tio okupis la sepan lokon en la mondo. Ĝi kreskis je 9.4%, pli rapide ol tiu de la okcidentaj evoluantaj landoj, Sovetunio kaj la orient-eŭropaj landoj en la sama periodo. La neagrikultura produktovaloro en la ĉina kamparo konsistigis unufoje pli ol duonon de ĝia totala socia produktovaloro. La pliiĝita totala generatora kapacito de Ĉinio en 1987 estis 8.1 milionoj da kW, t.e. Ĉinio neniam pliiĝis tiom

multe en unu jaro. Krome, ankaŭ la totala sumo de la eksportaĵoj de la specialaj ekonomiaj distriktoj Ŝenĝen, Ĝuhaj, Ŝantoŭ kaj Ŝjamen en 1987 duobliĝis kompare kun tiu en 1986. Ekfunkciis en 1987 pli ol cent industriaj entreprenoj kun eksterlandaj investoj.


PLIA ĈINA APLIKA TELEKOMUNIKACIA SATELITO LANĈITA

En la 7-a de marto Ĉinio sukcese lanĉis plian aplikan telekomunikacian sateliton en la satelito-lanĉa centro Ŝjiĉang en Siĉŭan-provinco per la

transporta raketo Ĉangĝeng n-ro 3, kiun Ĉinio mem faris. Jam kvarafoje Ĉinio uzis tian raketon por lanĉi sateliton.

NOVA PROGRESO DE LA ĈINA INTEGRA-CIRKUITA INDUSTRIO

Fine de februaro ĉina helpa projekta sistemo ĝenerale por integra-cirkvitaj komputiloj trapasis ekspertizon de la ŝtato. Kiel granda atingo de la ĉina integra-cirkuita industrio, ĝi plenigis blankon de ĉina tekniko. La sistemo estas instrumento por projekti integran cirkviton. Kun superklasa



La transporta raketo Canggeng n-ro 3 kun aplika telekomunika satelito lanĉita



Tibetanoj vendos al la ŝtato sian superfluan grenon.

mikroaparato kaj labora stacio kiel la bazo, ĝi enhavas diversajn softvarojn por integra-cirkvita projektado. Kaj la funkcio de iuj el la softvaroj jam atingis la internacian nivelon.

ĈINIO KUN PLEJ GRANDA PRODUKTOKVANTO DE RARA TERO

En 1987 Ĉinio produktis 15 100 tunojn da rara tero, unuafoje pli multe ol Usono, kaj per tio okupis la unuan

lokon en la mondo. Ĝi estas unu el la ĉefaj rezervantoj kaj produktantoj de rara tero kaj ĝia rezervokvanto de rara tero konsistigas 80% de tiu de la mondo.

NOVA PROGRESO DE LA EKONOMIO EN ĈINAJ NACIMINORITATAJ REGIONOJ

La totala industria kaj agrikultura produktovalorio de ĉinaj naciminori-

tataj regionoj Interna Mongolio, Ŝinĝiang, Gŭangŝji, Ningŝja kaj Tibeto en 1987 atingis 64.2 miliardojn da jŭanoj, je 10.6% pli multe ol tiu en 1986 (kalkulate laŭ la konstanta prezo de 1980), kaj ilia totala produkto-kvanto de greno atingis 25.916 milionojn da tunoj, je 8.3% pli multe ol tiu en 1986.

ĈINIO NE ŜANĜOS POLITIKOJN POR TIBETO

En 1987 tre multaj lokoj de Tibeto suferis naturajn katastrofojn, tamen ĝia totala produktokvanto de greno superis 450 milionojn da kg., pli multe ol tiu en 1986; la nombro de la vivaj idoj de brutoj estis 5.3 milionoj, kun kresko de pli ol 18%; la diversspecaj okupoj kaj urbetaj entreprenoj stabile disvolviĝis; kaj la pokapa jara enspezo de terkulturistoj kaj paŝtistoj atingis 346 jŭanojn, duoble pli multe ol tiu en 1979.

La 8-an de marto Dŭoĝji Cajĵang, prezidanto de la Popola Registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, diris en Lhasa, ke malgraŭ la tumultoj lastatempe kreitaj de plenmano da naciŝplisistoj en Lhasa, la registaro ne ŝanĝos siajn politikojn por Tibeto, sed persistos ĉe la reforma, pordmalferma kaj vigliga politikoj, rapidigos kaj solidigos la paŝojn de reformado kaj prosperigos la ekonomion de Tibeto.

ĈINAJ TAPIŜOJ DEBITAS EKSTERLANDE

Jam antaŭ longe Ĉinio eksportis siajn tapiŝojn. En 1987 sur la internacia merkato vendiĝis ne nur tradiciaj ĉinaj permane faritaj nodoplenaj tapiŝoj, maŝin-teksitaj kaj plektitaj tapiŝoj, sed ankaŭ ĝiaj broditaj kaj trikitaj tapiŝoj. En 1987 Ĉinio eksportis 4 milionojn da kvadrataj metroj da tapiŝoj.

RIZOSEMO ARTE BREDITA EN ĈINIO

Post du-jara eksperimentado la Genetika Instituto de Fudan-universitato de Ŝanhajo sukcese arte bredis rizosemon kun stabila hercedco. Post bredado de unu embrio de rizosemo oni povas ricevi sen-nombrajn semgrajnojn. La esploraĵo estas avangarda en la mondo kaj havas gravan signifon por la porindustria produktado de semo kaj por la ŝparo de naturaj semgrajnoj.



Ĉinaj tapiŝoj facile vendataj



Li Jan honorita per ora medalo

FEJ ŜJAŬTONG RICEVIS PREMION DE BRITA ENCIKLOPEDIO

La 17-an de februaro fama ĉina antropologo kaj sociologo prof. Fej Ŝjaŭtong ricevis en Londono premion de brita enciklopedio por 1988 kaj fariĝis la unua tiel honorita ĉina erudiciulo.

LA UNUA PROVTUBA BEBO SUR LA ĈINA KONTINENTO

Dank' al la laboro de kuracistoj kaj akuŝistinoj de la Tria Hospitalo sub la Pekina Medicina Universitato, naskiĝis antaŭ nelonge infanino 3 900 gramojn peza kaj 52 centimetrojn longa — la unua provtuba bebo sur la ĉina kontinento. Ŝia patrino, 39-jara, edziniĝis antaŭ 20 jaroj kaj dumlonge ne gravediĝis pro obstrukco de la oviduktoj.

LI JAN ROMPIŜ LA MONDAN REKORDON DE VIRINA 1000-METRA RAPIDSKIADO

En la 15-aj Vintraj Olimpiaj Ludoj la ĉina sportistino Li Jan rompis la mondan rekordon de virina 1 000-metra rapidskiado kaj gajnis la oran medalon en tiu sportbranĉo.


GRANDA SUBTERA OLEKAMPO EN ŜINĜJANG

Oni malkovris grandan olekamon sub Taklimakan-dezerto en Tarimbaseno en la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. La oleo kaj gaso en la olekampo multe superas 10 miliardojn da tunoj, kiujn oni taksis antaŭe. La oleo kaj gaso-riĉa loko kovras 100 000 kvadratajn kilometrojn kaj diversaj oleaj strukturoj 10 000 kvadratajn kilometrojn.

VEJĈI-GLOBETOJ DE TANG-DINASTIO TROVITAJ EN ŜJI'AN

Instruistoj kaj studentoj de la Nordokcidenta Universitato de Ĉinio trovis 22 blankajn kaj verdajn vejĉiglobetojn en du elĉerpitaj putoj de Tang-dinastio (618-907 p.K.), la plej malnovajn en la mondo. La blankaj estis faritaj el limao-konkoj kaj la verdaj el polurita verda ŝtono.

La unua provtuba bebo sur la ĉina kontinento



Konkurso de tamburaj ĉaroj

de LJANG ĴŬOAJ



Tambura ĉaro antaŭ konkurso

En vilaĝoj de Ŝjangfen de la suda parto de Ŝanŝji-provinco, Ĉinio, estas la nacia moro konkurso de tamburaj ĉaroj jam de centoj da jaroj.

Por celebri ĉiujn gravajn festojn, la tieaj kamparanoj okazigas konkurson de tamburaj ĉaroj. Tambura ĉaro estas granda ligna ĉaro kun gravuritaj ornamaĵoj farita speciale por la aktivado kaj ŝarĝita per du grandaj tamburoj kun tri-metra perimetro kaj unumetra alto. Ĝenerale, la konkurso okazas inter du najbaraj vilaĝoj. Por la konkurso, ĉiu vilaĝo elektas la plej fortajn kaj plej sagacajn knabojn kiel siajn reprezentantojn. La partoprenantoj de ĉiu vilaĝo kondukas unu tamburan ĉaron, sur kiu du homoj ritme frapas la tamburojn, akompanate de gongado kaj cimbalo. Antaŭ la ĉaro iu homo portas sur siaj ŝultroj timonojn, dum aliaj du helpas lin. Ili funkcias kiel direktistoj de la ĉaro. 20-kelkaj kondukantoj

haŭlas du pli-ol-30-metrajn ŝnurojn ligitajn kun la ĉaro. Ĉiuj konkursantoj portas blankan kaptukon kaj ĉemizon borderitan per galono. Ili estas viglaj kiel tigro. Kun ordono la konkurso komenciĝas. La du tamburaj ĉaroj samtempe ventorapide kuras antaŭen. La vilaĝanoj ambaŭflanke de la vojo laŭte huraas por ilin kuraĝigi. Kie preteriras la ĉaroj, tie leviĝas surdaj tamburado, gongado kaj huraado, kio ravas la rigardantojn.

La konkurso de tamburaj ĉaroj ofte altiras al si milojn kaj dekmilojn da rigardantoj. Ambaŭflanke de la vojo, sur kiu iras tiaj ĉaroj, staras vico post vico da ĝojaj rigardantoj. Inter ili nemalmultaj venas de lokoj kelke kaj eĉ de kelke da li-oj (unu li = 0.5 km.) fore por ĝui la spektaklon. Maljunuloj venas por rigardi, ĉu la spektaklo estas pli alloga ol en la lasta jaro. Junuloj venas por scii, kiu funkcias kiel la ĉefa konkursanto. Kaj knabinoj venas kun la celo serĉi por si

amaton.

En la konkurso la plej alloga estas lubrikado de ĉaroj. Post longdistanca irado defrotiĝas la oleo sur la akso de la ĉaroj, kaj veturigi ilin fariĝas malfacile. Tamen estas malpermesite haltigi la ĉarojn por lubriki, tial oni elektas lertulojn por lubriki la aksojn. Ili kun bovlo da oleo en la mano atendas ĉe la vojo. Tuj kiam la ĉaro de ilia vilaĝo alvenas, ili jetas la bovlon al la akso. Kiam la bovlo trafas la akson, la rigardantoj aplaŭdas ilin, sed kiam ili maltrafas, tiam ĉe la rigardantoj eksplodas mokrido.

La konkurso ne estas limigita de tempo. Ofte okazas, ke la konkursantoj estas egalfortaj. Neniu el ili povas gajni la venkon eĉ post kelkhora konkurso. Kompreneble, se la rivaloj estas ege diferencaj en forto, do la pli forta povas gajni la konkurson facile. Tamen, la rigardantoj ŝatas ĝui la konkurson inter egalfortaj rivaloj. ■

Ĉu vi volas koni Tibeton?

BV. LEGI LA NOVE APERINTAN ALBUMON EN ESPERANTO

TIBETO SUR LA MONDA TEGMENTO



Tibeto, konata kiel mistera loko, allogas multajn personojn en la mondo. Antaŭ nelonge la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis la albumon dediĉitan al tiuj, kiuj interesiĝas pri Tibeto.

La albumo fidele kaj detale konigas Tibeton. La aŭtoroj vivis longe en Tibeto kaj havas profundan konon pri ĝiaj pasinteco

kaj nuntempo. Ili fosis en historiaj materialoj, multon spertis kaj faris esplorojn kaj vizitojn tie, kaj tial ili povas bone prezenti en la albumo la pasintan vivon de tibetanoj sur la antikva teritorio kaj ilian rapidan progreson en la nuntempo. La albumo helpas koni la historion, geografion, ekonomion, kulturon, morojn, religian kredon kaj popolan vivon de Tibeto.

Bindita, 187 × 260 cm., 132 pg. kun 72000 ideogramoj kaj 140 koloraj bildoj (85-Es-316D)

Mendu ĉe: Perantoj de EPC
aŭ: Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

(Daŭrigo de p. 68)

tojn el la vestoj, ornamoj kaj danc-stiloj de la 24 dinastioj de Ĉinio kaj komponis ilin en la artan tuton per siaj apartaj impresoj kaj ideoj, kaj lerte unuigis la dancajn vestojn kaj dekoraciojn, palacajn, folklorajn kaj teatrajn en la dinastioj Tang, Song kaj Ming, kio estigis stereografiajn kaj estetikajn efikojn.

En la 90-minuta prezentado la aktoroj vidigis al la spektantoj 400

kompletojn da vestoj, kiuj estis projektitaj surbaze de la historiaj materialoj kaj arta troigo konforme al la danca trajto, tiel ke ili donis fortan impreson.

Tamen la bunteco de la vestoj tro allogis la atenton de rigardantoj, sekve de tio la pluraj altnivelaj malfacilaj dancmovoj kiaj "tatu-a danco" de Song-dinastio, "longmanika danco" de Ming-dinastio kaj "Ok Trigramoj" en la epilogo

iagrade eklipsiĝis de la buntaj vestoj.

Tiu grandioza danco, origine nomata "Impreso pri la Vestoj kaj Danc-stiloj de Diversaj Dinastioj de Ĉinio" estis ludita en la internacia arta festivalo okazigita en Ŝanhajo, printempe de 1987, kaj vekis sensacion. Kaj ĝuste en la tempo, kiam ĝi estis admirata de la rigardantoj, la koregraf-reĝisoroj faris rekreadon kaj ĝi fariĝis la nuna danco. ■

Evoluo de la belo en la lando de vestoj

—Pri grandtipa danco “Ora Danco, Arĝenta Ornamo”

En pli ol unu horo la spektantoj trarigardis 6 000-jaran historion de Ĉinio kaj aprecis la vestan belon de Ĉinio — lando de vestoj. Jen la grandtipa danco “Ora Danco, Arĝenta Ornamo” de la Unua Ensemblo de la Ŝanhaja Dancdrama Teatro omaĝe al la Unua Arta Festivalo de Ĉinio, septembre de 1987.

La danco prezentis staton de la pratempo: Muziko sonis fore, sceno vidigis nebule. Dancis tri viroj kaj unu virino en striktaj karnokoloraj vestoj, kiuj prezentis, kiel primitivaj homoj kantis kaj dancis en laboro, sin vestis pro malvarmo. En la reciproka imitado kaj komparado ili iom post iom formis sian konscion pri estetiko. La 3-minuta danco lakone montris la evoluon de homoj, danco, ornamo kaj kulturo kaj iliaj reciprokaj rilatoj.

Tang-dinastio (618-907) havis sian prosperan periodon en la ĉina historio. La danco kun fono de palaca vivo prezentis tiaman kulturalan prosperon. La muziko plifortigis la brilan kaj pompan etoson. En la nebuleca Hŭaĉing-banejo, la imperiestra edzino Jang Juhŭan elbanujigis akompanate de amaso da belulinoj. Ŝi havis altan hartuberon, ŝultre portis ŝalon kaj profunde dekoltis sin per gracia robo el blanka gazo, kiu post ŝi trenigis kaj sur kiu estis kelkmetra flava robo multe pli luksiganta la portantinon.

La danco de Song-dinastio (960-1297) ĉefe prezentis popolajn vestojn. Sur fono de la Lanterna

Festo oni promenis surstrate en melodia muziko, aprecis lanternojn kaj florojn, portante kompare simplajn diversfasonajn vestojn purpurajn, verdajn, flavajn kaj helruĝajn, kio forte kontrastas kun la pompeco de la danco de Tang-dinastio. Kun pliigo de la promenantoj plimultiĝis ankaŭ la jonglantoj. La dancoj montris, kiel grandan influon havas la vestoj al la popola arto.

En Ming-dinastio (1368-1644) la ĉinaj dramoj eniris en sian prosperan periodon. La formala kaj estetika normoj de la ĉinaj teatraj kostumoj kaj dekoracioj formiĝis surbaze de la vestoj kaj ornamaĵoj de Ming-dinastio. Tiu akto ĉefe prezentis la teatrajn vestojn kaj dekoraciojn. Sur la scenejo de Ming-dinastio oni harmonie kunfandis la rafinitajn formalajn dancmovojn kun la brilaj teatraj verkoj. La famaj operaj roluloj estis prezentitaj strange kaj mozaikaj.

En freŝa kaj bela muziko la nupto de imperiestro kaj popolanoj montris la morojn kaj kutimojn de Ĉing-dinastio (1644-1911). 12 knabinoj en manĉuraj vestoj, ĉu bunte dekoraciitaj, pasamentitaj aŭ borderitaj, ĉu broditaj aŭ glade plisitaj, ĉiuj aspektas aparte ĉarmaj; dum la modernaj kostumoj de Sun Jatsen-stilo plene montris la seriozan konturan belon de viroj. Sekve sursceniĝis kelkaj virinoj en moderna manĉura robo, kio montris, ke la postaj diversfasonaj virinaj roboj estas variaĵoj de la

manĉuraj vestoj.

Fine kun fono de pasintaj kelkaj dinastioj prezentigis modernaj vestoj, kio aludis la kontinuan evoluon de ĉinaj vestoj. En la evoluo estis kaj heredo kaj kreo. Ili estas miksaĵoj de la tradicia orienta kulturo kaj la okcidenta.

La danco montris la buntecon de la ĉinaj vestoj kaj ornamaĵoj, dum la ĉinaj vestoj reliefigis la ĉarmon de la ĉinaj dancoj, kio vekis freŝan impreson ĉe spektantoj. Prave diris Li Ŝjaŭjun, direktoro de la Ŝanhaja Dancdrama Teatro kaj unu el la koregraf-regisoroj de la danco, ke “Ora Danco, Arĝenta Ornamo” estas nova provo unuigi dancprezenton kaj vestmontron.

En eksponado de diverstempaj vestoj, la danco prezentis ĉefe vestojn de la dinastioj Tang, Song, Ming kaj Ĉing kaj fine tiujn de la nuna epoko. Tiele la danco iom post iom proksimigis la temon al la reala vivo, kio estigas ĉe la spektantoj kaj impreson pri la historiaj faktoj kaj ankaŭ intimecon kaj freŝecon.

Komponente la dancon, koregraf-regisoroj donis grandan atenton al reflektado de la ĉina kulturo. En la ĝenerala stilo ili faris ĉion eblan por montri la epokajn trajtojn, sed ne sin alkatenis al la detaloj, tiel ke evidente paliĝis la postsignoj arkeologie prezenti la dancajn stilojn, vestojn kaj dekoraciojn de diversaj periodoj. Koregraf-regisoroj elektis kelkajn fragmen-

(Daŭrigo sur p. 67)



La Tang-dinastia imperiestro Li Longgji kaj lia edzino Jang Juhuan

FOTO DE ŠEN ČEN



Song-dinastia danco en popolaj vestoj

FOTO DE LI LANJING




Danco en Ĉing-dinastiaj naciaj
kostumoj

FOTO DE LI JANNJAN



Teatraĵo en Ming-dinastiaj vestoj

FOTO DE LI JANNJAN





Nupta danco en modernaj vestoj

FOTO DE LI LANJING



Famaj antikvaj turoj de Ĉinio

de LU DONG

La arto de turo-konstruado estas grava branĉo de la ĉina antikva arkitekturo. La poŝtmarkoj prezentas kvar famajn antikvajn turojn de Ĉinio. Supre maldekstre: La turo Flava Gruo en la urbo Uhan, Hubej-provinco; supre dekstre: Jŭejang-turo sur la okcidenta pordego de la urbo Jŭejang ĉe Dongting-lago en norda Hunan-provinco; sube maldekstre: La Turo de Princo Teng ĉe Ganĝjang-

rivero en la urbo Nanĉang, Ĝjangŝji-provinco; sube dekstre: Penglaj-turo sur Danĵa-monto en Penglaj-gubernio, Ŝandong-provinco.

La poŝtmarko-serio el kvar pecoj estis emisiita en la 30-a de oktobro 1987. Ĉi tie ni prezentas la miniaturan pecon pri la turoj.

Por koni la turojn bv. legi la artikolon "Antikvaj Turoj de Ĉinio" en la dua numero de 1988.

中国历代名楼

